5-a Jaro. N-o 256 APERAS  SEMAJNE 29. Aŭgusto 1929

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanti | SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerhner

PROTOKOLARO DE LA 9-a SAT-KONGRESO

4.—10. aŭgusto 1929 en Leipzig

Laŭ la decido de la 9-a SAT-Kongreso ni publikigas la protokolaron pri la Kongreso en unu tuta pli ampleksigita n-o de "S-ulo", kiun ni sendos laŭ deziro kaj senkoste al ĉiuj aktivaj membroj de SAT. - Red.

LA ĜENERALA BILDO DE LA KONGRESO

Anoncis sin al la Kongreso sume **1102** Gek-doj el **29** landoj, nome el: Germanio 692, Sovetio 176, Francio 31, Aŭstrio 38, Anglio 30, Ĉeĥoslovakio 25, Svedio 24, Nederlando 21, Hispanio 10, Belgio 6, Usono 6, Hungario 5, Polio 5, Dancigo 4, Alĝerio 3, Svisio 3, Argentino 3, Latvio 3, Norvegio 1, Jugoslavio 1, Finnlando 1, Persio 1, Ĉinio 1, Kanado 1, Bulgario 1, Luksemburgo 1, Italio 1, Estonio 1, Islando 1. Fakte partoprenis la Kongreson sume **662** Gek-doj el **22** landoj, nome el: Germanio 527, Aŭstrio 29, Francio 19, Svedio 18, Anglio 17, Ĉeĥoslovakio 15, Nederlando 12, Alĝerio 3, Dancigo 3, Svisio 2, Sovetio 2, Ĉinio 1, Kanado 1, Italio 1, Latvio 1, Estonio 1, Jugoslavio 1, Luksemburgo 1, Bulgario 1, Islando 1, Belgio 3, Hungario 3. — El la sovetiaj SAT-anoj ricevis nur **2** K-doj la vizon (K-doj Demidjuk k Drezen, Moskvo) el **12** vizpetintoj.

La Kongreso okazis en la plej granda, bele aranĝita salonego de l' Popoldomo. Super la estrado pendis, tutlarĝe, tre efika afiŝego "Proletoj ĉiulandaj unuiĝu vin!" Ĉe la enirejo al la domego salutis la alvenanton grandlitere "Bonvenon" k neesp-istojn sciigis same grandlitere en germana lingvo afiŝego pri la kongreso. Sur la domo flirtis ruĝa standardo. Ĉiuvespere okazis ĉe la radio-stacio MIRAG disaŭdigoj dekminutaj pri la kongresaj okazoj. La kongreso estis filmata. La du laboristaj gazetoj de Leipzig raportis ĉiutage tre detale pri la traktadoj (bedaŭrinde ne ĉiam en objektiva maniero!)[1]. La neŭtralaj, burĝaj gazetoj prisilentis la Kongreson. En la apudĝardenaj salonoj troviĝis Ekspozicio, kiu trafe elmontris la peresperantajn labor-sukcesojn. Kun la esp-istoj ekspozis lab. radiistoj, fotistoj, ateistoj, sportuloj. La ekspozicio estis bone vizitata. La Poŝtejon instalitan en la kongresejo gvidis K-do Ŝinkel.

La 4-a de aŭgusto

Matene k posttagmeze jam kunsidis la estraro plivastigita de LEA germanlingva k la Plenumkomitato de SAT kun ĉeestantaj Ĝen. Konsilantoj. Je la 17-a salutis per muziko la gastojn la Leipzigaj lab. sportuloj. La kongresanoj iris por fotado k publika manifestacio al "Reichsgerichtsplatz" (Rajĥsgeriĥtsplac) — la placo, kie staras la Regna Tribunalo. Oni taksis la personojn tie ĉeestantajn je proks. 2000. La revenintoj plenigis la salonegon por la Saluta Festo aranĝita de la germanl. LEA. Multaj neesp-istoj ĉeestis en tiu vespero por aŭskulti la eksterlandajn K-dojn. K-do Bässler (Leipzig) malfermis nome de la Organiza Kongres-Komitato. Tiam parolis K-do Hempel (Leipzig) por la LEA-Asocio. Sekvis la prezidanto de l' Lucerna Sportinternacio, K-do Gellert, kiu parolis esperantlingve; Schumann (Ŝuman) por Internacia Laborista Helpo; Junkriĥ por Internacia Ligo de la Militviktimoj; urba konsilisto Aug. Lehmann por la Urbo Leipzig; Heinr. Schulz (Ŝulc) por la estraro de la Socialdemokrata Partio Germania; Dasecke (Leipzig) por la CK de l' Kom. Partio Germania k kom. urb-deputita frakcio de Leipzig; K-do Koppisch (Kopiŝ) (Leipzig) esp-e k germane, por la soc. dem. frakcio en la Leipziga urbparlamento k distrikto Leipzig de l' soc. dem. partio; Hartvig de la Internacio de proletaj liberpensuloj; Lindner por la Germ. Laborista Radio-Asocio; Fischer (Fiŝer) por la laborista mandolinista asocio k la ĵus fondita "Sonanta Internacio"; Ŝimanna por la Germ. Lab. Kantista Asocio; Eidam (Ajdam) por la Lab. Sanitarista Asocio Germania, distr. Leipzig; Gerbiĥ por CK k distr. Okcident-Saksio de Intern. Ruĝa Helpo; Ad. Waidmann (Bremen), je la nomo de ISK (Intern. Socialista Kunbatalo). Krome salutis K-do Goldberg nome de Laborkomunumo de geinstruistoj Leipzigaj; Spander por la Labor. Abstinentuloj Germ.; Teubner por Lab. Stenografoj (sistemo Arends); Lange por Saksa Lab. Defendtrupo; Ŝolc por Lab. Pafista Ligo, reprezentanto de Mondjunulara Ligo k de Germana Liberpensula Ligo. (Tiuj lastaj pro la malfrua tempo ne povis persone prezenti siajn salutojn.)

Nun parolis la alilandaj SAT-anoj-kongresanoj al la publiko. Parolis laŭvice K-doj Pech (Plzen, Ĉeĥosl.), Bureau (Alĝero), Jonas (Vieno), Eriksson (Stokholmo), Klaps (Dancigo), Toberson (Kanado), Ĉinia K-do, Sulski (Londono), Pieperiet (Enŝede, Nederl.), Kauliĥ (Bruselo, Belgio), Georgiev (Bulgario), Itala K-do (sennoma), Latvia K-do, Hungaria K-do, Glodo (Paris), Körner (Luksemburgo).

Ĉiuj salutoj estas tradukitaj tuj de kvin K-doj alterne el germana esperanten, aŭ inverse. — Fine K-do Bässler faras komunikojn por la kongresanoj k la publiko.

En la dua parto de l' vespero estis prezentataj ritmaj dancoj de lab. sportulinoj k la festludo: "Kaj la Tero ektremis", kontraŭmilita scenaro kun paroladoj, filmoj, parolĥoroj k kantoj, kiu en sia tuto forte impresis la ĉeestantojn k estis modele prezentita de la kunagantoj. Parolĥoroj k kantoj en esp-o atestis pri serioza studlaboro amasa, esp. lingvaj tekstoj al la filmo entuziasmigis la ĉeestantojn. Finkantis ĉiuj kune "Fratoj al Sun'..."

Unua laborkunsido, 5-a de aŭgusto, posttagmeze

Lundon matene kunsidis ĵurnalistoj k gazetraportistoj.

K-do Bässler malfermas je 14.30 horo k petas pardonon, ke montriĝis malfaciloj ĉe la enloĝigo de la laste venintaj K-doj, ĉar alvenis lastmomente al la Kongreso granda kvanto da novaliĝantoj, al kiuj devis esti havigataj loĝejoj.

K-do Drezen (Moskvo), kiu ne plu povis saluti en la amaskunveno pro tro malfrua alveno en Leipzig, alportas la saluton de pli ol 1000 sovetiaj SAT-anoj, atentigas pri la malprosperemo de la neŭtralaj esp. organizoj k la prospero de la esp. lab. movado, eĉ en lando kiel Hungario, laŭdas la grandan esp. vortaron, kiu estas eldonata per la fortoj de SAT, atentigas, ke en la Lingva Komitato estas 5 SAT-anoj, deziras brilan sukceson al la 9-a. (Aplaŭdo.)

K-do Lanti per kelkaj vortoj dankinte al la O.K.K. pro la

[1] "Saksa Laborista Gazeto" enhavis krome ĉiutagan rubrikon "El tuta mondo" en esp-o, por informi la negermanlingvajn kongresanojn.

bonaj aranĝoj proponas je la nomo de l' Plenum-Komitato la prezidantaron k sekretariaron por la Kongreso. La proponita listo estas akceptita sen kontraŭdiro. Eniras la prezidantaron K-doj Demidjuk (Moskvo), Ĉinia K-do, v. d. Heid (Dortmund), Bässler (Leipzig), Capoulade (Sète, Francio). Sekretarias: K-doj Bartelmes (Paris), Platiel (Leipzig), Vildebrand (Berlin).

K-do Demidjuk (Moskvo) prezidas k transdonas la parolon al K-do Bässler, kiu legas pli ol 50 salutleterojn k telegramojn, venintajn de div. organizoj, grupoj k individuaj SAT-anoj. Ni nur citu jenajn instituciojn, kiuj salutis: Fervojistaj organizoj en Kassel k Samara, Intern. Transportlab. Federacio, Amsterdam, Intern. Laboroficejo, Ĝenevo, Prol. kulturorganizoj Dresden, Kultur- k Art-Komisiono Intersindikata, Varsovio, Sonanta Internacio, Dresden, Sanitarista Asocio, Chemnitz, Militkontraŭula Internacio, Vieno, Ŝakasocio, Chemnitz, Prol. liberpensuloj Rejnlando-Vestfalio, Liberpensula Ligo, Belgio, Ateista Unio de USSR, Moskvo, Eks-ruĝfrontanoj Leipzig, Leningrada oficista sindikato, Loŝkarivska infankolonio, SPD. Gross-Dresden, Pravda-Redakcio, Leningrad, ktp. ktp.

Por elekti proponkomisionon (kiu pritraktu la proponojn, prezentitajn al la Kongreso k prezentu ilin al la plenkunveno) estas proponata nombro da 5 K-doj. Estas proponitaj tamen 9 SAT-anoj inter la ĉeestantoj de la kunveno k K-do Demidjuk opinias bone lasi ĉiujn 9 K-dojn: Estas sekve K-doj Muravkin (Berlin), Stertzenbach (Essen), Deubler (München), Köckeritz (Dresden), Latvia K-do, Guhr (Seifhennersdorf), Kaulih (Bruselo), Maller (Vieno), Burger (Essen), kiuj formas la Proponkomisionon k akceptas la elekton. K-do Bässler faras div. komunikojn, i. a. li sciigas, ke la parolado pri "Imperialismo k militoj" ne okazos pro manko de oratoro.

La kunsido estas finita je la 16-a h. Okazas poste kunvenoj de sindikatanoj laŭ sindikatoj aparte en la div. ĉambroj de la Popoldomo. Vespere estas la lumbildparolado de K-do Pech (Plzen) pri vojaĝo tra Eŭropo k Nordafriko, kiu pro sia neŭtrala, senkolora karaktero trovas la malplaĉon de la aŭskultantoj k estas publike kondamnata antaŭ la Kongreso de K-do Wendt, membro de la Kongr. Kom.

Dua laborkunsido, 6-a de aŭgusto matene

Malfermo ĉ. 9-a horo. K-do von der Heid prezidas. Post teknikaj komunikoj de K-doj Bässler k Wendt, anoj de la Kongr. Kom., legas K-do Bartelmes (Paris) la unuan parton de la Raportaro de l' Plenum-Komitato de SAT al la Kongreso (tiun de la Ĝenerala Sekretario):

RAPORTARO DE LA PLENUM-KOMITATO DE SAT

Ni prezentas al la SAT-anaro, kiel ĉiujare, la raportaron de la Plenumkomitato, okaze de la SAT-kongreso por ekzameno, aprobo aŭ malaprobo. La raporto ampleksas la periodon de 1. julio 1928 ĝis 30. junio 1929.

Niaj mortintoj. Kun sincera bedaŭro ni registras, ke forlasis niajn vicojn dum la raportjaro pro morto jenaj membroj de nia Asocio: K-dino Anna Derevjannik, K-doj Emilo Hallikainen, Robert Burkert, Moritz Axmann, Hermann Remers, Gracia José, N. M. Graĉev, Neĝam Mohamed, Faure Adrien, Johano Vajnŝtejn, Dionizio Klaĝin, Emilo Aaerny, M. Livŝic, Emil Bleuel, Kurt Grohmann, H. Weiss.

La Asocio dece memoros ilian agadon por nia afero, nelaciĝante en la daŭrigado de la laboro por kiu ili dediĉis tiom da sia energio.

Konsisto k funkciado de l' Plenum-Komitato. Dum la priraportata periodo funkciis kiel Plenum-Komitatanoj la tutan tempon: K-doj B. . . ., Bartelmes, Cachon, Dessoit (Marso), Glodeau, Lanti (la 6 Parizaj membroj, kiuj formas laŭstatute la Direkcion), Lerchner (Leipzig), Nekrasov (Moskvo). K-do Richter (Leipzig) eksiĝis komence de marto 1929, per la motivo, ke liaj konsiloj rilate al administraciaj aferoj ne estis sufiĉe atentataj de la ceteraj Pl.-K-anoj. Krome estas elektendaj laŭ propono 23 de la 8-a Kongreso, kiel novaj Plenum-Komitatanoj K-do Bässler (Leipzig) en sia eco kiel gvidanto de l' Gazetservo de SAT k K-do Rublov (Odessa) kiel sekretario de la Literatura Komisiono. Dume ni traktis tiujn du K-dojn, kvazaŭ ili jam estus elektitaj de Ĝen. Konsilantaro, sendante al ili la protokolojn de l' Direkcikunvenoj k atentante iliajn opiniojn. La administra komisiono, kiu rajtas prezenti Pl.-Komitatanon, ne estas reprezentita, ĉar ĝi en tiu ĉi momento fakte ne ekzistas.

La Parizaj membroj (Direkcio) regule kunvenis ĉiu-dusemajne, k pli ofte, kiam necesis. Sekretario de l' Pl.-K. estas K-do Glodeau, Prezidanto K-do Lanti, protokolanto K-do Bartelmes (kiu anstataŭis K-don Cachon post la 8-a Kongreso. La decidoj preskaŭ ĉiam okazis unuanime, k la resuma protokolaro atestas pri la amasego da laboro plenumita.

Rilatoj inter Ĉ. K. k Pl. K. La rilatoj ĉiam estis glataj. Ĉiujn gravajn problemojn la Pl. K. konigis al la Ĝ. K.-anoj, petante ilian konsilon k sugestojn. Bedaŭrinde ankaŭ en tiu ĉi jaro ne ĉiuj Ĝ. K.-anoj akurate respondis. Senditaj estis 3 cirkuleroj dum la jaro. El la 16 konsilantoj respondis al la 1-a cirkulero 8 K-doj (ĝenerale aprobe, K-do Richter sin detenis pri 2 punktoj), al la 2-a 12 K-doj (ĝenerale aprobe, 1 malaprobo de K-do Kerr pri unu punkto [pliampleksigo de "S-ulo"]), al la 3-a 9 K-doj (ĝenerale aprobe).

Kiel oni vidas, la respondintaj Konsilantoj aprobis nian agadon ĝenerale, se ne unuanime. Cetere per privataj leteroj de konsilantoj, kiuj ne respondis al la cirkuleroj, ni eksciis, ke ilia nerespondo signifas aprobon al nia gvidado. Ĉar nun la nova Ĝ. K. laŭ la decido de l' lasta Kongreso ĵus elektiĝis, ni esperas, ke la freŝaj fortoj — k ankaŭ la kelkaj malnovaj K-doj, kiuj restis senŝanĝe ĉe sia posteno post la nova elekto, funkcios tre regule k konscios sian devon, kiun ili havas kontraŭ la Asocio k kontraŭ la elektintaro. Partoprenis tiun elektadon 1831 membroj el 5170 aktivaj SAT-anoj, repagintaj la kotizon je la tempo de l' kalkulado de voĉoj. Sekve ⅓ proksimume pruvis, ke ili meritas la nomon "aktivaj SAT-anoj" k ke ili komprenis la sencon de tiuj elektoj pri la plej alta instanco de nia Asocio. Ni faris ĉion eblan, per plurfoja atentigo en la oficiala organo, ankaŭ per klara prezento sur la balotilo mem, por atingi, ke kiel eble plej granda nombro da SAT-anoj partoprenu en la baloto. Kvankam la elcento ne estas tute kontentiga, ni konstatas tamen grandan progreson kompare kun la antaŭlasta baloto ĉe kiu la % estis nur 1/7. La Leipziga SAT-junularo bonvolis disponiĝi sin por plenumi la teknikan parton de l' disnombrado de la voĉoj. Certe neniu povus prave riproĉi pri malbona funkciado de l' gvida k administra aparatoj en tiu afero. La nova Ĝ. K. sekve laŭstatute estas elektita k akceptas plenrajte siajn funkciojn.

Rilatoj inter SAT k LEA-oj. La Göteborga Kongreso trovis la solvon por reguligi tiun gravan demandon, akceptante unuanime la Konvencion, kies teksto estas publikigita en "S-ulo". (Vd. n-on 231.) Krome ni insistis ĉe la diversaj LEA-oj, ke por diskonigi tiun gravan dokumenton, ili aperigu ĝin nacilingve en siaj organoj, kiom eble. Plenumis tion ĝis nun ne nur LEA (FEO, la franclingva LEA, presigis la leteron de l' Direkcio al la LEA-oj) GLEA promesis[1] ĝin aperigi en "AE" k ni insistas, ke ankaŭ aliaj LEA-oj, kiuj eldonas proprajn gazetojn, faru la samon. Kiel vi scias, en Göteborg 3 LEA-oj mankis ĉe akcepto de la Konvencio, la nederlanda (NEFL), la aŭstria (ALLE) k la ĉeĥoslovakia. El longaj perleteraj intertraktadoj kun la Direkcio de SAT rezultis, ke NEFL akceptis la Konvencion (oficiale ĉe sia Kongreso 28. IV. 29); same faris ALLE dum sia Plenkunveno (paskon 29). Lastatempe ni ankaŭ atingis la konsenton de la Laborista Esperanta Ligo el Ĉeĥoslovakio. — Ni sendis al ĉiuj LEA-oj akceptintaj la Konvencion, cirkuleron kun praktikaj proponoj rilate al eldono de komuna afiŝego k kreo de LEA-informilo ĉe "S-ulo". Tiu cirkulero estas konigita al ĉiuj SAT-anoj per publikigo en "S-ulo" (n-o 231, 7. 3. 29). Ni ricevis kelkajn pozitivajn respondojn k proponojn, sed ne de ĉiuj. La afero troviĝas en stato de evoluo, ni devas ja interkonsenti kun ĉiuj pri la farotaĵoj. Cetere dum la nuna Kongreso okazos kunsido inter reprezentantoj de P. K. k LEA-oj, kies rezultoj estos konigataj al la SAT-anaro. — La Konvencio ĝenerale estas obeata de la LEA-oj same kiel de ni, kvankam ni dezirus, ke la redaktoroj de la diversaj LEA-organoj klopodu ankoraŭ pli multe en la direkto presigi nacilingvan propagandan materialon k rezervi ekskluzive al SAT la peresperantan laboron. Sed pri unu grava malobeo ni devas noti fakton, kiu rezultigis en la pridiskuto inter la koncernatoj malsamopiniecon principan: SEU — kiu akceptis la Konvencion en Göteborg senrezerve, kiel unu membro en la Ligo de LEA-oj — eldonis dume esperantan literaturon (Varankin, Teorio de Esperanto). SEU provas pravigi sian agadon per la aserto, ke ĝi ne estas ordinara LEA k ne reprezentas unulingvan teritorion, sed ampleksas multnombrajn lingvo-regionojn. Tiu stato ne forigas la fakton, ke esperantlingva verko kiel "Teorio de Esperanto" povas utili ne nur en Sovetio, sed en la tuta Esperantio k sekve laŭ la Göteborga Konvencio SAT devus ĝin eldoni. Same persiste malobeas al la Konvencio k al la Statuto kelkaj grupoj el SAT-anoj en Britio (Londono, Edinburgo k. a.), kiuj principe ignoras la ekzistadon de BLEA k deziras atribui la por- k per-esperantan laboron al "SAT-grupoj". Malgraŭ niaj korespondaj atentigoj ni ĝis nun ne atingis ĉe ili agnoskon de la Kongres-decidoj. Kontraŭ tia nedisciplino ni ne povis ion pozitivan entrepreni, ĉar nenio en la Konvencio devigas SAT-anojn aliĝi al iu LEA, estas nur rekomendo.

La Novjorkaj SAT-anoj laŭdinde montris pli da konsentemo k decidis ankaŭ labori laŭ la direktivoj montritaj de la VIII-a Kongreso; tiucele ili aliĝis la strukturon de sia grupo.

Rilatoj inter SAT k la t. n. neŭtrala movado. Ni povis konstati per la paroliloj de la neŭtrala movado, ĝiaj gazetoj, ke SAT akiris al si alian pozicion ol en pli fruaj jaroj. Ĝia kresko, ĝia plifortiĝo influis konsiderinde la sintenon de la ne tre rapide disvolviĝanta neŭtrala movado. Antaŭe la metodo de neŭtralaj

[1] La promeso estas lojale plenumita, kiel oni povas konstati en la aŭgusta n-o de "EA".

gazetoj estis prisilenti SAT-on. Hodiaŭ ili ĝenerale agnoskas la progresojn k plenumojn de nia movado preskaŭ senescepte, necesas tamen noti, ke en la lastaj n-oj de "Esperanto" de UEA troviĝas neniu informo pri nia kongreso... Niaj rilatoj estis precipe m o n a j, ĉar ni devis reklami en la pli gravaj gazetoj por niaj eldonoj (ekzemple ni aldonis privortaran prospekton al la gazeto "Esperanto"). Ankaŭ en la Antverpena neŭtrala mondkongreso montriĝis okazo sukcese vendi niajn eldonaĵojn. Tiu reklamado en neŭtralaj gazetoj pri niaj eldonoj okazas ĉefe sub la vidpunkto, ke restas ankoraŭ konsiderinda nombro da proletaj elementoj en la neŭtrala movado. Tial ankaŭ hodiaŭ plue restas aktuala nia agitvorto: "For la Neŭtralismon!" La reklamadan taskon plenumis laŭdinde K-do G. P. de Bruin.

Krom tio niaj rilatoj estis l i n g v a j, kiom rilatas al la eldono de nia Plena Vortaro, pri kio estos parolata aparte. Cetere niaj principoj k nia taktiko rilate al la neŭtrala movado restis la samaj; ni nur rilatas kun ĝiaj institucioj en lingva, t. e. teknika kampo.

Redakcio. Administracio. Ĉar la raportoj pri Redakcio kaj Administracio estas aparte prezentataj de la koncernaj fakuloj, temas ĉi tie nur pri la oficista demando, kiu estas reguligata de la Pl. K. Dungita kiel redaktoro de "S-ulo" restis dum la tuta jaro K-do N. Bartelmes, kies salajro depost 1. jan. 1929 estis m o n a t e 1000 frankoj fr. plus la loĝejo (900 antaŭe) kaŭze de la ĝenerala plialtiĝo de salajrotarifoj en Francio k plikariĝo de l' vivkostoj. Lia laboro plenumiĝis en intima kontakto kun la gvidanto de "S-ulo", K-do Lanti, kiu lasta estas devigata dediĉi sian tutan liberan tempon (ekster sia panakira laboro) 1. al la gvidado de l' Asocio, helpate en la sekretariaj laboroj de K-doj B.... k Bartelmes; 2. al la gvidado de "S-ulo", legante k prijuĝante la valoron de l' ricevataj manuskriptoj, konsiderante la ĝeneralan aranĝon de la "S-ulo"-n-oj, konsilante k sugestante ktp.; 3. al la kontrolado de l' Vortara verkado, treege temporaba k streĉa laboro. Ankaŭ la agado de K-do Bartelmes ne limiĝis je la nura teknika prilaborado de l' nuna 12-paĝa "S-ulo" k "La Lernanto", sed li ankaŭ sekretariis, skribante la korespondaĵojn por Redakcio k parte la Asocio. Li plie korektas la presprovaĵojn de "La Nova Epoko" k de "La Lernanto".

En la redaktado de "La Nova Epoko" ni nun definitive transpasis la malfacilojn en la plenumo de tiu laboro, kiujn ni renkontis antaŭjare k parte ankoraŭ en la raport-jaro (ĝis fine de 1928). Rilate al la pliampleksigo de la revuo ni devas danki al SEU, kiu pagis la 16 pliajn paĝojn, sur kiuj estas presita la traduko de la verko de K-do Drezen: H i s t o r i o d e l a M o n d o - l i n g v o.

Jam en la lastaj monatoj de 1928 la laboro en la Administrejo fariĝis troa por tri dungitaj funkciantoj. Krome eksiĝis el sia ofico K-dino Lehmann, tiel ke dum longa tempo K-do Lerĥner troviĝis sola kun sia filino antaŭ giganta laboro. La Administracia Komisiono tiutempe ankoraŭ funkcianta ne klopodis solvi la problemon k tiel la Direkcio mem devis sin okupi pri la afero. En niaj klopodoj por trovi spertan librotenist(in)on ni metis anoncon en "S-ulo", sed fine — ĉar ne tuj prezentiĝis solvo — translasis al K-do Lerĥner mem la zorgon decidi pri la dungindeco de tiu aŭ alia K-do. Fine K-do Speth (München) akceptis veni al Leipzig, sed pro privata afero poste ne povis iri k lin anstataŭis K-do Platiel, kiu nun prizorgas la librotenadon ĉe la Administracio. Sed li enoficiĝis nur je la 8. 5. 29. Dum sufiĉe longa tempo pro troa okupiteco la Administranto ne povis tiel rapide plenumi siajn taskojn kiel en antaŭaj jaroj. La salajro de K-do Lerĥner estas: 70 mk.g.; tiu de K-do Platiel: 67.20 mk.g.; tiu de K-do Thieme: 35.20 mk.g.; de K-dino Lerĥner: 34.85 mk.g. (semajne).

La SAT-anaro devas scii, ke tiu laŭtarifa salajro ne rilatas al 8-hora labortempo k ke la div. asekurojn ili mem pagas; ĉiuj dungitoj k oficistoj dediĉas sian tutan laborforton al nia afero.

Administracia Komisiono. K-do Riĥter, prezidanto de la novelektita je 2. majo 1928 Admin. Komisiono, plendis al ni kelkfoje dum la raportjaro pri malfaciloj por kunvenigi la komisionanojn. Fine li sciigis, ke li restis sola kun K-do Bauer. Ni decidis tiam, en okazo de neeblo funkciigi normale la A. K., ke K-do Riĥter provu mem kun K-do Bauer plenumi la funkciojn de reviziantoj, likvidante la A. K. Fine, komence de marto 1929 K-do Riĥter informis nin pri eksiĝo el ĉiuj postenoj pro neakordiĝo kun la opinio de l' ceteraj Pl. Komitatanoj pri aranĝo de l' reviziado en la Administracio. Sekve fakte hodiaŭ ne ekzistas Adm. Kom., ĉar la spertoj montris, ke ĝi en la laŭstatuta formo ne estas vivigebla. Por normale kontroligi la kontlibrojn de nia Administranto, ni proponas al la Kongreso anstataŭ la nuna Adm. Komisiono, kiu konsistis el nefakuloj, funkciigi kontroladon plurfojan dumjare fare de du profesiaj fakuloj. Krom tiu kontrolado povos funkcii ankaŭ dum kongresoj reviziado fare de SAT-anoj spertaj en librotenado.

Kontrolkomitato. Ĉi tiu instanco de la SAT-aparato estis formenda en Berlin laŭ la decido ĉe la lasta kongreso. La Kontrolkomitato konsistiĝis definitive en la laŭstatuta formo en februaro 1929. La nomoj de la elektitaj K-doj estas konigitaj en "S-ulo". Pri ilia agado ni sendube aŭdos de ili apartan raporton de la sekretario K-do Vildebrand. Tiu raporto ne venis ĝis nun en niajn manojn.

Jarlibro. La Plenum-Komitato submetiĝis al la Göteborga decido, kvankam la Direkcianoj persone opiniis preferinde lasi la adresaron en ĝia ĝisnuna formo k estis subtenataj en tio per multaj rezolucioj k deziresprimoj de SAT-rondoj k izoluloj, kiuj estis presataj en "S-ulo". Krome ni akceptis unuanime laŭ la p r a k t i k a flanko la vidpunkton de nia Administranto rilate al aperdato de la Jarlibro. Ni rimarkigas, ke tiun vidpunkton cetere dum la Göteborga Kongreso neniu kontraŭstaris. Pri enpreso de l' tuta nomaro estos parolate ĉe pritrakto de l' unua kongres-propono (prezentita de K-do Bubu [Boubou]). Ni mem nur volas akcenti, ke en tiu punkto ni agis lojale laŭ la decido de la lasta kongreso.

Programo de SAT. Pro manko de tempo k neprepariteco de l' plej multaj kongrespartoprenantoj ĉe la Göteborga Kongreso ne estis diskutata la programprojekto en tiu Kongreso k sekve ankaŭ ne povis esti aŭskultata la opinio de la Direkcio de SAT pri tiu demando, kiun K-do Lanti, la sola reprezentanto de l' Direkcio ĉeestanta en Göteborg, devus prezenti en ĝia nomo. Tial, por konigi nian vidpunkton k okaze de la deziresprimo de la Kongreso pridiskuti la demandon dum la intertempo — la raport-jaro — poste la "Rimarkoj" de la Direkcio al la programdemando presiĝis kune kun la teksto ellaborita de la Programkomisiono (pli bone dirite: de kelkaj ĝiaj membroj, kiuj funkciis) aldone al la "Kongresa Protokolaro". Sekve de tiu aperigo k de la broŝuro "La Laborista Esperantismo", kiu preskaŭ samtempe aperis k kies verkadon aprobis la K-doj de la Direkcio, ĉar ili konstatis, ĝian nepran bezonon, pro tio, ke ĉe multaj K-doj mankas iom profunda ekkono pri celoj k taskoj de nia organizo, — okazis sur la paĝoj de "S-ulo" 5 monatojn daŭranta diskutado, kiu tamen ne ĉiam severe rilatis al la diskuttemo mem, nome la projekto de la Programkomisiono k la Direkciaj rimarkoj, sed pli vere degeneris en polemikadon. Tial post tiom da tempo, post regula aperigo de multa materialo ricevita en ĉiusemajna n-o de "S-ulo", — la Direkcio decidis ĉesigi la diskuton. Ĝi sin bazis sur la deziresprimo de multaj SAT-anoj, kiuj estis tedataj per tia disputado k per la fakto, ke la restanta materialo ne enhavis novajn argumentojn. Ĉi tie ne estas la taŭga momento por okupi sin pri solvo de tiu demando mem — tio okazos ĉe pritrakto de la diversaj proponoj prezentitaj al la Kongreso pri la problemo: Ĉi tie ni nur devas fari konstaton, tiun, ke ni devis dediĉi multajn, multegajn horojn da multvalora tempo al tiu senrezulta, negativa laboro (ĉar ion pozitivan ni ja ne atingis, escepte tion, ke multaj K-doj estas naŭzitaj de tia disputado). Kaj ni petas niaflanke la Kongresanojn fari la konstaton, ke ni lojale procedis, permesante larĝan diskutadon en la organo k ĉesigante ĝin nur, kiam nenio nova plu estis esprimata k la opozicio inter la legantoj de "S-ulo" kontraŭ tiu temo grandegiĝis. Ni petas vin konstati ankaŭ, ke neniam nia persona vidpunkto decidis en la diskutado, sed ke ni s e n ŝ a n ĝ e presigis la tutan ricevitan diskut-materialon, kvankam ofte en ĝi estis uzataj akraj eĉ ofendaj esprimmanieroj. Konstati ankaŭ, ke, se ni mem deklaris responde nian vidpunkton, tio okazis en necesa defendo de la interesoj de nia Asocio, kies unueco k supertendenceco estis pli ol unu fojon minacata, malpli per la naturo de la temo mem de l' diskutado, sed per la maniero de l' pritrakto. Oni notu ĉe tiu okazo en la memoron, ke la iniciato de la tuta program-afero n e venis de la Direkcio de SAT.

Dume ni n e ricevis de la sekretario de l' Komisiono, K-do H. Muravkin, raporton pri la stato de la Komisionaj laboroj dum la tuta raport-jaro. Ni ricevis de tiu K-do nur artikolon sub titolo: "Kial SAT bezonas programon?". Ni respondis al la aŭtoro, ke ni publikigos nur novan tekston de programo, se antaŭe ĝi estis diskutita inter la Programkomisionanoj k ricevis ĉe ili aprobon. Tian tekston K-do Muravkin ne havigis al ni. Dume venis proponoj de diversaj SAT-rondoj pri malakcepto de ĉia ajn programo. La Kongreso decidos pri tiuj proponoj.

Altlernejo ĉe la Kongreso. Pri tiu aranĝo ni eksciis nur per la Kongresa Komitato. La instigo ne venis de ni; sed kiel ni subtenas ĉiujn celadojn, kiuj povas doni ion novan al niaj aranĝoj, ni ankaŭ konsentis principe tiun aranĝon, kiu cetere anstataŭas la Kulturkonferencon, lastjare okazigita ĉe la Kongreso k ĉi-jare ne okazanta pro manko de K-do preta transpreni la organizadon k ŝajna manko de konfido je la sukceso de tiu provo. Ankaŭ la "altlernejo" estas nur eksperimento, kiu — ni esperu — montros bonajn rezultojn.

Kongreso. La Kongr. Komitato en Leipzig agis en intima kontakto kun la Direkcio de SAT, kiu lasta pritraktis en siaj kunsidoj ĉiujn protokolojn de la K. K. k ebligis al la K. K. plej vastan propagandon en la oficiala organo per multnombraj "Komunikoj" k artikoloj pri la kongresurbo ktp. (multe pli ol en niaj antaŭaj Kongresoj!).

SAT k frataj organizoj. SAT estis reprezentata en la kongresoj de FEO, St. Etienne (marto 1929), ALLE, Wien (marto 1929), Socialista Junulara Internacio Wien (julio 1929), Ekzekutiva Kunsido por preparo de kongreso de Eksmilitantoj k parencaj organizoj en Berlin (majo 1929). Ni sendis salutleterojn al Hispana

Soc. Partio, Sveda Soc. dem. Partio, Partitago de Germana Soc. dem. partio, Kongreso de ITF. Okaze de la 9-a Kongreso ni sendis invitleterojn al la plej gravaj centraj organizoj de la diversaj politikaj k sindikataj Internacioj.

Sekvas K-do Płatiel, kiu anstataŭas K-don Lerĥner en la legado de l' administracia raporto:

RAPORTO DE LA ADMINISTRACIO DE SAT (1928/1929)

Situacio de la membraro. — La statistiko estas farita la 1. julio 1929. Sed ni konsideru, ke la membrostato preskaŭ ĉiutage varias k tio ankaŭ rilatas al la abonantoj. — La ciferoj post la streko indikas la pasivajn membrojn.: Afriko 1, Alĝerio 7/11, Argentino 24/1, Aŭstralio 1, Aŭstrio 217/4, Belgio 98/7, Brazilio 2, Britio 192/8, Bulgario 40/7, Ĉeĥoslovakio 142/5, Ĉinio 3, Dancigo 6/1, Danio 7, Estonio 28/1, Finnlando 47/2, Francio 310/8, Germanio 1704/26, Hispanio 131/4, Hindio 1, Hungario 41/1, Hindio 1, Islando 1/1, Italio 2, Japanio 57/1, Jugoslavio 50/2, Kanado 5, Latvio 44/1, Litovio 9/1, Luksemburgo 1, Maroko 1, Nederlando 121/8, Norvegio 37/3, Nov-Zelando 2, Persio 1, Polio 62, Portugalio 19, Rumanio 12, Saarlando 5, Sovetio 1478/40, Sud-Afriko 1/3, Sud-Ameriko 1, Svedio 178/1, Svisio 32/1, Turkio 1, Urugvajo 3, Usono 53/9.

Sume rekotizis aŭ novaliĝis 5179 aktivaj k 157 pasivaj membroj = 5336 kune. — Ne rekotizis ĝis nun 2531 aktivaj k 514 pasivaj membroj. Pasintjare rekotizis ĝis la sama dato sume 6170 membroj. Ni do povas konstati, ke la nombro de la rekotizintoj ĉi jare estas malpli granda ol tiu de la pasinta jaro. Pasintjare kune kun la nepagintoj ni havis **8167** k ĉi jare kun la nepagintoj ni havas sume **8381** membrojn. El tio ni vidas, ke inter la membraro estas ĉiam granda indiferenteco k tio estas tute klarigebla. Se oni konsideras, ke la SAT-anoj estu la plej perfektaj k kapablaj inter la tiel nomataj internaciistoj, tiam oni ankaŭ povus postuli de la "aktivaj" membroj pli da aktiveco. Sed mi ne povas imagi al mi SAT-anon "aktivan", kiu dum la tuta jaro nur havas dufoje kontakton kun la Asocio, t. e. por pagi la kotizon k poste ricevi la jarlibron. Jen la tuta aktiveco de la "aktivaj" membroj. Ni devas trovi rimedon por ekstermi ĉi tiun malsanon en nia organizo. Ja, kion donas la aktivaj membroj al la Asocio, se ili ne estas abonantoj al la oficiala organo de SAT? Tute nenion! Por la kotizo, kiun oni pagas, la membro ricevas: membrokarton k Jarlibron. Do oni povas diri, ke la n u r a j "aktivaj" membroj absolute nenion donas al la Asocio. Nun oni poste pripensu la voĉdonadon. Membroj, kiuj havas dum la tuta jaro nenian kontakton kun la asocio, neniam legas ion pri la vivo de la Asocio mem, devas poste voĉdoni pri gravaj punktoj. Ĉu vi povas imagi ĉi tiujn voĉdon-rezultojn? Plue en la statuto estas skribite, ke ĉiu aktiva membro "devas" voĉdoni. Nu, K-doj, post kelkaj tagoj estas fino de la referendumo k ĝis nun voĉdonis ĝuste 1785?!

Dum la pasintaj jaroj la jarlibro-afero ĉiam kaŭzis al ni kapdolorojn. Ĉi-jare, ĉar ĝi aperos nur en decembro, nia situacio estas iom pli bona. Ni esperu, ke la kongreso trovu vojon ankaŭ por klarigi ĉi tiun aferon kun la jarlibro, ĉar la tempo urĝas, ke ni vidu klare en tio. Estas jam faritaj diversaj proponoj rilate la jarlibron k el la ĝis nun faritaj proponoj k presitaj artikoloj oni povas konstati, ke la emo estas granda por presigo de la tuta adresaro en la jarlibro. Sed jam nun la administranto atentigas vin, ke vi ankaŭ konsideru la financan flankon de ĉi tiu vunda punkto. Pasintan jaron de la administracio estas proponita ²/₃ da plialtigo de la kotizo. La kongreso en Göteborg ja ne akceptis tion k nur plialtigis la kotizon je ¹/₃ indulgante la malbonvalutajn landojn k decidis ne presi ĉiujn adresojn: Kiu deziras la presigon de la adreso en la jarlibro, aparte pagu. La presigo de ĉiuj adresoj ne nur havas bonajn flankojn, sed ankaŭ malbonajn k pri tio ni diskutu dum la Kongreso. Post sufiĉa filtrado de la paroloj ni certe trovos la solvon.

Sennaciulo. — La statistiko estas farita laŭ n-o 247 ekspedita fine de junio 1929. La ciferoj post la streko montras la kvanton de la pasinta jaro: Afriko —/1, Alĝerio 6/8, Argentino 21/14, Aŭstralio 2/1, Aŭstrio 205/231, Belgio 81/73, Brazilio 6/2, Britio 166/172, Bulgario 5/—, Ĉeĥoslovakio 112/125, Ĉinio 3/6, Ĉilo 1/—, Danio 2/5, Dancigo 3/3, Estonio 17/15, Finnlando 21/15, Francio 287/215, Germanio 1059/950, Hispanio 80/53, Hindio 1/—, Hungario 4/36, Hindo-Ĉinio 1/—, Islando 2/2, Italio 1/1, Japanio 62/30, Jugoslavio 30/48, Kanado 9/3, Latvio 19/44, Luksemburgo 1/—, Nederlando 105/73, Norvegio 24/15, Persio 2/6, Polio 75/52, Portugalio 15/12, Rumanio 11/3, Saarlando 5/3, Sovetio 1053/872, Sud-Afriko 1/1, Svedio 106/56, Svisio 29/31, Urugvajo 2/2, Usono 55/35.

Sume ni ekspedis de n-o 247, inkluzive la vendekzempleroj, **3690** ekz. Pasintan jaron ni ekspedis dum la sama dato **3218** ekz. Ni do havas ĉi-jare pluson de **472** ekz. Ĉu ĉi tiu rezulto povas nin kontentigi? Tute ne! La redakcio k administracio faris sian eblon; ni pleje streĉis niajn fortojn, ankaŭ finance, k se la K-doj ne klopodas, ke SAT havu almenaŭ 4000 pagantajn abonantojn, tiam estas dube, ĉu ni povos daŭrigi la 12-paĝecon de "S-ulo". K-doj, komparu profunde ambaŭ statistikojn t. e. tiun de la abonantoj k tiun de la membroj. Plie konsideru, ke inter la abonantoj estas sufiĉe granda parto da tiaj, kiuj ne estas membroj de SAT. Estas ja fakto, ke la teroro en la blankaj landoj ankaŭ multege malhelpas nian evoluon de la abonantaro, sed ĝuste ĉi tiu agmaniero de la faŝistoj devus esti instigilo por ni varbi abonantojn en la landoj ankoraŭ ne infektitaj de la faŝismo.

Dum la lasta vintro trafis nin plendoj ĉefe el Sovetio pri prokrasto de la gazetekspedado. Tiu prokrasto ĉefe okazis pro tio, ke ni en la administrejo estis plej ekstreme okupitaj pro manko de laborforto k ni havis nian plej grandan zorgon almenaŭ normale funkciigi la ĝeneralan ekspedadon de "S-ulo".

La kreskado de la abonantaro ĝenerale, kompreneble necesigis alian adresigprocedon. Dum la pasinta jaro oni skribis ĉiujn adresilojn per la skribmaŝino, kio kaŭzis multe da laboro. Ni do aĉetis komence de novembro adresmaŝinon, kiu multe helpas pli rapidigi la adresadon. Ankaŭ ĉi tiu procedo donas al ni la garantion, ke neniu gazeto povas esti forgesata. Ĉiu adresplato aŭtomate transiras la premejon k la adreso estas tuj presata sur la banderolo mem. Konsekvence, se iuj abonantoj ne ricevis iun n-on, tiam neniam kulpas la administracio, ĉar iu forgeso en tiu ĉi rilato ne povas okazi. Kulpas sole la poŝtservo. Ekzemple kun n-o 247 certe okazis iu fuŝo en la poŝto, ĉar multaj K-doj ne ricevis ĉi tiun n-on. Ni jam sendis plendon ĉi-rilatan al nia poŝtejo. Resume, ne povas okazi, ke, se iu abonis ¼ jaron al "S-ulo", ricevas regule 8 n-ojn, 1 n-on li ne ricevas k poste denove ricevas 4 n-ojn. Se eraroj okazas (k erarojn faras ĉiu homo), tiam ni bonvole akceptas la vangfrapon k korektas la eraron, sed se ni ne kulpas, ni ankaŭ ne transprenas iun ajn respondecon. — Rilate "La Lernanto-n" ni ne bezonas diri multajn vortojn, ĉar la situacio estas preskaŭ la sama kiel pasintjare. — Necesas diri ankoraŭ iom pri la adresŝanĝoj. Laŭ nia konvinko k sperto oni ofte arbitre ŝanĝas siajn adresojn k en ĉi tiu afero niaj K-doj en Sovetio estas tre fervoraj. Ni petas la K-dojn informi nin, se la adreso ne restas konstanta, tiam ni almenaŭ evitas nenecesajn elspezojn por la ŝanĝo de la adresplatoj. Ekzistas K-doj, kiuj indikas foje la poŝtkeston, poste ĉe la renovigo de la abono la hejman aŭ laborejan adreson. Tiu daŭra ŝanĝado de la adreso kaŭzas en la adm. multe da laboro k elspezoj.

La Nova Epoko. — De n-o 9 ni ekspedis jenan kvanton, la ciferoj post la streko indikas la kvanton pasintjaran: Afriko —/1, Alĝerio —/1, Argentino 16/14, Aŭstralio 1/1, Aŭstrio 72/59, Belgio 50/29, Brazilio 3/2, Britio 64/54, Bulgario 29/5, Ĉeĥoslovakio 28/27, Ĉinio 3/2, Ĉilo 1/—, Dancigo 1/1, Danio 1/3, Egiptio —/1, Estonio 10/10, Finnlando 13/2, Francio 136/98, Germanio 241/198, Grekio —/2, Hispanio 33/21, Hindio —/1, Hungario 1/—, Hindo-Ĉinio —/1, Islando 3/3, Italio 1/—, Japanio 53/24, Jugoslavio 18/16, Kanado 6/3, Latvio 13/17, Litovio 1/—, Luksemburgo 1/—, Nederlando 26/13, Norvegio 10/4, Nov-Zelando —/1, Palestino —/1, Persio 1/1, Polio 34/30, Portugalio 8/5, Rumanio 1/3, Saarlando 1/1, Sovetio 477/352, Sud-Afriko 1/2, Svedio 39/12, Svisio 10/10, Turkio —/1, Urugvajo 2/1, Usono 17/11.

Sume ni ekspedis 1439, pasintjare 1047 ekz. Ni do povas konstati pluson de **392** ekz. Ĉu ĉi tiu rezulto povas kontentigi nin? Certe ne! Konsiderante, ke ĉi tiu revuo estas duone donacita al la abonantoj, dank' al la monhelpo de CK de SEU, oni povus opinii, ke ĉi tiu revuo almenaŭ devus havi, laŭ la kvantoj de la aktivaj membroj, 3000 abonantojn. Multe helpis al la ĝisnuna kresko de la abonantaro la artikolo de K-do Drezen. Intertempe elĉerpiĝis kelkaj n-oj de "LNE", k ni konsolas niajn novajn abonantojn per tio, ke post apero de la Drezena parto, ĉi tiu tuta verko aperos en libroformo. Ni do esperu, ke "LNE" trovu pli da interesuloj inter nia membraro, por ke ankaŭ ĉi tiu revuo donu iomete da profito al nia movado.

Eldona fako de SAT. — Konsiderante nian libroprovizon oni venas al la konkludo, ke niaj membroj ne sufiĉe interesas sin pri ĉi tiu fako. Ĉu povus okazi, ke inter 6 ĝis 8 mil membroj ni bezonas vendotempon de kelkaj jaroj por finvendi libron je eldonkvanto da 2000 ekz.?? Kaj ni ne forgesu, ke eĉ granda parto de la neŭtralaj esp-istoj aĉetas niajn librojn. Tio pruvas, ke granda parto de la membroj tute ne aĉetas niajn librojn. Tiu ĉi aĉetinerteco kompreneble neniam povas antaŭenpuŝi nian librofakon, ĉar ni devas konsideri, ke eldonitaj libroj poste kuŝas en la provizejo longan tempon kaj prezentas la tielnomatan "s e n p r o d u k t i v a n k a p i t a l o n". Certe ĉi tiu inerteco en la aĉeto de libroj estas ja ĝenerala inter la esp-istaro, sed ĉu ni lab. esp-istoj sekvu la ekzemplon de la "neŭtraluloj"? Certe ni ne deziras tion, K-doj, k ni esperu, ke la venonta jarraporto pri ĉi tiu fako tute kontentigu nin. Niaj pulmoj estas niaj libroj kaj ju pli ni debitas, des pli bone por nia plua evoluforto. Tre grava malhelpo en la evoluo de nia libraro estis pasintjare la malfacila ricevo de nia mono el Sovetio. Tiuj cirkonstancoj cerbumigis nin, kiel aranĝi nian aferon kun Sovetio, ĉar daŭre kuŝis tie granda parto de nia mono (pli ol 10 000 mk. g.!), kiun ni ne povis ricevi pro la dekreto de la Soveta ŝtato. Ni do finfine, post longa traktado pri la principaj demandoj, decidis eldoni parton de niaj libroj en Moskvo, por ke almenaŭ ĉi tiu mono ne kuŝu tie senproduktige.

Statistiko pri Librofako de Eldonkooperativo de SAT 1928/29

Nomo de l' libro	Kioma Eld.	Eldon-jaro	Eldon-kvanto	Provizo 1927/28	Provizo 1928/29	Venditaj 1928/29	Venditaj 1927/28	Valoro en mk. g.
ABC de Sennaciismo	2-a	1926	1500	1519	1223	296	281	211.50
Diablidoj	1-a	1929	2000	2000	1345	655	—	360.40
Dokumentoj de Komunismo	1-a	1924	2000	577	376	201	78	188.–
Eklumo en la abismo	1-a	1923	2200	508	312	196	227	124.80
El la Mondbildo	1-a	1925	2000	882	711	171	132	123.–
En Katenoj de Maljusteco	1-a	1926	1500	955	844	111	253	126.60
Etiko	1-a	1926	2000	991	817	174	251	424.80
Fabeloj	1-a	1928	4000	4000	2243	1757	—	426.10
For la Neŭtralismon	3-a	1928	3000	2875	2568	307	160	256.80
Faŭsto	1-a	1923	2300	39	9	30	95	5.40
Gromada	1-a	1928	2025	2025	1056	969	—	247.10
Je la nomo de l' vivo (ord.) / Je la nomo de l' vivo (luksa)	1-a	1927	2000	842	180 322	340	289	190.80 450.—
Kandid	1-a	1929	2000	2000	1857	143	—	1392.70
Karl Marks, lia vivo k. verko	1-a	1926	2000	560	446	114	470	120.40
Kvardek Jaroj	1-a	1927	1000	700	511	189	300	51.10
Laborkajero de Petro	1-a	1926	10000	6205	5282	923	1266	501.70
La Kemio de l' Universo	1-a	1925	2000	847	635	212	146	151.10
La Komunist. Manifesto	2-a	1925	2000	1175	898	277	203	242.40
La laborista Esperantismo	1-a	1928	3000	3000	1739	1261	—	243.40
Morto de Blanjo	1-a	1925	2000	976	813	163	207	255.–
La Vojo al Scienco	1-a	1928	2000	2000	1727	273	—	500.80
Malgranda Terbiblio	1-a	1924	1500	603	422	181	182	379.80
Ni legu	3-a	1926	3000	1761	1111	650	755	277.70
Nur volu	2-a	1926	2000	950	593	357	1050	169.50
Orienta Blovo	1-a	1926	1500	884	780	104	153	71.70
Petro	3-a	1928	10000	6139	1616	4523	6291	290.80
Petro kun rusl. ŝlosilo	1-a	1926	2000	1000	493	507	1000	108.40
Proletaria Kantaro	1-a	1924	3000	1687	1294	393	380	1035.20
Prologo	1-a	1929	2000	2000	1686	314	—	539.50
Protokolaro 1928	1-a	1928	1500	1500	271	1229	–	154.40
Ruĝo kaj Blanko	1-a	1926	2000	1142	919	223	108	285.80
Ŝekspsikologio	1-a	1926	2000	1121	873	248	184	258.40
Ŝtato kaj Revolucio	1-a	1926	2000	731	530	201	487	243.80
Tri verkoj de Tolstoi	1-a	1922	2000	2	—	2	84	–
	—	—	–	54196	36502	17694	15032	10408.90

Statistiko pri poŝtkartoj ilustritaj kaj insignoj 1928/29

	Eldon-jaro	Kvanto	Provizo 1927/28	Provizo 1928/29	Vend.	Vend. lastjare
Poŝtkartoj ilustr. . mk. 2752.70	1927	181 300	165 664	157 300	8 364	15 636
Insignoj						
grandaj . . . . . . mk. 312.60	1929	2 878	—	1 457	1 421	1 178
malgrandaj . . . . mk. 21.60	?	—	644	144	500	708
334.20						

Fremdaj Libroj sume: mk. g. 180.—

Insignoj. — Komence de ĉi tiu jaro ni eldonis nian novan insignon, kiu trovis plaĉon ĉe multaj K-doj. Baldaŭ la provizo estos elĉerpita k ni jam mendis denove 2000 ekz. — Komplikaĵojn rilate la dissendon de niaj insignoj, il. pk., kovertoj ni havas kun Sovetio. Laŭ leĝo en Sovetio ĉi tiuj objektoj ne estas libere importeblaj k sekve la doganoficistoj plejparte agas laŭ la dogantarifo, kiu estas tiom alta, ke la K-doj prefere rifuzas la akcepton. Tiuj ĉi pakaĵetoj poste revenas k la afranko estas forĵetita. — La samo rilatas al niaj ilustritaj poŝtkartoj. De ĉi tiu lasta varo ni havas ankoraŭ sufiĉe grandan kvanton k se la K-doj ĉe festoj k manifestacioj helpus por vendi ioman kvanton ni povus esti certaj, ke ĉi tiu servo donus al la Asocio ioman profiton.

Akcibiletoj. — Konsiderante ĉi tiun instalon ni same devas konstati, ke ĝi ne estas sufiĉe uzata. Ekz. dum la kuranta jaro ni vendis el la serio A 127 biletojn k naŭ oni resendis kiel pagilojn. El la serio B ni vendis 140 k resendis 30 kiel pagilojn. Ne nur, ke ĉi tiu aĉeto de niaj akcibiletoj, multe helpas al nia eldonkooperativo, sed ĉi tiu aranĝo ankaŭ havas alian pli bonan flankon. Ni do supozu, ke iu membro dum difinita tempo havis laboron k dum ĉi tiu tempo aĉetis kelkajn akcibiletojn. Li do estas kvazaŭ asekurita ĉe SAT je plua ricevo de la gazetoj k ankaŭ membreco dum tempo malbona. Multaj K-doj jam spertis ĉi tiun akceptindan aranĝon k ofte aĉetas niajn akcibiletojn, por poste, kiam ili estas senlaboraj, uzi ilin kiel abonilojn. Aliaj K-doj aĉetas niajn akcibiletojn kiel ŝparilojn, ĉar ni estas pretaj ĉiutempe repagi la koncernan sumon, se akcihava K-do deziras tion. Por ĉi tiuj K-doj, kiuj jam havas siajn akcibiletojn dum daŭro de tri jaroj ni instalis apartan konton kun rentumo; ili do posedas ĉiutempe iom da mono en la organizo. Pri ĝi ili povas ĉiutempe disponi. K-doj, imitu ĉi tiun ekzemplon de kelkaj k vi per unu bato trafas du muŝojn.

Resume. Ni ne dubas, ke ĝis apero de la jarlibro multaj K-doj ankoraŭ rekotizos k certe ili superos la nombron de la pasinta jaro. — Kresko de la abonantaro al "S-ulo" k "LNE", kresko de nia librofako, ĉiuj impulsoj estas faktoroj kapablaj pliprogresigi nian movadon k . . . laboron. Ĉefe la lasta jaro postulis de ni en la administrejo, despli, ĉar dum naŭ semajnoj nur estis 2 personoj, plej grandan oferemon nian. La tagan labortempon ni ne volas citi, pro taktikaj kaŭzoj. Sed ni nur citu, ke krom niaj administraj laboroj ni mem ekspedis "S-ulon" k "LNE". Krome ni ankaŭ legis la presprovaĵojn de "S-ulo". Tiun ĉi laboron, same la librotenan laboron ni nur povis fari dum la nokto. Ke tion dum pli longa tempo neniu povas elteni, estas memkompreneble. Kaj kiu ĉeestis la Lyonan Kongreson, certe povas rememori, ke jam siatempe la administranto pledis por helpo, sed niaj diroj ne estis akceptitaj. Konsekvence, kiam K-dino Lehmann foriris k nur 2 personoj estis en la administrejo, ĝuste dum tempo, kiam nia SAT-vivo pleje pulsas, ni dronis en laboro, k malgraŭ la plej rapida k longega laboro ni ne sukcesis ĉion kontentige funkciigi. Kompreneble K-do Lerchner neniel transprenas la respondecon pri ĉi tiu nefunkciado de la aparato, ĉar oni simple ne obeis al liaj konsiloj.

Ekzistas homoj, kiuj volonte iom babilas kaj kredas sin kapablaj per la buŝo, sed en la praktiko montriĝas tute alia bildo k poste ili silente forrestas. Ni klopodu ĉiuj esti praktikuloj k ne teoriuloj k ĉikanemuloj. Nur paŝante sincere rektan vojon, ni sukcesos antaŭenpuŝi nian movadon. En ĉi tiu senco mi donas la adm. raporton k esperas, ke la sekvontan ni povas skribi en pli granda ejo ol la ĝisnuna.

Post tio K-do Platiel komunikas kelkajn ciferojn el la bilanco k pri la kasa stato aktuala. Li detaligas iom la finsumon de la spezoj k rimarkigas, ke la ŝajna malprofito ĉe la libroj (elspezo pli granda ol enspezo) havas nenian signifon timigan, ĉar ni freŝdate pagis nov-eldonitajn librojn jus aperintajn, kiuj ankoraŭ ne havigis al ni enspezon.

Nun K-do D e m i d j u k prezentas je la nomo de K-do Nekrasov la raporton de la literatura redaktoro de

"LA NOVA EPOKO"

Kiam estis komencita la nuna eldonjaro, la redakcio de "La Nova Epoko" havis planon de ne nur ekstera, sed ankaŭ k ĉefe interna reorganizo de la revuo. Estis projektitaj plilarĝigo de la literatura materialo, enkonduko de vasta literatura observado, korespondo kun legantaro k kunlaborantaro, speciala prilaboro de apartaj temoj k diversaj aliaj aferoj. Realigo de tiu ĉi plano permesus fari "La Novan Epokon" riĉenhava kaj altinteresa revuo kun nekontestebla valoro por nia movado. Notinda estas ankaŭ la fakto, ke ĉiuj necesaj premisoj por facila realigo de tiu ĉi plano ekzistas kontante en niaj manoj: firma eldonejo en la personaĵo de Eldona Fako Kooperativa de SAT, jam sepjara senĉesa aperado de nia organo, riĉa sperto k bonegaj rezultoj de la laboro en la antaŭa tempo, partoprenado de multaj kapablaj kaj talentaj aŭtoroj, aktiveco de la legantaro, abundeco de bonega materialo, kiu restas por kuŝadi neuzata, sufiĉe bona ĉiumonata materia subteno de alia organizo esperantista (SEU) ktp.

Tamen jam baldaŭ montriĝis, ke unu artikoleto, unu ĝis du versaĵoj kaj du ĝis tri rakontetoj en unu fojo dum du monatoj — jen estas la tuta diapazono de nia muziko k malfermi la buŝon pli larĝe malhelpas la alprenita eldonmaniero de nia revuo. La plej ĉefa k komuninteresa serio de la revuo — la literatura — estas do forte kunpremita ĝis neebleco libere spiri. Unu pli-malpli plenan kritikartikoleton pri novaperinta libro oni estas devigata distiri en tri kajeroj dum duonjaro! Estas do klare, ke jam neeblas paroli pri sistema bibliografia observado de la tutmonda moderna literaturo, sed eĉ ne de la nur esperanta. (La kutimajn recenzetojn estas pli bone tute ne presigi pro ilia absoluta senvaloreco.)

Aliparte montriĝis aliaj pripensindaj faktoj. La scienca serio de nia revuo en tiu ĉi jaro fakte tute ne ekzistas, ĉar ununura, cetere la valora, scienca verko de K-do E. Drezen pri "Historio de la Mondolingvo" elpuŝas ĉiun emon loki iun ajn alian sciencteman artikoleton. Sed eĉ tiu ĉi sola verko, okupanta pli ol duonon de la tuta revuo, ne trovis sufiĉe da spaco por si en unu jarkolekto kaj estos daŭrigata ankoraŭ en la estonta jaro.

Fine, la pedagogia serio, kvankam tre valora k interesa, tamen, kiel evidentiĝis, ne trovas ĉe ĉiuj legantoj egalan akcepton. Ĝi pli kaj pli fariĝas grava por pedagogoj-specialistoj k ĝia plua evoluo ankoraŭ pli multe progresigos tiun ĉi flankon de ĝia signifo. Estas evidente, ke la pedagogia serio de "La Nova Epoko", kiel estis intencite ankoraŭ en la komenco de ĝia ekzisto, havas tute memstaran signifon, kaj ju pli baldaŭ ĝi apartiĝos de "La Nova Epoko" al aparta pedagogia periodaĵo, des pli bone estos por ĝi kaj por "La Nova Epoko".

Ĉio supredirita rezultigas tre klare sekvantan konkludon:

1. "La Nova Epoko" laŭ sia karaktero kaj ideo apartenas al la tipo de la t. n. "dikaj revuoj" (magazinoj). Por sia plua progreso ĝi bezonas pli kaj pli, iom post iom, dikiĝi. Literatura materialo por ĝi ne mankas. Dependas nur de la materia eldonebleco de tia "dika" revuo. Ĉiuokaze "La Nova Epoko' devas havi kurson ĝuste al tiu ĉi tipo de la gazetoj.

2. La poseria eldonado de "La Nova Epoko" sekvigis nur, ke ĝi perdis unuecon en sia aranĝo, unuecon en sia karaktero, unuecon de sia "vizaĝo". La ĉefa bazo de "La Nova Epoko" estas literatur-scienca kun dominado de la literatura materialo. Do "La Nova Epoko" devas restariĝi kiel unueca ĉiumonata literatur-scienca revuo.

3. La pedagogia serio de "La Nova Epoko", ĉiam havinta kaj havanta memstaran signifon kaj tendencanta esti aparta gazeto, devas esti eligita el la sistemo de "La Nova Epoko". Ĝi devas esti reorganizita kiel memstara 8- aŭ 16-paĝa gazeto, aperanta sesfoje dum jaro. Unuatempe ĝi povas esti eldonata kiel suplemento de "La Nova Epoko", ne aparte abonebla, samkiel "La Lernanto" de "Sennaciulo"[1].

4. Ĉar la enpresigo de "Historio de la Mondolingvo" per daŭrigoj en vico da sinsekvaj kajeroj de la revuo montriĝis kiel tre bona ideo, ĉar tiamaniere ebliĝas eldono de la sama verko en aparta libro per la sama kompostaĵo, — estas rekomendinda la daŭrigo de tiu ĉi maniero per presigo en "La Nova Epoko" de iu romano aŭ granda novelo, post kiam "Historio de la Mondolingvo" estas finpresita.

5. Sendepende de plivastigo de la ebleco presigi en "La Nova Epoko" pli multan materialon de la kunlaborantoj, estus utile aranĝi intiman kontakton inter la redakcio de "La Nova Epoko" kaj Literatura Sekcio de SAT, por ke de tiu ĉi lasta la verkemaj kamaradoj povu ricevadi literaturajn konsilojn kaj menciojn pri siaj manuskriptoj, sendataj por "La Nova Epoko".

Substrekante, ke la literatura materialo por plua progresigo de "La Nova Epoko" ne mankas, sed eĉ abundas, kaj ke la materiaj kondiĉoj por realigo de tiu progresigo pro aktiviĝo de la legantaro kaj pro la ekzistanta konstanta monsubtenado al "La Nova Epoko" estas tre favoraj, — mi transdonas tiujn ĉi konsiderojn al la bonvola aprobo de la 9-a SAT-Kongreso.

K-do Bartelmes raportas pri

"LA LERNANTO"

jenon:

"La Lernanto" aperis regule ĉiumonate kiel aldono al "S-ulo" k havis sian memstaran karakteron, kiel progresiga gazeteto kun alloga, simpla enhavo. Ĝi estis plibeligata per diversaj ilustroj. Studantaj esperantistoj trovis en ĝi simplajn rakontetojn, priskribojn, verkitajn de "lernantoj" mem; ili trovis anekdotojn, seriozajn k humorajn, en ĉiu n-o, ankaŭ la angulon "Por nia distro". Nova estis la regula enmeto de enigmoj k rebusoj. El ricevitaj solvoj k komentoj ni konstatis, ke multaj K-doj ŝatis tiun aranĝon. Ankaŭ por tiu rubriko troviĝis inter la "lernantoj" mem volontaj kunlaborantoj. La rubriko "Kiel mi fariĝis esperantisto" estis vigle kunlaborata k ni posedas ankoraŭ kvanton da manuskriptoj por tiu rubriko. Sume oni povas diri, ke la redaktoro ne bezonas mem serĉi materialon por la gazeto, sed ke inter la amikoj de "La Lernanto" mem troviĝas sufiĉe multaj K-doj, kiuj provizas nin per la plej varia materialo. Ni mem ellaboris nur la instruan, lingvan rubrikon, ĉerpante el la lingva trezoro, kiun postlasis Zamenhof, k lingve komentante la priinfanan rakonton, kiu aperas en mallongaj ĉapitroj, ankaŭ prilaborante simplajn "lingvajn demandojn". Laŭ la ekstera formo ni ne similigis "La Lernanto"n al instruilo, kvankam ĝi estas esence tia. Tamen ni ĉiam klopodis atingi kaŝi tiun kvaliton sub amuza, distra, plaĉa formo. Kritikojn ni ne ricevis, krom de K-do Haeckel, Leipzig, kiu dezirus enkonduki en "L. L." pli da pure instrua, lingva materialo, kiu laŭ nia opinio ne farus pli alloga la legadon k ne estas pravigebla de moderna pedagogia vidpunkto.

Por la

KONTROL-KOMITATO DE SAT

raportas K-do Vildebrand (Berlin): Karaj Gek-doj! Komisiite de la 8. Kongreso de SAT en Göteborg la Berlinaj SAT-anoj elektis 2 ceterajn membrojn por la Kontrolkomitato. Vi memoras, ke la 8. Kongreso elektis K-don Vildebrand kiel sekretarion de la K. K. Je la 21. februaro la Direkcio informis nin pri la aprobo de la elekto de K-doj Adolf Sproeck, Herbert Hoppe k Willi Vildebrand. — Niaj taskoj estas duspecaj: Unue, kontroli la laboron de la Plenumkomitato k Konsilantaro. Due, akcepti k solvi plendojn de iuj SAT-anoj kontraŭ la aliaj. La Kontrolkomitato post esplor-informiĝo ĉe la akuzitoj faris jenajn decidojn:

1. Plendo de K-do Sneĵko (Minsk) kontraŭ Ben Odinov (Novjorko) pri ofendo k kalumnio. (Ben Odinov riproĉis al Snejko, ke li publikigis nebonan artikolon pro "mondonaco sendube".) Jen decido de K. K.: Kontrolkomitato en sia kunsido de 31. 7. 1929 traktante la plendon de K-do Sneĵko (Minsk) kontraŭ Ben Odinov (Novjorko) konstatas, ke la akuzo k kalumnio, ke K-do Snejko pro monricevo publikigis artikolon de K-do Ploss (Ĉeske Budejovice) ne konformas al la faktoj, sed estas tute senbaza kalumnio. Konstatante tion ĉi publike, la Kontr. Kom. opinias, ke la honoro de K-do Sneĵko estas tutplene rebonigita.

2. Plendo de K-do Stádler (Plzen) kontraŭ K-do Gargula (Prago) pro ekspluatado de SAT-anoj dum vojaĝo. K. K. decidis rekomendi al la Kongreso la akcepton de propono farita tiurilate al 9. SAT-Kongreso.

3. Propono pri eksigo de SAT-ano 2042 René Naville de loka SAT-grupo en Tiflis (vidi komunikon en "S-ulo" de 16. majo 1929). K. K. decidis proponi al SAT-Kongreso la eksigon de René Naville, konforme al paragr. 8 de nia Statuto.

4. Plendo de K-doj Nekrasov (Moskvo) k Rublov (Odessa) kontraŭ SAT-Direkcio k (esence la sama) rezolucio de Berlinaj SAT-anoj:

"Al la Direkcio de SAT. — K-doj. En la n-oj 241/242 de "S-ulo" vi publikigis "Deklaron" de la Direkcio de SAT, kiu povas kaŭzi gravan konflikton en la SAT-membraro. Mi, subskribinta membro de la Plenuma Komitato, ne konsentas al tiu ĉi deklaro. La publikigo de Deklaroj, kiuj pritraktas principajn aferojn de SAT, estas afero de la tuta Plenuma Komitato k eventuale Ĝen. Konsilantaro.

"Plue ŝajnas al mi grava peko kontraŭ la Statuto de SAT la prezento k rekomendo de la programeca broŝuro "La Lab. Esperantismo", verkita de K-do Lanti laŭ via komisio. Mi ne povas solidariĝi kun la enhavo de la broŝuro kiel "kvazaŭa programo" de SAT, ĉar ni rigardas ĝin kiel danĝeran reviziismon de la paragr. 1 de la Statuto.

"Same ni ne povas aprobi la redakton de "S-ulo", kiu ne kapablis eviti polemikon partipolitikan k propagandas la samajn ideojn kiel en "La Lab. Esperantismo", detruante la ĉefan regulon de SAT ne tuŝi la disputpunktojn de la politikaj partioj laboristaj. Ni postulas, ke vi deklaru en la proksima n-o de "S-ulo", ke via Deklaro nur estas persona opinio de kelkaj Direkcianoj k ne tiu de la elektita gvidorgano de SAT[1]. En mala okazo ni redonos proteste niajn mandatojn al la SAT-Kongreso, al la SAT-anaro.

9. junio 1929. N. Nekrasov."

K. K. faris jenan decidon en tiu rilato: K. K. konsentas al la Direkcio de SAT, esprimi sian opinion en "S-ulo". Tamen ĝi postulas, ke ĝi ĉiam respektu la malsamajn politikajn tendencojn en SAT k la malsamajn opiniojn de la membroj de SAT. En la "Deklaro de SAT-Direkcio" en n-oj 241/242 ne tute estas atentata la intertendenca lojaleco. Ni atendas, ke SAT-Direkcio estonte estu pli singardema. (Vildebrand, Sproeck, Hoppe[2].)

Sekvas la raporto de K-do Bässler pri la

ESPERANTO-INFORMSERVO DE SAT

Li prezentas al la kongresanoj, kiel oni fariĝas kapabla, sperta, bone informanta k raportanta gazet-prizorganto. La raportado por ĵurnaloj ne estas tiom simpla k facila afero. Tamen ĝi estas plej necesa por sukcesigi nian peresp-an laboron. La materialo, kiun li dissendis al la gazetservantoj, ne taŭgas ĉiam entute por unu sama gazeto. Tamen ĉiuj raportoj taŭgas por tiu aŭ alia ĵurnalo, laŭ la tendenco aŭ la karaktero de koncerna gazeto. Plej bone plenumis sian taskon sendube K-do P. Tilin (Leningrad). Li ne volas tedi la aŭskultantojn ĉi tie per ciferoj. Cetere ĉiu-kvaronjare aperas raporto pri la agado en "S-ulo". Speciale li atentigas pri sia propono prezentita al la Kongreso, nome k en "S-ulo" aperu presitaj kiom eble plej multaj el liaj informservaj raportoj en konciza formo sur speciala paĝo sub lia respondeco. Li opinias, ke la presigo de tiuj raportetoj en "S-ulo" interesos ĉiujn legantojn, ne nur la malgrandan rondon el ĝisnunaj gazetservantoj, k ke per tio la intereso por la Servo pligrandiĝos. Ĝi estos instigo por multaj traduki k sendi al lab. gazetoj la raportetojn. Tiu propono estas rezulto el kelkjara laboro de Esp. Servo.

Post sia raporto K-do Bässler faras proponon, ke oni elektu socialdemokratan K-don inter la prezidantaron. K-do Batta (Vieno) subtenante tiun proponon, deziras, ke oni ankaŭ elektu virinon

---

[1] Ĉu ĝi estu enbroŝurigata en la mezon de "La Nova Epoko", ĉu simple enŝovata en ĝin — tiu demando estas pure teknika.

[1] Klarigoj: La "Deklaro" estis aprobata de 5 Direkcianoj, la 6-a sin detenis k ne voĉdonis kontraŭ ĝia publikigo. Sekve la voĉo de K-do Nekrasov ne povus aliigi nian decidon. Aliparte, ne la tuta Plenum-Komitato estis atakata, sed nur la Direkcio. Estas do tute nature k logike, ke ankaŭ nur Direkcianoj rebatu la atakon. La protesto de K-do N. estas do tute senbaze — se ne sencela . . .

[2] Necesas rimarki, ke tiu raporto devus aperi resume en "S-ulo" antaŭ la Kongreso kiel la aliaj raportoj de la gvidorganoj de SAT. Tiel ne okazis k sekve ni ne povis klarigi la aferon en la ĝenerala parto de la raportaro. La Legantaro pripensu la fakton k konkludu mem . . .

por esti prezidanto. Venas div. proponoj. Rezulte la prezidantaro estas kompletigata per la elekto de K-do Deubler (München) k K-dino Glodeau (Paris).

K-do Lanti nun prezentas la raporton pri

"SENNACIULO"

La gazeto aperis regule. Grandan paŝon antaŭen ni realigis dum la lasta jaro. En la espero, atingi baldaŭ 4000 abonantojn k ĉar la buĝeto de la gazeto estis sendeficita, ĝia formato estis pligrandigata sen plialtigo de la abontarifo. Depost novembro 1928 ĝi aperis unufoje monate 12-paĝe; depost februaro 1929 dufoje monate. Depost aprilo 1929 ĝi aperas ĉiusemajne sur 12 paĝoj. Ni akompanis tiun pliampleksigon sinsekvan de la gazeto per alvokoj longaj k mallongaj, ripetitaj, en "S-ulo" mem al la abonantaro por intensigi la varbadon. Ni ne tute sukcesis atingi la celon. Kiel vi povis ekscii per la raporto de la Administracio ni tamen varbis 472 novajn abonantojn k tiu nombro estas sufiĉe elokventa per si mem.

Dank' al la pliampleksigo ankaŭ la enhavo de "S-ulo" pliriĉiĝis k plivariiĝis. Ni povas statistiki ĉi-jare 304 originalajn artikolojn (en la peresperanta parto) + 31 Tagoj el mia vivo + 2 Mia buĝeto + 10 versaĵoj, sekve sume 347 originalojn[1]. Ne enkalkulita en tiu nombro estas la rubriko "Tra Esperantio", en kiu aperis ĉiunumere meznombre 2 grandaj artikoloj = sume ĉ. 100 artikoloj dum la jaro. Ankaŭ ne enkalkulitaj estas la specialaj "Paĝoj" — kiuj pliiĝis dum la jaro, tiel ke depost 1. januaro 1929 en ĉiu n-o regule aperis unu el la "Paĝoj" — sporta, scienc-kultura, liberpensula, junulara, virina[2]. Kompil-aranĝitaj artikoloj (kiuj estis ĉerpataj k kompilataj laŭ unu aŭ kelkaj difinitaj fontoj) aperis: 31. Tradukoj 45. Krome la rubriko nove enkondukita "El la Historio de l' Socialismo" prezentis 16 pecojn. Ĝi havas instruan, klerigan celon k certe estas utila por multaj niaj legantoj.

Laŭ la ciferoj oni vidas, ke lastjare la puraj tradukoj en "S-ulo" prezentis nur proks. 10% de l' enhavo peresperanta de la gazeto (enkalkulante la "Paĝojn", ekskluzive la rubriko "Tra Esperantio"). Sekve kompare al la antaŭaj jaroj plia rimarkinda progreso rilate al la originaleco de l' enhavo estas konstatebla. Oni rimarku, ke la Tagoj el mia vivo okupis malpli da loko en la gazeto ol en la antaŭjaro. Por variigi la enhavon de la gazeto, ni rezignis enmeti la "Tagojn" en ĉiu n-o, precipe ĉar ankaŭ ne ĉiuj estas interese verkitaj. Ni posedas ankoraŭ ioman kvanton, da "Tag"-manuskriptoj kiuj siavice aperos, sed la alfluo da tiaj manuskriptoj konsiderinde plimalmultiĝis, k niaj verkantoj tiaspecaj preferas nun priskribi vojaĝojn aŭ eksterordinarajn travivaĵojn, kiujn ni ŝatas enmeti, se ili vere estas eksterordinaraj k esence interesaj.

La gazeto estis multe pli ilustrita ol en antaŭa tempo. Ni eĉ permesis, konsiderante la pliampleksigon, al grupoj ktp. enmeti siajn fotojn. Sed tiuokaze ni pro financaj konsideroj devis postuli pagon por la kliŝoj. Kiel speciala varbnumero estis aranĝita la 200-a, kiu 16-paĝe konsistis el originaloj, kiuj pritraktis ĉefe SAT k lab. esp. temojn. Pri tiu n-o ni ricevis multajn aprobajn leterojn.

El materialo aperinta en "S-ulo" estis represataj nacilingve en diverslingvaj lab. ĵurnaloj k revuoj 190 artikoloj (el ili 39 pritraktis Sovetion, 14 Usonon, 7 Ĉinion, 6 Japanion, 2 Hindion ktp.). Ni povas kompreneble raporti nur pri tiaj enpresoj, kiuj estis konigataj al ni de la K-doj. Reale tiu nombro da enpresoj certe estas tre konsiderinte pli alta.

Por komprenigi al la K-doj, kiel funkcias la Redakcio de "S-ulo", ni diru vorton pri la disdivido k prilaboro de l' materialo ricevata ĉe ni. De esenca signifo por la glata redakcia funkciado estas la fakto, ke gvidanto k redaktoro de la gazeto intime kunlaboras. La rolo de K-do Lanti kiel gvidanto estas unuavice legi la ricevatajn manuskriptojn, prijuĝi la valoron de ilia enhavo k transdoni tiam ilin kun koncernaj rimarkoj al la redaktoro K-do Bartelmes. La manuskriptoj trovitaj taŭgaj estas prilaborataj de K-do Bartelmes laŭ lingva k stila vidpunktoj. Inter la amaso da alvenantaj manuskriptoj granda parto estas tre malkorekte verkita k malbone legeble prezentita. Tial la prilaboritaj manuskriptoj plej ofte devas esti maŝine rekopiataj antaŭ ol ili pretiĝas por la presejo. El manuskriptoj, kiuj pro iaj mankoj, troa amplekso, maltaŭga enhavo k. s. ne povas esti enpresataj en "S-ulo", kelkaj tamen ne estas forĵetataj, sed ni transsendas ilin laŭeble al iu fakredaktoro, ĉu de "La Nova Epoko", ĉu de "La Lernanto", de Esp. Servo, Pedagogia Informservo ktp. Pri neuzotaj manuskriptoj ni informas la aŭtorojn en "Nia poŝto", se ili petas pri tio. Estas multaj manuskriptoj, kiujn ni ne tuj povas enmeti, sed nur en oportuna okazo, kiam spaco permesas. Tiun duan elekton, kiu koncernas la kompiladon de la enhavo por difinita n-o, prizorgas la teknika redaktoro, ne plu la gvidanto. K-do Bartelmes prezentas al la gvidanto vendrede la pretigitan materialon en amplekso de 12 prespaĝoj k proponas laŭ ĝi difinitan aranĝon de la n-o. Post konsento kun K-do Lanti pri la aranĝo la manuskriptoj estas ekspedataj al Leipzig, kie ili trafas la presejon. La presprovaĵoj estas korektataj en Leipzig.

Pri stilo k lingvo de la gazeto ni ricevis multajn tre laŭdajn leterojn. Kontraŭmeti al ili ni povas nur 3 nefavorajn kritikojn: K-do Smirnov (12 340, Pless, Sovetio) plendas pri tro longaj peze konstruitaj frazoj en diversaj artikoloj; K-do Rusakov (12 855, Moskvo) plendas pri malsimpla stilo, k same K-do M. Genkin (7792, Moskvo). Ĉiuj tri plendintoj estas sovetianoj; tial ni emas pensi, ke la malsimileco en la lingva strukturo kompare kun la nacia lingvo efikis sur ilin malhelpe en la legado. Aliflanke oni ne devas forgesi, ke kompreneble la legado de fabeloj, rakontoj, naturpriskriboj k plej multaj romanoj estas pli facila ol legado de tekstoj pri sociologiaj temoj, kiuj postulas cerban streĉon. Ankaŭ ja ne ĉiuj artikoloj en "S-ulo" estas samgradaj, nek laŭ kleriga valoro, nek laŭ facillegeblo. Certe neniu leganto estas devigata legi ĉiujn artikolojn en "S-ulo". Kaj ne povas plaĉi eble al kelkaj legantoj iuj artikoloj pri temo tre ŝatata de aliuj. Sekve ni devas provi laŭeble kontentigi ĉiujn, tuŝante multajn diversajn problemojn, kiuj koncernas la vivon de l' laboristaro. Laŭ teknika flanko ni ricevis unu solan plendon: de K-do Lidin (41, Moskvo) kiu dezirus uzon de pli diversaj presliteraroj, por plibeligi la aspekton. En nunaj cirkonstancoj tamen alia teknika aranĝo ne estas efektivigebla k ni pensas, ke la bildriĉeco k la enmeto de multaj subtitoloj ĉe longaj artikoloj helpis solvi en kontentiga maniero la demandon pri la aspekto.

Necesas diri vorton ankaŭ pri la propraj nomoj. En la lasta jaro ni ĝenerale esperantigis laŭ la elparolmaniero ĉiujn proprajn nomojn netradukeblajn, aldonante inter krampoj la nacian skribmanieron. Tio estis por ni sufiĉe malfacila afero, ĉar la ĝusta fonetiko estas apenaŭ prezentebla per la disponigata literaro de l' esperanta alfabeto kaj povas esti ofte nur proksimuma. Certe pri tiu transskribo ankaŭ regas malsamopinieco inter la K-doj. Almenaŭ sovetiaj K-doj tre insistas pri fonetika transskribo de la nomoj. Kiel dirite, tiu transskribo de l' nomoj estas nur eksperimento, pri kies sukceso ni ne havas firman opinion.

Pli gravajn preserarojn, kiuj malklarigis la sencon, ni korektis en sekvantaj n-oj. Bedaŭrinde tiu malbono ne estas tute ekstermebla. Rilate al la enhavo ni ricevis plendojn de K-doj, kiuj protestis, ke ni foruzas la valoran spacon de la gazeto por diskutado, eĉ disputado pri la programdemando. Tiujn plendojn ni kompreneble konigis al la Direkcio de SAT, ĉar la Redakcio de "S-ulo" ne havis influon je tiu diskuto k ne povis memstare decidi pri akcepto aŭ malakcepto de tiaj artikoloj.

Resume nia gvidprincipo ĉi tiun jaron, kiel ĉiam, estis larĝa toleremo k rigora senpartieco, rilate al la diversaj tendencoj, kiuj interpuŝiĝas en la laborista movado. Sed, kompreneble, la principoj ne estas io, kio ekzistas en si. La gradon da toleremo difinas la SAT-anaro mem. En diskuto pri iu ajn demando la gvidanto de "S-ulo" devas atenti la reagojn de la Legantaro. Estas cetere temoj, pri kiuj oni povus senfine k senrezulte diskutadi. Sekve, sub la preteksto, ke ĉiu devas havi en nia gazeto liberan voĉon, oni tamen ne ĉiam povas ĉion publikigi, ĉion enmeti: oni devas atenti la spiritostaton de la Legantaro. Tiu spiritostato estas variebla, k okazas, ke iutempe oni povas permesi diskutadon pri temo, kiu estas nediskutebla alitempe. Ĉio dependas de la cirkonstancoj. Unuvorte, kiam oni interkonsentis pri la ĝeneralaj principoj, necesas lasi al homoj el karno k sango la zorgon apliki tiujn principojn k sekve estas neevitebIe, ke aliaj homoj, kiuj portas en si ankaŭ pasiojn, havu la opinion, ke la principoj ne estis ĝuste aplikataj. Tiaokaze juĝantaro devas decidi pri la konfliktoj. Tia juĝantaro estas nia kongreso. La juĝotoj atendas la verdikton kun pura konscienco, tial ke neniam influis ilian agadon iaj ajn personaj meminteresaj konsideroj. Tio donas al ili sufiĉan memfidon por opinii, ke ili ne eraris en la aplikado de la principoj, pri kiuj ĝis nun ĉiuj SAT-anoj interkonsentis.

K-do Lanti daŭrigas legi la raporton pri la

"PLENA VORTARO"

Kiel ni jam publikigis en la n-o 237 de "S-ulo", la verkado de nia vortaro ne tiom rapidas kiel antaŭvidis la aŭtoroj. Ili ne sukcesis liveri la partojn de la manuskripto je la datoj difinitaj en la kontrakto. Ni tamen ne intencas postuli severan aplikadon de la kontrakto, tial ke ni bone konscias pri la grandaj malfaciloj renkontataj en tia laboro. Cetere, s-ro E. Grosjean-Maupin havis lastatempe okulmalsanon, kiu devigis lin ĉesigi ĉian verkan laboron dum pli ol unu monato. Tia fakto jure maldevigis lin tute akurate plenumi la kondiĉojn de la kontrakto. Kontraŭ tia malfruiĝo ni sekve estas senpovaj k ne akceptas pri ĝi respondecon.

Ĝis nun estas presitaj nur 120 paĝoj, kiuj korespondas al la litero **F** inkluzive. Ni esperas, ke de nun la entrepreno progresos pli rapide. La enreligo de la afero estis ja ĉe la komenco sufiĉe malfacila. Ne ĉiam la kvar aŭtoroj povis tuj interkonsenti. Longaj perleteraj diskutoj okazis, kio maiebligis normalan laboron. Nun la afero funkcias pli glate. Ĉiun semajnon ni sendube povos liveri al

[1] La grandaj artikoloj aperintaj en ofte multaj "daŭrigoj", estas kalkulitaj kiel unu.

[2] Nur en 2 n-oj de tiu periodo mankis la "Paĝoj" pro neregula manuskript-liverado.

la presisto 25—30 paĝojn el la manuskripto k fine de l' jaro espereble la verko estos tinpresita.

Kio plej bone montras, ke nia vortaro respondas al nepra bezono, estas la fakto, ke jam ni ricevis, ĝis la fino de julio, 1428 mendojn kun antaŭpago. Tiuj mendoj reprezentas 42 705,46 fr. fr. Se ni aldonas al tiu sumo la 17 301,50 fr. fr., kiujn ni ricevis prunte, ni do jam disponas ronde 60 000 fr. fr. por nia vortara entrepreno.

Verdire ni ne estis sufiĉe optimistaj tiurilate. Ni timetis, ke ni ne sukcesos sufiĉe rapide kolekti la necesan monon por efektivigi sen ia malfruiĝo nian planon. Se malfruiĝo tamen okazas, ne estas do pro manko de mono, sed pro neakurata livero de la manuskriptoj. La monan sukceson ni ŝuldas al la fakto, ke multaj neŭtralaj esperantistoj mendis k antaŭpagis. Ni ne forgesu tion por ne tuj konkludi, ke la SAT-anaro povas jam nun efektivigi per siaj propraj fortoj grandiozajn planojn.

Ĉu nia vortaro estos ĉiurilate perfekta, senmanka? Al tia demando permesu, ke ni ne respondu. Ni diru nur, ke la verko estos kiel eble plej taŭga, konsidere la cirkonstancojn k la rimedojn, kiuj estas je nia dispono. Kvarcent kvindek- aŭ kvincent-paĝa vortaro ne povas enteni ĉiujn fakesprimojn, kiujn uzas diversaj scienculoj aŭ metiistoj. Ĝi neniel povas pretendi malnecesigi la fakvortarojn, kiuj tre ege malrapide pretiĝas, kiel oni povas konstati per legado de la lastatempe aperinta raporto de la Akademio.

Rilate al la difinoj de vortoj, kredeble regos pri tio diversaj opinioj. Pri multaj punktoj en lingvaj demandoj estas neeble akiri unuanimecon ĉe kompetentuloj, k tiom malpli ĉe tiuj, kiuj kredas esti kompetentaj, sed kiuj fakte estas nur prilingvaj amatoroj. Se oni tiurilate devus atendi, ĝis plena interkonsento regas pri ĉio, neniam la bezonata verko aperus. Solvo devas sin trudi per aŭtoritato. Tial ni opiniis, ke varbinte kiel verkantojn L. K.-anojn k la direktoron de la S e k c i o p r i k o m u n a v o r t a r o en la Akademio, ni estis garantiontaj al nia entrepreno la necesan k sufiĉan aŭtoritaton.

Bedaŭrinde en la prospekto, kiun ni dissendis, troviĝas du preseraroj k iaj manketoj. Tio venigis al ni kelkajn rimarkojn, pri kiuj ni dankas. Cetere ne estas eble kompreni ĝuste ĉion en la prospekto; necesus por tio, ke oni antaŭe legu la diversajn klarigojn pri la vinjetoj k la presaranĝoj. Tiuj klarigoj troviĝos en la antaŭparolo. Ankaŭ preseraroj estos korektataj sur aldona paĝo. Ni plie aldonas, se necese, kelkajn paĝojn por forigi eventualajn forgesojn k fari korektojn.

Almenaŭ ne povas esti dubo, ke nia vortaro faros tre grandan servon al la tuta Esperantistaro. Kaj se oni konsideras, ke la nuna prezo estas relative tre malalta, oni povas esperi, ke la antaŭpagintoj ne badaŭros sian monon k ne tro akre riproĉos pro la prokrasto. Post la apero de la volumo ni ja devos iomete plialtigi la prezon k tia plialtigo certe superos la renton, kiun produktus la sumo, kiun antaŭpagis la mendintoj.

Ni do tute trankvile povas rilati al la eventualaj kritikoj pri nia vortara entrepreno.

KONKLUDAJ VORTOJ

Ĉe la sojlo de l' 10-jara ekzistado de SAT ni povas trankvile rigardi malantaŭen. Nia organizo kreskis k fariĝis forta, eĉ timinda, ĉar ĝi estas malpermesita en relative multaj landoj. Necesas tamen ne fermi la okulojn por vidi ĝiajn mankojn, ĝiajn malsanetojn. Unue ĉiu devas konscii, ke SAT ne posedas ankoraŭ la fortojn necesajn por plenumi diversajn tre interesajn taskojn, kiujn oni emas trudi al ĝi. Ni, ekzemple, ne sukcesis efektivigi la planon de K-do M. Starr, iniciatitan antaŭ la Göteborga Kongreso, pri laborista konferenco. Kaj ĉu la nova, iom pretenda laŭ ni, iniciato pri "Laborista Altlernejo" estos kontentiga? Oni permesu al ni dubi pri tio. Verdire ni sukcesis ĝis nun nur laŭ tre modera grado meti esp-on je la servo de l' tutmonda Proletaro. Nia aparato certe bezonas perfektigojn. Sed tiuj perfektigoj estas eblaj nur, se la SAT-anoj mem laboras je sia memperfektigo. Ili devas ne nur ĝis funde lerni esp-on, sed ankaŭ lerni akuratecon, seriozecon en la plenumado de la taskoj, kiujn libere ili akceptis. Ili devas pli k pli konscii, ke ilia por- k peresperanta laboro estas nepre necesa k utila por la emancipo de sia klaso. Ili devas ne havi la iluzion, ke baldaŭ la partioj k sindikatoj prenos sur sin la disvastigadon de esperanto. Ni jam atingis, kelkloke, ke tiuj organizoj rilatas al nia movado simpatie k malpli skeptike ol antaŭ kelkaj jaroj. Sed oni erarus, konkludante el tio, ke baldaŭa estas la finvenko. Multo restas farenda, k la unuigitaj fortoj de ĉiuj estas same necesaj kiel ĉe la komenco.

Kiam en preskaŭ ĉiuj landoj la laborista movado estas dividita en konkurencajn organizojn; kiam akraj polemikoj okazas inter la diversaj tendencoj, estas do nemirige, ke la disiĝema malsano iomete infektu ankaŭ nian SAT-movadon. Ni devas kuraci tiun malsaneton en niaj propraj vicoj. Tiucele ni devas instrui toleremon k komprenemon al niaj membroj. Ĉu por tio ili devas foriĝi kvazaŭ mutaj k ne paroli inter si pri la demandoj k problemoj, kiuj kaŭzas ekstere akrajn disputojn? Tute ne. Sufiĉas nur, ke ĉiu el ni atentu la faktojn, penu diskuti laŭ tute objektiva maniero k ne kun la espero, ke la malsamopiniantoj tuj ŝanĝos sian vidpunkton. La ideoj bezonas tempon por maturiĝi en la cerbo. Plej bonaj argumentoj ne tuj efikas; jaroj kelkfoje estas necesaj.

Laŭ nia statuto la SAT-anoj devas fariĝi "la plej kapablaj k perfektaj el la t. n. internaciistoj"; ili devas kreskigi ĉe si "fortikan senton de Homeca solidareco". Por atingi tiun celon ne ekzistas pli ĝusta vojo ol tiu, kiun ni sekvis ĝis nun.

Oni ja povos trovi multajn p r e t e k s t o j n por kritiki ĉi tion k tion pri nia gvidado; oni povos kolekti faskon da tiaj pretekstoj k ĵeti ilin en la debaton por anstataŭi la mankantajn fundamentitajn argumentojn; tiele oni eble sukcesos iomete konfuzigi la cerbon de kelkaj K-doj, sed estos al ni facile rebati k ĝustigi ĉion ...

Post komunikoj de l' prezidanto pri div. kunvenoj k plendo de K-dino B a t t a, ke virina k sporta kunsido okazu samtempe, la kunsido estas fermata je la 12.30 horo.

Tria laborkunsido, 6-a de aŭgusto, posttagmeze

Malfermo je 2.30 h. Prezidas K-do B ä s s l e r, kiu komence legas ankoraŭ telegramojn k leterojn dume alvenintajn. Li legas proponon al la prezidantaro, subskribitan de 7 K-doj kun peto atenti pri bona akcentado, parolante la lingvon por eviti miskomprenon. Estas konstatate, ke la akustiko en la salono estas tre malbona k rekomendate al la oratoroj paroli kiel eble plej klare k laŭte.

K-do v. d. Heid legas Deklaron al la Kongreso senditan de K-do Fade (Ĉita) kun peto nepre tralegi ĝin, ĉar tiu K-do pro kelkaj objektivaj kaŭzoj ne povas persone partopreni la Kongreson. En tiu "Deklaro" K-do Fade opinias akcepton de SAT-programo neĝustatempe k danĝera por la unueco de SAT, tamen trovas maljusta la konduton de SAT-Direkcio dum lasta tempo, ĉar ĝi efektive "revizias" la ĝisnunan SAT-principaron. Li vidas la danĝeron 1. en fakta prefero al la tendenco "sennaciismo" en "S-ulo", propagando de tiu nova instruo, en artikoloj rifuzantaj valoron de naciliberiga movado en div. landoj, speciale en indigniga artikolo de K-do L. Revo pri "Luksemburg k Libkneht" ("S-ulo" 223), en pseŭdonime presitaj artikoloj pri inteligento, pri dubemo ktp.; 2. en tio, ke K-do Lanti mem verkas por "S-ulo" artikolojn, kiuj enportas la disputpunktojn en kadrojn de SAT, ke li permesis enpreson de artikolo de Revo supre menciita, laŭ kiu R. Luksemburg en ĉiuj demandoj diskutitaj de ambaŭ estis prava kontraŭ Lenin. K-do Fade plie pritraktas la "sennaciismon" de Lanti, citas kiel ekzemplojn Ĉinian revolucion, Sandino-n en batalo kontraŭ Usono k opinias, ke SAT devas kontraŭbatali ajnan nacian premon k malegalecon. Li diras, ke naciliberigaj movadoj en kolonioj ne estas progresiga fenomeno dum nuna epoko de imperialisma batalo. Lanti tro skemigas la problemon pri imperialismo, kiu enportas altan teknikon en koloniojn. K-do F. diras, ke li ne povas subteni tian "sennaciismon", ke Lanti k aliaj direkcianoj elektis malĝustan vojon. Pliajn elementojn de reviziado ĉe la Direkcio li vidas en ĝia kontraŭstaro al malkaŝa deklaro pri klasbatala pozicio de SAT. Lanti, predikante "superpartiecon, supertendencecon", donas al SAT rolon de kvazaŭ iu juĝanto inter div. tendencoj. Tial Fade ne povas aprobi la aldonon al la Statuto paragr. 1 (akceptitan per la lasta voĉdono. — Red.). Li al neniu rekomendas sekvi Lanti'n en liaj penoj pensi tiom "memstare", por esti libera eĉ de Historia Materialismo (instruo de K. Marks). Oni povas dubi k skeptiki pri ĉio, sed nur ne pri bazaj principoj de Historia Materialismo, ĉar n u r ĝi ja estas la filozofio de proletaro. Tial li trovas, ke la nunaj gvidantoj de SAT ne taŭgas por sia rolo, ĉar ili ne komprenas la erarecon de sia instruo k tuta pozicio. Li subtenas la proponon presigi ĉiujn adresojn en Jarlibro k tiun: okazigi Orient-aziajn SAT-konferencojn.

K-do K ö c k e r i t z (Dresden) kontraŭstaras, ke oni legu tiel longajn "broŝurojn" al la kongresanoj. K-do H e r m a n n diras, ke tio ne rilatas la Kongreson k estas kontraŭ sennaciismo. K-do B ä s s l e r voĉdonigas, ĉu oni daŭrigu legi ankoraŭ du aliajn rezoluciojn. La plimulto estas por la legado. K-do v. d. H e i d legas leteron de SAT-anoj el R u s e (Bulgario), kiuj opinias, ke SAT bezonas programon, ke la Statuto ne sufiĉas, ke ili ankaŭ subtenas K-dojn 2921, 920 k la rezolucion de Berlina grupo. Ili deziras, ke SAT ne havu t i a n oportunisman gvidadon, fleksiĝeman antaŭ la proletaj malamikoj, k proponas malaprobi la oportunisman gvidadon de la Direkcio. K-do v. d. H e i d plie legas leteron de Lyona SAT-anaro, kiu deziras, ke la programdemando estu prokrastata k akcentas, ke SAT neniel k neniam devas en siaj organoj starigi diskutojn pri specialpartiaj punktoj de div. tendencoj aŭ partioj, kiel eksterpartia organizo.

K-do M u r a v k i n: En la leteroj estas tuŝitaj kelkaj prop. al la 9-a. Estus pli bone pritrakti tion nur, kiam la Prop. Komisiono estos konsiderinta la prop.

K-do R i h t e r (Leipzig): Mi devas esprimi mian malkonsenton pri la motivigo en la raporto de la Pl. K. pri mia eksiĝo el ĝi. Laŭ tio mi ŝajne eksiĝis pro mia propra kulpo. Inter la kaŭzoj estas la dungo de Krestanoff, la presigo de l' Jarlibro en Paris tiel longe daŭrinta. Ankaŭ la Adm. Kom. ne sufiĉe bone funkciis pro malagemo de la koncernaj komisionanoj. En iu momento la komisiono

preskaŭ likvidiĝis. Restis nur K-do Bauer k mi. Oni deziris, ke tiuj 2 K-doj laboru kiel reviziistoj de la Administracio. Oni ne volis doni tiujn rajtojn al la A. K., kiuj apartenis al ĝi. Ĉar laŭstatute ili apartenas al la Direkcio. Kion utilas instancoj, kies deziroj k proponoj ne estas respektataj? Tiel ankaŭ la A. K. iom disfalis. Kaj poste, mi ne volis surpreni sur min kiel sola persono la taskon funkcii kiel reviziisto. Pro tio mi ne povas resti en la Pl. K. k pro div. aliaj aferoj, kiuj devigis min eksiĝi. Mi deklaris tiun eksiĝon oficiale k ŝajnas al mi, ke al la Direkcio tute ne ŝajnas dezirinde havi instancojn. Ĉar aliel oni eventuale pli estus diskutinta tiun aferon. Estis la nekonformiĝo de la A. K. kun la Direkcio, kiu igis min forlasi mian postenon. Mi petas konsideri tion en la sekvanta diskuto.

K-do Deubler: Unue mi parolu pri la interrilatoj inter LEA k SAT. Ĉi tiun kontrakton serioze plenumi deziris k penis la Pl. Kom. de SAT, ĉar mi vidis skribaĵojn, kiujn la Pl. K. skribis al grupoj el LEA-anoj, kiuj deziris porti la disiĝon inter LEA k SAT. Tial ni ŝuldas dankon al la Pl. K. pro la laŭpena plenumo de la Konvencio inter LEA k SAT. Mi petas aliajn reprezentantojn de LEA, ĉesi uzi LEA-gazetojn por SAT-aferoj. Kun malĝojo mi legis ekzemple en "Balkana Laboristo" de niaj bulgaraj K-doj polemikon kontraŭ SAT. SAT tie ne povis respondi. Ĉiu havu la eblecon aŭdi k esprimi sian opinion al la tuta SAT-anaro. Tion mi diras, por ke la LEA-reprezentantoj k SAT-anoj kunlaboru k en LEA-gazetoj ne aperu tiaj artikoloj kiel la supremenciita. Ankaŭ pri ALLE mi devas plendi, ke ĝi ne jam tute plenumas la Konvencion, ĉar ĝi eldonas preskaŭ tute esperantlingvan gazeton, k ili zorgu, ke kiam organizo akceptis Konvencion, ĝi ankaŭ tute lojale plenumu la Konvencion, kiel faris Pl. Kom. de SAT. — Oni plendas, ke la Pl. K. decidis k la redaktoro ankaŭ akceptis la pluan aperigadon de artikoloj pri programprojekto. Mi devas diri mian personan opinion k certe tiun de multaj SAT-anoj, ke mi k multaj aliaj SAT-anoj, kiuj legis la diskutartikolojn, diris: Jes, ili utilas por klarigi la situacion, por ĉiel eble klarigi al la K-doj, por ke poste estu inter ni unueco. Sed kiam poste aperis ĉiam pli akraj vortoj: Fulmotondro! Kie estas nia unueco? Kaj mi pensis, ĉu la verkintoj ne scius pli bone uzi la monon de l' SAT-anoj ol por verki k presigi tiajn artikolojn. La movado ne estas tiel disvastigita, ke ni povas okupi nin pri tiaj aferoj. Speciale de SAT-anoj el mia teritorio dankon al la Pl. Kom., ke ĝi ĉesigis la aperigon de tiuj ĉi artikoloj. Ni evitu ofendi niajn K-dojn funkciulojn, ke ni ne malŝparu ilian energion k ne malĝojigu ilian vivon per malĝustaj atakoj. Pripensu, kiom da laboro ktp. ili oferis por nia movado! Kaj antaŭe ni zorgu, ke ni agadu k nia Asocio kresku. Poste ni vidu, kiel ni aranĝu la aferon poste!

K-do Muravkin: K-do Deubler tuŝis la proponojn. Ni aŭdis leteron de Bulgaraj K-doj k aliajn. Mi konsentas, ke tiaj organoj kiel "Balkana Laboristo" ne devas esti dediĉataj al SAT-diskutoj. Sed tiuj K-doj sendis la artikolon al "S-ulo", k ĝi estis rifuzita, ĉar ili volis esprimi sian ĝustan opinion. Krome la Bulgara Esp. Lab. Asocio ne aliĝis al Konvencio inter SAT k LEA. — Okazis diskutado en "S-ulo" k ekscitiĝo en SAT pri la problemoj kunligitaj kun la programdemando. Ĉar la programkomisiono estis komisiita, reale pristudi la aferon, tial mi devas raporti al vi pri la historio de la program-afero, por ke estu klareco inter niaj vicoj. Al la historio de la programo: Ĉi tiu ne estis iniciatita de la nuna Programkomisiono, sed jam depost kvar jaroj oni parolas pri la Programo de SAT. Komence K-doj Revo, Nekrasov k ankaŭ Lanti interesiĝis pri la programa afero. La tezoj estis jenaj: En SAT troviĝas laboristoj konsciaj, kiuj celas utiligi esp-on je la servo de la tutmonda Proletaro. Sed por agadi ĝuste, necesas bona plano. Oni devas konscii pri la vojo, kiun oni surpaŝas, kiujn argumentojn oni uzu, se oni propagandas. Vi scias, ke en la lab. movado en multaj lokoj oni ne ankoraŭ estas informita pri celoj k taskoj de nia movado. Ni ĉiuj propagandas ĉe div. organizoj. Sed ĉe div. K-doj ekzistas tre div. maniero klarigi. Ofte oni faras mispaŝojn. Estus bone interkonsenti pri tio. Ĉia laboro en SAT dependas de la paca kunlaborado en ĝi. Necesas, ke la div. K-doj interkonsentu pri tio, kio estas komuna en SAT, por harmonie kunlabori. Tiuj principoj valoris por la Programkomisiono. Tiuj principoj estas tute sendependaj de la enhavo de l' Programo k la praktiko. La unua komisiono estis elektita, laŭ mia scio, en Vieno. Al la unua projekto ankaŭ konsentis K-do Lanti. Poste okazis interdiskutoj, kiamaniere aspektu la Programo k kion ĝi celu. En Lyon (1927) oni reelektis novan komisionon, ĉar la K-doj en la malnova ne plu prilaboris la temon. (K-do M. citas nun la nomojn de la novaj komisionanoj.) K-do Riĥter (Kassel, nova komisionano) tuj komence deklaris nedeziron partopreni la laborojn ĉar li ne fidas al la Direkcio. Aliaj konsentis kunlabori. Komencis labori la komisiono inter la Lyon-a kaj Göteborga Kongresoj. La projekto de la komisiono estis preta, sed ni ne deziris akcepton, nur diskutadon pri ĝi. Se iu malvasta komisiono pretigis iun Programon, ĝi ne povas mem decidi, sed ĝi devas scii la opiniojn de la granda anaro en la Asocio. Ni deziris, ke oni diskutu la unuan projekton en ĉiuj rondoj, ke estu faritaj nur kelkaj aldonoj. Tion ni prezentis al la Göteborga Kongreso. Ni estis ĉagrenitaj. Ni renkontis malkomprenemon de la flanko de la Direkcio, ĉar ni ja estis elektitaj por tiu laboro. Ni studis la aferon laŭ niaj konvinko k fortoj. La Direkcio rifuzis al ni presigon en "S-ulo", ĉar ĝi diris, ke Programo laŭ ilia opinio estas antaŭtempa. Ni respondis al la Direkcio: Bone, ni formetas tiun punkton, se vi kunlaboras kun ni k ni interdiskutos, k vi montros la neceson ne konigi al la granda anaro la ideojn, kiujn entenas la Programo. Sed poste ili diris, ke ni nepre insistas. Tial okazis prokrasto en la pretigo de la materialo. La kongresanoj ne plu havis tempon por studi la projekton. Ni interkonsentis laŭ decido de la kongreso, ke programo estus dezirinda, sed ke ĝi devas ebligi al ĉiuj tendencoj aliĝi al SAT. La kongreso reelektis la malnovan komisionon k decidis, ke okazu sur la paĝoj de "S-ulo" diskutado pri ĝi. Tiu diskutado okazis inter la Göteborga k Leipziga Kongresoj. La K-doj en la komisiono havis la opinion, ke necesus atendi la finon de la diskutado, por ke ĝi elmontru la opinion de la tuta SAT-anaro pri la afero. La diskuto daŭris tre longe. Ĝi estis komencita per la "Rimarkoj" de la Direkcio, aldonitaj al la Programprojekto de la Komisiono, kiu presiĝis en la "Protokolaro de la 8-a Kongreso". Bedaŭrinde ni ne povis priparoli ilin en Göteborg. Tiel ni estus evitintaj multajn diskutojn. En tiuj "Rimarkoj" ekzistas multaj punktoj neakcepteblaj kiel lojala kritiko. Certe la Direkcianoj havas la rajton pensi, ke la Programo ne estas necesa. Sed ni devas tuŝi kelkajn "Rimarkojn", kiuj prezentas la aferon, kvazaŭ ni enmetis en nia Projekto intence nebone kelkajn frazojn. Jen "Rimarko 2"[1]: (pri la kontraŭdiro inter la devizo "La laboristoj havas nenian patrolandon" k la sinteno de multaj famaj socialistoj). Mi opinias, ke tiu kontraŭstarigo estas fuŝa. Neniu kontraŭstaris la diron: "Proletoj ne havas patrion." Certe ne nur ĉe la socialistoj, ankaŭ en aliaj partioj ekzistas patriotoj; sed certe la socialistoj ne volus esti nomataj patriotoj. Mi ne scias, kion celas tiu "Rimarko". — En pĝ. 59 turniĝas Direkcia Rimarko kontraŭ enprogramigo pri batalo kontraŭ imperialismaj militoj k kolonia subpremado. Mi ne vidas kiel la Direkcio kontraŭdiron en tio. La kontraŭbatalo ne bezonas esti politika; ĝi ankaŭ povas esti kultura. Ni supozis k akceptis, ke ĉiuj tendencoj en SAT devus batali kontraŭ la kapitalismo. La "imperialismo estas la lasta stadio de l' kapitalismo" laŭ Lenin. Sekve ni trovas memkomprenebla, ke oni enmetu tiun batalon kontraŭ la imperialismo en la Programo. Oni ne povas tute disigi politikajn taskojn de kulturaj. Tion ankaŭ asertas la burĝoj. Ili diras: la proletaj kultur-organizoj agas politike, ĉar ĉiam ili akcentas la klasbatalon. Ni batalas sur la bazo de klasbatalo, sed kulture, ne enmiksiĝante en la aferojn de la partioj. Ni ne deziras enprogramigi tion, kio koncernas la partiojn. Nur la ekonomian k politikan subpremadon ni celas kontraŭbatali. La "Rimarko" sur pĝ. 60 de la Protokolaro (pri akcepto en nian organizon de di-kredantoj, se ili estas ekz. anoj de lab. partioj, de II-a aŭ III-a Internacio) estas en si mem ĝusta, sed ĝi ne trafas la esencon difinitan en la Programprojekto, kiu ne postulas ekskluzive ateistojn en SAT, sed postulas nur, ke SAT eduku siajn membrojn en nereligia senco. Oni povas plibonigi tiun parton. Ekz. en "S-ulo", kvankam ni estas kontraŭ ĉiuj dogmoj, oni donas liberon al ĉiuj tendencoj. Sed ĉu SAT povus permesi en "S-ulo" aperigon de "Diula Paĝo"? Certe ne. Ni celis, ke SAT fariĝu nur liberpensula organizo. Sur pĝ. 61 de la broŝuro troviĝas "Rimarko" pri la "unueca fronto proleta". Ni ne uzis tiun esprimon en la politika senco, kiun oni donis al ĝi. Pri vortoj tamen ni ne disputas. Ni konsentus diri "Ekstertendenceco". La "Rimarko 14" (pĝ. 62) volas konstati konfuzon inter la vortoj "internaciismo" k "sennaciismo". En la Statuto estas esprimita, ke ni celas eduki "plej kapablajn k plej perfektajn el la tielnomataj internaciistoj". Ĉu ni diru pli en la Programo? Krom tio, laŭ mi, sennaciismo kaj internaciismo ne estas tiel kontraŭaj kiel opinias K-do Lanti. Al la "Rimarko" sur pĝ. 63 ("Se la sennaciismo estas erara, fantazia, utopia teorio, nu, ĉu gravas, ĉar neniu SAT-ano estas devigata ĝin akcepti? Ne povas malutili, se oni diskutas pri ĝi; tute male. Ĉiu ja devas konsenti, ke oni devas ĉiel klopodi por vigligi la intelektan vivon en la lab. movado. Kaj por tion atingi, necesas libera, senpasia, ĝentila diskutado...") mi rimarkigas: Se oni priparolas Programon, oni ne povas propagandi flankajn ideojn, kiujn ne akceptis hodiaŭ la tutmonda lab. movado.

Oni multon povus diri ankoraŭ pri aliaj "Rimarkoj", ekz. pri la disigo de la seksoj (Pĝ. 60, Rim. 12: "Ĉu nia Asocio devas celi hermafrodismon?..."). Temis nur pri samrajteco de la seksoj. Kelkaj aliaj rim. estas polemikaj ĝermoj, kiuj povus estigi malpacon. Estiĝis granda diskutado pri la broŝuro de Lanti "La Laborista Esperantismo", ĉar ĝiaj diroj ne ĉiam akordiĝas kun la opinioj de la nun ekzistantaj parti-tendencoj. Mi opinias, ke la Direkcio ne agis konsekvence. Sen interkonsento kun la Progr. Komisiono k la Plenum-Komitato ĝi eldonis broŝuron "kvazaŭ-programan". Ĝi ne estis diskutita ĉe SAT-Kongresoj. Ŝajne ĝi estis oficiala, sekve devis esti gvidlinioj por ĉiu SAT-ano. Sed multon el ĝi povus akcepti nek tiu, nek tiu, nek aliaj K-doj. Burĝa profesoro leginte "La Lab. Esp-ismon", diris al mi: "Mi subskribas la tutan verkon ĝis la fino; nur mi ne komprenas, kiel SAT estas klasbatala organizo. Oni ja ĉion tion povas akcepti." Bebel diris iam: "Se malamiko laŭdas mian faron, mi ekscias, ke mi faris grandan eraron..." Jen ekz. ni legas sur pĝ. 4[2]: "...ĉiu klaskonscia laboristo bone komprenos, ke li ne

[1] Pĝ. 45 en la broŝuro: "Protokolaro de la 8-a SAT-Kongreso". (Eld. SAT, 1928.)

[2] "La Laborista Esperantismo", Eldono de SAT, 1928.

povas konsenti kun tia mallarĝa difino pri esperantismo. Ni ne havas la naivecon kredi, ke esp-o povos resti eterne nur helpa interkomprenilo k ne elpuŝos la naciajn lingvojn..." Tio estas persona opinio. Ankoraŭ la nacia problemo en la imperialisma epoko ne estas solvita. Helpa lingvo ne povas forpuŝi naciajn lingvojn. La unua frazo de l' I-a ĉap. diras: "Kio karakterizas plej bone la evoluadon de la Homaro, tio estas ĝia tendenco eliri el mistika stato k celadi al racieco." Sed la mistikismo regas. Multaj estas mistikuloj, eĉ klasbatalaj laboristoj. Oni devas pruvi tiujn argumentojn. Ĉiuj aferoj estas ligitaj kun la evoluo de la ekonomiaj produktadfortoj, sed oni ne povas paroli pri evoluo al racieco: Ne estus tiom da stultuloj, kiuj dependas de la milito. Sur pĝ. 6 estas komparo inter multlingveco k teknikaj progresoj (fervojoj, aeroplano, aŭtomobilo). Ni scias hodiaŭ, ke ĉiuj lingvoj estas iom artefaritaj, aŭ kontraŭe, oni povas diri, ke esp-o ne estas malpli natura ol aliaj lingvoj. Ankaŭ tiu aserto en la broŝuro ne estas pruvita. Sur pĝ. 9 ni legas, ke Zamenhof "per multjara praktikado de sia lingvo sukcesis doni al ĝi vivon k animon". Tio ne estas vera. Z. nur iniciatis la lingvon, sed vivon k animon donis al ĝi ĉiuj K-doj, kiuj kunlaboris k -as. Esp-o estas kolektiva kreitaĵo. Konstanta praktikado donas al ĝi vivon. Sur pĝ. 12 troviĝas frazo, ke esp-o eniris la socian vivon, sed ke "grandega plimulto da lab. gvidantoj faras nenion por apliki la solvon". Ni ne uzu tiajn danĝerajn argumentojn.

Nun kritikas K-do Muravkin la alineon sur pĝ. 14 de la broŝuro, kiu prezentas la aldonon al la 1-a statutparagrafo (ĉijare per ĝen. voĉdonado akceptitan de la SAT-anaro): "SAT, ne estante politika..." ĝis — "...kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo k kulturo"[1]. Li diras: 1. Tiu alineo estas tro multvorta; 2. en ĝi estas dirite, ke SAT estas supertendenca organizo. Ni estas unuiĝo el divers-tendencanoj. Ni ne celas krei novajn instruojn k porti al la proletoj: ni nur celas "utiligi praktike la intern. lingvon esp-o por la klasaj celoj de la lab-istaro tutmonda" (laŭ la Statuto). Ni nur deziras komune kunlabori kun ĉiuj. Oni ne parolu pri "supertendenceco". Oni devus diri "ekstertendenceco". Kvazaŭ ofendo al la div. partioj estas la frazo: "...per komparo de faktoj k ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj" (pĝ. 14). Tio tute ne estas. Niaj membroj estas penskapablaj. Tiajn diskutadojn ni devas eviti. SAT tute ne havas la celon fari iujn diskutojn k kompari div. parti-programojn. Sur pĝ. 17 temas denove pri "superpartieco". Oni legas: "Nenio en SAT kontraŭstaras al iu ajn lab. organizo." Tamen oni uzas la vorton "superpartieco". Sur pĝ. 18 (supre) ni legas: "SAT estas superpartia. Ĝia aparato ebligas al anarkistoj, al komunistoj, al sindikatistoj, al socialistoj interrilatiĝi, interkonatiĝi mondskale k ricevi informojn, kiujn ili povas utiligi polemike ekster SAT kontraŭ malsampartianoj, malsamtendencanoj." La Direkcio komencis polemikadi k tiel la polemikoj estis transportataj en SAT-on. Tion ni nepre devas estonte eviti. Ankoraŭ estas div. punktoj. Vi paciencigu pro la longeco de miaj paroloj. Sed estiĝis ja malgranda krizo en SAT. Oni devas esplori la nunan situacion k trovi la vojon por resanigi la Asocion por komuna laboro.

En pĝ. 22 Lanti komparas la relativecon k diversecon en sociologia agado kun la geometriaj aksiomoj, kiuj oportunas por la sama celo. Mi mem havas ian rilaton al la scienca fako k ne konsentas pri tia elmeto de la problemo. Oni ne ĉion povas akcepti, sed oni devas atingi interkonsenton pri io. Racie pensantaj homoj, kiuj havas div. principojn k estas spirite samfortaj, ili povas 10 jarojn diskuti senrezulte. Ĉar ilia opinioj venis el diferencaj premisoj. Same en lab. movado ni akceptis klasbatalan bazon k ni havas tiurilatajn principojn, kiuj tamen tute ne interesas nin. Tiuj principoj por ni ne estas relativaj, sed absolutaj. Rilate al la ĉapitroj pri kulturo, eduko k klerigo (pĝ. 21/23) la elmeto de l' problemo estas la sama kiel ĉe la burĝoj, ne koncernas al la proleta kulturo. Ni kreu nian kulturon, ni ion alian ne celu sciigi. Sur pĝ. 26 ni trovas ideojn pri sennaciismo, ne enmeteblajn en programon aŭ program-similan broŝuron. Ĝuste tiuj samaj ideoj estas regule propagandaj en "S-ulo". Ni ne interesiĝas pri teoriaj demandoj, ni ne diskutu privatajn ideojn, sed ni donu en la gazeto nur raportojn. La "kvazaŭ-oficialeco" povas al ni malhelpi en nia laboro. Ni legas tie (pĝ. 26): "Esperantio fariĝis kvazaŭa regno super la aliaj." Se tio estas vera, SAT estus sekto. Ni ne estu sekto, ni estu unue klasbatalantoj k nur due esperantistoj. Pri ia "regno" ni do ne povas paroli. Ekzistas ŝajne div. rimedoj por agi, sed por ni nur povas esti tiuj samaj rimedoj, kiel por aliaj lab. organizoj, sed tute ne privataj. En pĝ. 28 troviĝas du citoj de Lenin k Marks ne taŭglokaj. La tria cito (laŭdire de Lenin, pĝ. 29) estas farita laŭ fuŝtraduko el franca eldono. Miaopinie estas ofendo al niaj koloniaj K-doj la frazo (pĝ. 28): ..."la popoloj, kiuj ne kapablas tiri profiton el la naturaj riĉaĵoj, troviĝantaj en 'siaj' landoj, ne rajtas laŭ natura leĝo malhelpi aliajn utiligi tiujn riĉaĵojn". Laŭ tio ekz. la angla armeo havas rajton fari "ordon" en Hindio. Neniam la klaskonsciaj laboristoj pri tio konsentos. La aserto "kontraŭbatali la imperialismon signifas bari al la historia procezo, kiu tendencas nepre al starigo de mondmastrumado k mondlingvo" (pĝ. 29) estas nepruvita. Ĝuste per la kontraŭbatalado al imperialismo oni alproksimiĝas la socialismon. Konklude — mi plendas, ke la Direkcio mallojale agis kontraŭ nia (program) komisiono. Tiel oni ne povas kunlabori. Kvankam ni estas elektitaj de ambaŭ Kongresoj. Nun vi certe ankaŭ demandas, ĉu la komisionanoj prezentis novan program-tekston? Ne — ni atendis la opinion de la SAT-anoj. Ni deziras studi k elekti la plej bonon, kio estus klarigo por la paragrafo 1-a de nia Statuto. Ni certe ŝuldas ĉiujn tiujn polemikojn al la Direkcio, kiu mem komencis mallerte la diskutadon. La direkcianoj uzis argumentojn, kiuj estas uzataj de la burĝoj. Tio estas konscia aŭ senkonscia reviziismo de la principoj, al kiuj ĉiuj klasbatalaj laboristoj konsentas. La diskutado en "S-ulo" estas finita, sed eĉ la proponoj, kiuj venis antaŭ tiu finiĝo, simple ne estas presitaj en "S-ulo". La antaŭa Kongreso konsentis, ke Programo estas dezirinda. Mi faris la studojn k submetas ilin al la Kongreso. Mi proponas, ke unue oni forigu la internan krizon, kiu estas kaŭzita de la mispaŝoj k reviziismo de SAT-Direkcio k poste elektu novan Komisionon el fidindaj K-doj el ĉiuj tendencoj.

K-do Bässler: Ni ne malhelpis K-don Muravkin finparoli. Evidente kulpas la prezidantaro; ni konfesas tion. Ĉar programkomisiono ankoraŭ ne estas likvidita. Oni koncize pridiskutu ĉiujn aferojn.

K-do Muravkin: Pri la program-afero ni nur parolu post la laboro de l' propon-komisiono. K-do Naue plendas pri malŝparo de la tempo. Venas propono de 4 K-doj, limigi la debatparolon je nur 30 minutoj. K-do Lanti: Mi konsentas, se tio ne rilatas al la estraro de SAT. Ĉar por rebati k respondi al 4—5 K-doj, mi ne povas kontentiĝi per duona horo. K-do Bässler: Kompreneble tiuj K-doj, kiuj raportis, ne estas tuŝataj de tiu decido. K-do Wendt opinias, ke eĉ sufiĉus 20 minutoj po parolanto k faras tiucelan proponon. Ĉi tiu lasta prop. estas akceptita kontraŭ nur kelkaj voĉoj. Samtempe oni protestas kontraŭ la bruego en la salono, la el- k enirado.

K-do Scheibler (Wurgwitz) prezentas en la nomo de SAT-anoj el Freital k Wurgwitz jenajn proponojn pri interrilatoj inter SAT k LEA (laŭ senco de K-do Deubler):

1. SAT estas la sola proleta mondorganizo esp-ista;
2. SAT havas a) aktivajn, b) pasivajn membrojn; ĉiu esp. lerninto estas aktiva (SAT-ano), ĉiu esp. lernanto estas pasiva (LEA-ano) inter la SAT-organizo;
3. SAT-ano aliĝas al SAT-distrikto, la samdialektaj distriktoj al SAT-sekcio (LEA), la esprimo "izolito" estas neakordigebla al proletaro;
4. SAT eldonas semajne 2 gazetojn: a) SAT-organo por aktivaj (Sennaciulo ekz.), b) SAT-organo por pasivaj (Lernanto ekz.); jare jarlibron por ĉiuj.
   (Ĉiu LEA-sekcio eldonas semajne — se necese — folion dialektan, kiun oni aldonas al "Lernanto"); la formato por ĉiu eldono estu la sama kiel la "Lernanto".
5. SAT-distrikto pagas ĉion (15% por administracio) al sia LEA-sekcio; ĉiu LEA-sekcio ĉion (20% por administracio k LEA-aldonoj) al SAT-centrejo;
6. SAT-ano pagas je komenco de kvaronjaro ½ dolaron al sia distrikto; (Dialektan sekcion — ekz. germana, franca, angla, rusa, ktp. — kreos SAT-anoj, kies gepatra lingvo [dialekto] estas germana ktp.). SAT-anoj sen gepatra lingvo (la celo de SAT) nur povas esti aktivaj k. pagas ĉion al SAT centrejo; tiuj ĉi SAT-anoj kreu SAT-sektorojn.
7. SAT-distrikto povas krei grupojn kun (aŭ sen) eksterbuĝeta alpago.

K-do Bässler proponas transdonon de tiu materialo al la kunsido de SAT-k LEA-reprezentantoj, ĉar ne temas pri speciala SAT-afero.

K-do Batta (Vieno): Antaŭ 10 jaroj, ĉe la fondiĝo de SAT, trapasis revolucia ondo Eŭropon. Sed kion ni hodiaŭ povas konstati? Dum la pasintaj 10 jaroj okazis multaj aferoj, multaj ŝanĝoj. Nun ni staras antaŭ granda afero. Ni mem spertas tion ĉe ni, vidas ĝin en "S-ulo". Speciale K-do Lanti, kiu siatempe estis revoluciulo, ŝanĝiĝis. Li ne plu havas tiun ideon kiel antaŭ 10 jaroj. Revolucio ne fariĝis. Ni restis en la plej terura sociordo. Tiel ankaŭ SAT komencis refaleti. Mi demandas vin, kiuj vi estas pli klaskonsciaj k antaŭenemaj, ĉu tiu organizo, en kiu ni ĉiuj kuniĝas, restu plue klasbatala organizo, aŭ restu stagnado, reformista aŭ kia organizo. Se vi volas batali, do SAT restu. Vieno estas ekzemplo por la tutmonda lab. movado. Efektive ekzistas en Vieno bonaj laborantoj por la socialista movado. Jes, estas granda amaso, sed ne estas laborantoj por nia ideo. Vieno estas fama pri la konstruado de socialismo. Ni havas K-dojn, kiuj pli multe laboras por tiuj movadoj. Sed finfine — nenio estas en la partia laboro. Centmiloj da laboristoj estas, k ili vivas bonege, sed por la serioza socialista laboro ili ne volas oferi. Ili loĝas lukse. Ili ne plu oferas por la socialista movado. La ilo estas egala, sed ni bezonas batalantojn por la nova sociordo, kiun same

[1] Vidi la voĉdonilon.

deziras socialistoj k komunistoj. Ĉu SAT estu nur tia, kiu kunligas div. tendencajn laboristojn, eĉ etburĝojn, sed ne havas sencon por la klasbatalo? Ni nur bezonas batalantojn, ne tiujn, kiuj nur fruktojn ĝuas, sed nenion donas. Ni havas Direkcion. Kiun ni kulpigu? Mi kredas, ke K-do Lanti vere reprezentas la tutan SAT-Direkcion. Kaj estas memkompreneble, ke la nomo Lanti ofte estos sur la tagordo. Por kio ni ĉi tie batalas, riproĉas, kritikas? SAT ne estu etburĝa. Ĉi tie en Leipzig, kie plej multaj K-doj estas reprezentitaj, bone diskutu pri la afero. Ĉar ŝajne ĝi dum la lastaj jaroj ŝanceliĝas. Pripensu k agu, ke SAT plue restu k servu por la klasbatalo!

K-do Drezen (Moskvo): Ĉi tie ni devas de la komenco mem klarigi la aferon. Kaj la K-doj, kiuj ne konsentas, devas same malkaŝe diri sian opinion. Ni pensas pri la gvidado de SAT, la Direkcio k la estonta fariĝo. Muravkin faris grandan movadon, akademian paroladon, sed li ne sukcesis akrigi la problemon. Mi akcentas, ke mi ne nur parolas je mia propra nomo, sed ke mi parolas je la nomo de pli ol mil SAT-anoj sovetiaj, kiuj ne povas veni ĉi tien. La gvidantoj de SAT faris 3 pekojn aŭ krimojn, jes — krimojn, ne persekuteblajn de leĝa vidpunkto, sed tamen estas krimoj — kontraŭ la revolucia tradicio: Temas pri 1. politika, 2. taktika, 3. persona krimoj. — 1. Politika: Dum la lasta jaro la SAT-Direkcio komencis subfosi nian pozicion. (Köckeritz: En Praha ni komencis!) Oni povis subŝovi al la marksisma internaciismo ian nebulan "sennaciismon". Laŭ la difino de Karl Marks la internaciismo devas servi al la kunligo de la proletaj amasoj por la estonto. Oni prezentas "sennaciismon" kvazaŭ kun celo, ke ĝi unuigu mezurilojn, starigu ekonomion k mondmastrumadon unuecan, tutmondan. Tio estas akceptebla de ĉiu burĝo, de ĉiu partiano de sistemo de Telor. Mi ne akceptas resti en tia SAT. Certe estas ia diferenco inter internaciismo k sennaciismo. Sed ni ne artefarite elpensu novajn difinojn, kiuj fuŝas nian tagordon. Burĝoj certe nun estas pretaj veni al ni. Eĉ en la Statuto tia titolo ne ekzistas. Mi ne citas aliajn politikajn erarojn. Mi povus doni multajn argumentojn k citaĵojn. 2. Taktika: La Direkcio kulpigis Sovetiajn K-dojn, ke ili volas komunistigi SAT. Estas malvero. En 1923 mi eble eraris, k mi efektive faris tian proponon. Sed depost la Kassela Kongreso neniu sovetia esperantisto faris ian provon en la direkto komunistigi SAT. Ĉu iu povas doni pruvon dum tiu jaro? Ĉu ni atakis socialistajn K-dojn kunlaborantajn? Ĉiam ni vidis komunajn celojn k taskojn. Neniu povas nei tion. Kion faras la Direkcio? Ŝanĝiĝis tendencoj; aperas eldonaĵoj, — libro k div. artikoloj en la gazeto —, kiuj celas kontraŭmeti specialan ne partie akceptitan ideon. Ni tute ne postulas, ke oni nepre defendu la komunistan vidpunkton. Tio estus sensenca k tute ne utila. Sed oni ne kritiku tiun vidpunkton. Ĉu ni pretendas esplori la vidpunktojn de grandaj organizoj? Mi konstatas, ke tio estis taktikaj eraroj. Rezulte de tiuj eraroj la situacio de SAT treege malboniĝis en certaj rondoj. La Direkcio devis vidi tiun aferon. 3. Personaj eraroj: La Direkcio permesis al si propagandi ideojn de certa persono: Lanti. En nuna momento li eraras k eluzas malbone sian influon je nia movado. Ankaŭ en la multnombraj "Inter Ni" (en "S-ulo") troviĝas tute ne oficialaj ideoj, tute kontraŭaj al vidpunktoj de aliaj K-doj; ideoj taktike malĝustaj. Ŝajnas nun necese malhelpi tian agadon. Tre valoraj estas por ni ĉiuj laborantoj. Kaj por Lanti trovi anstataŭanton oni ne povas. Sinceran revoluciulon ni devas meti en tian situacion, ke li ne plu povu erari tiel rapide. Ni vidas en GLEA potencan esp. movadon. La Franca lab. movado estas malforta. Nin tute ne interesas la politikaj frakcioj, ĉeestantaj ĉi tie. La gvidado estu en la mano de la laborista klaso. Ni devos forpreni ĝin de lokoj, kie la movado estas izolita, k porti ĝin en lokon kun forta movado. Mi ne citas urbon. Tion decidu la Kongreso. Sed necesas, ke niaj gvidantoj estu pli ligitaj kun la amaso, ne plu tiom izolitaj. Lanti perfekte povos gvidi eĉ nian revuon en Parizo. Ĝi daŭros aperi sub lia gvidado. Sed la personaj eraroj estas tro grandaj k la danĝero tro grava, ol ke ni povus silenti. (Aplaŭdo[1].)

K-do Bässler donas kelkajn informojn pri fakkunsidoj, vizitoj ktp. k fermas la kunsidon ĉ. la 17-a h.

Posttagmeze je la 17.30 h. okazas la parolado de K-do Drezen pri moderna sociologia lingvo-scienco k mondlingvo en la kadro de la Intern. Proleta Altlernejo. Vespere estas div. fakkunsidoj, precipe la granda sportula fakkunsido en la Lab. Gimnast- k. Sportlernejo.

Kvara laborkunsido, 7-a de aŭgusto matene

K-do Deubler prezidas k malfermas je la 9.30 h. K-do Bässler donas kelkajn sciigojn, legas salutlet. ktp.

K-do el Ĉinio: Ni ĉiuj mature pripensu la programaferon. Ekzistas frakcioj ĉe SAT. Tio necesas en proletaj aferoj. Ni ne faru sekton el SAT. Ni laboru en la frakcioj por niaj partioj, por iliaj celoj, ĉar ni estas la plej konsciaj internaciistoj k scias, ke estas necese, ke la proletoj unuiĝu pere de esp-o. Ni petas la Program-komisionon konigi la tekston, kiun ili volas doni al SAT.

K-do Lanti: Hieraŭ posttagmeze dum la tuta tempo vi povis aŭdi senĉesajn atakojn kontraŭ la Direkcio de SAT k precipe kontraŭ K-do Lanti. Senĉese oni aŭdis tiun vorton. Vi konsentu, ke en tiaj kondiĉoj povas esti, ke nevole mia rebato havos eble iun personecan karakteron. Mi esperas, ke ĉiuj el vi bone komprenas, ke mi ne estas tia homo, preta ricevi batojn sur la maldekstran vangon k poste prezenti la dekstran. Ni staras ĉe historia momento de la vivo de SAT. Mi deziras, K-doj, ke ĉiuj el vi konsciu pri tio. Ne temas diskutaĉi, sed preni plej gravajn decidojn. Ĉiu devas kompreni la gravon de la momento k konscii pri la respondecoj, kiujn li havas antaŭ la Historio de la esp. lab. movado. Ni estas akuzitaj pro reviziismo. Ŝajne, subite la tuta SAT-aparato, la SAT-Direkcio, ŝanĝis la vojon. Kvazaŭ mirakle; oni apenaŭ povus kompreni tion. Estas certe necese, ke ni esploru tiun aferon sufiĉe detale. Mi kompreneble ne povas rebati al ĉiuj punktoj, kiuj estas hieraŭ metitaj. Por respondi al ĉiuj, mi bezonus la tutan tagon k eble eĉ tio ne sufiĉus. Mi tamen notis kelkajn el la plej gravaj. En la letero de K-do Fade, kiun oni unue legis, la unua rimarko estis pri iu artikolo el "S-ulo" sub la titolo "Dubi". Oni riproĉas enmeton de tiaj artikoloj. Por karakterizi tiun riproĉon, mi petas la prezidanton laŭtlegi tiun artikolon. Kia stranga spirito ŝoviĝas en nian movadon! Ĉu oni volas fari el la SAT-anoj mutulojn? Malfermu viajn orelojn! (K-do Deubler legas tiun artikolon kun la rimarko, ke li mem elektis tiun artikolon kiel ekzercan taskon por "Der Arbeiter-Esperantist", ĉar ĝia enhavo tiel bone plaĉis al li.)

Dubi

La intelekta libero, aŭ Saĝo, ĝi estas la dubo. Ordinare tio ne estas bone komprenata. Sed kial? Tial ke ni konsideras kiel dubemulojn homojn, kiuj pensas kvazaŭ ludante, sen obstino, sen sekvo; tiaj homoj estas nur mallaboremuloj. Dubi, ĝi estas ekzameni, ĝi estas malmunti kaj remunti la ideojn, kvazaŭ ili estus radaroj, sen antaŭjuĝo, sen trorapidiĝo, celante forigi la kredemon, kiu estas potenca en ĉiu el ni.

Oni maljuste prijuĝis Montenj[1]; kaj sendube pro tio oni ne sufiĉe legas liajn verkojn. Kaj laŭ kio oni juĝas lin? Laŭ lia "ĉu mi scias?", kiu tute ne estas lia lasta vorto, sed kiun li nur proponas al tiuj, kiuj volus dubi pri ĉio pro sofisma ludo, kiel la malplej aserta formulo. Kaj laŭ tio, ke la dubo estas ia "mola kapkuseno por bone farita kapo". Sed tiuj du formuloj tre malbone prezentas unu el la plej viglaj pensuloj, kies verkoj estas legeblaj. Pro kio? Pro lia tuta sincero, ŝajnas. Li estas homo, kiu vere pensas, ne por aliaj, sed por si mem, kaj kiu faras la inventaron de siaj pensoj, kiu pesas ilin, kiu prilaboras ilin, kiu metas ilin en la fajron de l' kritiko, sen indulgo, sen respekto. Kiam oni atente legas lin, oni komprenas, kiom da homa forto estas necesa por dubi. Dubi estas penega laboro, kiel forĝi.

Renuvje[2], forta pensulo ankaŭ, sed pli abstrakta, malpli natura, malpli forĝista en sia maniero, faris rimarkon tre simplan, sed tre trafan, ĝi estas, ke frenezulo neniam dubas. Frenezulo estas homo, kiu kredas ĉion, kion li imagas. Tiu stato, kiu ŝajnas al ni monstra, tiom fremda al ni, ne tiom mirigus nin, se ni pensus pri la varieco kaj nekonsekvenco de niaj revadoj kaj sonĝoj. En dorma stato ni ĉion kredas. Kion signifas vekiĝi kaj rekonsciiĝi? Ĝi estas forĵeti kredojn. Ĝi estas diri: ne. Ĝi estas pensi kontraŭ la ideon, kiu sin prezentas. Ĝi estas dubi.

La timo estas animala sento tre forta. Kaj kion ĝi liveras al ni? Tujan kredon. La timo estas tiranie aserta. Mi timas lupon, mi ĝin vidas, mi forkuregas; ju pli mi kuras, des pli mi kredas; mia forkuro valoras pruvon. Ĉe ĉiu dogmemulo ekzistas io simila. Li asertas, li ekbatalas, li kuras. Li sin ĵetas sur ideojn per sia tuta pezo, kiel hundo sur leporon. Tia pasio faras la oratoron; ĝi estas danĝera speco, tro admirata. Esti emociita, kriadi, kredi, ĉio tio ĉi estas animala. Montenj kuraĝis skribi jenon: "La obstinado kaj ardo de opinio estas plej certa pruvo pri stulto. Ĉu estas io pli certa, pli decida, pli malŝata, pli meditaspekta, pli malpetolema, pli serioza ol azeno?" Kaj ne eraru pri la rideto; ĝi estas la rideto de atleto, kiu levas halteron.

Alen.

El la franca tradukis Herezulo.

Vi aŭdis la artikolon, k ĉu vere iu el vi trovas en ĝi ion riproĉindan? Kian do kazernon oni volas fari el SAT se tiajn artikolojn oni ne plu povos loki en "S-ulo"? Ĉu ni konsentu al tio? Mi, neniam. En la sama letero de la sama K-do li citas alian artikolon "Inteligento". Ni ne legu ĝin, kompreneble. Sed riproĉo al tiaj artikoloj estas sufiĉe simptoma. Estas parolite pri Sandino. Jes, ni raportis pri Sandino en "S-ulo". Eĉ lian portreton ni

---

[1] Kiel konate, K-do Drezen parolas tre rapide k pro tio ni ne garantias, ke nia stenografaĵo estis senmanka. Almenaŭ restas al ni klare en la memoro, ke la esenco de la parolado de K-do D. celis montri, ke la Direkcio de SAT ne plu devas resti en Paris sed veni en Germanion, k ke tio estas nepra kondiĉo por ke la Sovetiaj K-doj povu konsenti resti en SAT. — Bart.

[1] France: Montaigne.
[2] France: Renouvier.

publikigis k n e karikaturon. Tio signifas, ke en "S-ulo" ni ne kontraŭas al la politiko de Sandino, al la batalo de S. Ni publikigis tute lojale la vidpunkton de la K-doj, kiuj opinias, ke S. laboras por la bono de l' Proletaro. Neniu povas nei tiun fakton. Pri la sama Sandino, estas vere, ni publikigis ankaŭ 1 aŭ 2 artikolojn, kiuj subtenis la vidpunkton, ke tiu "heroo" tute ne agas por la bono de la Proletaro. Tiuj artikoloj estis de K-do Muribo (Oslo), kiu havis specialan dokumentaron pri S. Per tiuj faktoj vi povas konstati, ke ni rilatas tute lojale al ambaŭ vidpunktoj, al la diversaj opinioj. Ĉu tio estas reviziismo? Ĉar ni parolas pri Sandino, notu, ke la devizo de la "heroo" el Nikaragvo estas: Patrio k Libero. Sandino estas ja granda patrioto. Kaj estas K-doj, kiuj per la projekto de Programo volas malpermesi al la patriotoj esti SAT-anoj! nu, tiru mem la konsekvencojn. Pri superpartieco: Oni volas kredigi, ke SAT estas organizo, kiu celas superi la partiojn. Oni kritikas pri tio. Ni perdas la tempon, se temas pri ludo de vortoj (sen-, super-, ekster-partieco). Se oni opinias, ke la vorto "superpartieco" endanĝerigas SAT, nu, volonte mi konsentas, ke oni forigu ĝin.

Poste parolis K-do Muravkin: 1. Li rimarkigis, ke ni rifuzis publikigi la opinion de niaj bulgaraj K-doj. Ne tute vera: Ni publikigis parton, kvankam ni decidis antaŭe ĉesigi la diskuton, kiu tiom naŭzis la legantojn. Ni aperigis laŭ ili "nur artikolojn, kiuj favoris al la Direkcio de SAT". Fakte ni publikigis artikolojn por ni tre ofendajn, en kiuj oni eĉ nomis min "malhonestulo". Kiu scias? eble Lanti estas ja malhonestulo. Mi ne povas mem juĝi pri tio. Ĉiuokaze Lanti ne forstrekis tiun vorton en la manuskripto. Ni publikigis la artikolon tia, kia ĝi estis verkita. En aliaj artikoloj same ofendajn vortojn oni povus trovi. Ni publikigis tiun materialon, sed ne mankis materialo favora al ni: male ni posedis abunde favorajn al ni artikolojn. Ĉe la enmeto de artikoloj eĉ pli nombraj estas tiuj malfavoraj al la Direkcio ol la aliaj. Eĉ multaj K-doj skribis indignite por respondi al la atakintoj. "Ne sendu K-doj", ni respondis. "Ni jam havas sufiĉe da materialo. Ne perdu vian tempon. Ne plenigu la tutajn paĝojn." Ke ni publikigis nur tion, kio favoras al la Direkcio, kiu diras tion, tiu parolas — ni diru ĝentile — "neveraĵon".

En la skizo pri la program-projekto Muravkin rakontis kelkajn malgravajn faktojn. Mi ankaŭ povus fari historion pri tiu Program-afero. Mi ja povus fari... Mi ne faros... Mi nur deklaras al vi, ke la historio, kiun faris K-do Muravkin, estas fantazia, tute ne atentinda. Kaj li tion scias, ke mi diras la veron... Laŭ sama insidema maniero, li rakontis ke "ne bone funkciis la program-komisiono". Kial K-do Rihter ne fidis al la komisiono, al la SAT-Direkcio? Ĉar K-do Rihter estas anarkisto, kiu eksiĝis el SAT, k aliĝis al TLES. Se li "malfidis" al la Direkcio, se li nekonsentis kunlabori, estis simple, ĉar li havis la konvinkon, ke la SAT-Direkcio estas pure komunista institucio. Tial R. ne konsentis partopreni la laborojn de la Programkomisiono. Tion Muravkin forgesis diri k multon alian. K-do Muravkin diris, ke la Direkcio de SAT faris ĉion eblan por malhelpi la laborojn de la Program-komisiono. Nj komparu la diron kun la faktoj: Antaŭ la Göteborga Kongreso ni ja rifuzis publikigi la program-tekston en "S-ulo". Kial? Tial ke la teksto de tiu program-projekto estis publikigita unuafoje en "S-ulo" antaŭ la Viena Kongreso, publikigita duafoje antaŭ la Lyona Kongreso. La ŝanĝoj poste faritaj estis preskaŭ bagatelaj. Ĉu ni havis la rajton uzi la paĝojn de "S-ulo", por presigi **trian** fojon la saman materialon? —

Poste oni atakis "La Lab. Esperantismo-n". Vere, oni faras al mi grandan honoron. Mi neniam povis supozi, ke tiu verketo kaŭzus tiel grandan bruadon. Mi sendube estas sufiĉe naiva, kiel diris K-do Fade en sia letero. Por pli klare montri, ke La "Lab. Esp." montras "reviziemon", Muravkin citas la opinion de burĝa profesoro, kiu eldiris, ke li konsentas kun ĝi. Ĉu tiu grava persono ankaŭ konsentis pri la klasbatalo? (Muravkin respondas, ke krom la klasbatalo oni ankaŭ ĉe la burĝoj povus akcepti la broŝuron). En "La Lab. Esp." mem ĉiam estas substrekita la klasbatalo. Sekve kion valoras la diro de Muravkin? Se Lanti ne plu parolus pri klasbatalo, tiam vi ja devus forpeli min, tiam mi estus malfidela k "revizius". Sed ĉiam mi akcentas la klasbatalon. Ĉiuj sinceruloj devas tion konfesi. Pri internaciismo k kosmopolitismo kelkiuj opinias, ke oni povas samigi tiujn du vortojn. Mi povus longe paroli pri tio. Por ke vi ne pensu, ke mi estas simpla unuopula revemulo tiurilate — simpla mi ja estas, mi ne eĉ havas unuagradan ateston pri lernado — mi citu la opinion de famulo, de la angla verkisto Ŭels (Wells). Li venis antaŭ nelonge en Germanion, faris paroladon ĉe la parlamentejo. Li parolis nature laŭ pacifista vidpunkto. Sed pri la difino de la vortoj li montris, ke la terminoj "internaciismo" k "sennaciismo" ne estas interakordigeblaj, ke oni ne devas konfuzi tiujn vortojn, kiuj fakte estas antagonistaj. Se mia opinio estas fantazia, almenaŭ aliaj gravaj personoj same fantazias. Oni diris, ke estas ofendoj al ĉiuj socialistaj movadoj en mia broŝuro, speciale en la aldono al 1-a statutparagr. Ĉu ne estas strange, ke la samaj K-doj, kiuj troviĝis en Göteborg mem, kiam oni diskutis pri la aldono al la Statutpar. 1, k akceptis tiutempe la aldonon senrezerve, hodiaŭ trovas ĝin danĝera por ĉiuj tendencanoj? Ne havante bonajn argumentojn, por pruvi, ke ni volas revizii ili serĉas pretekstojn; ĉiam, jes, ĉiam oni povas trovi da ili!! En "La Lab. Esp." estas parolite pri geometrioj k partioj: La kompreno pri tio eble ne estas tre facila, ĉar tiu parto estas tre kondensa. Mi do iomete klarigu mian penson: Ekzistas div. geometrioj: la malnova Eŭklida, tiu de Riemann, tiu de Lobaĉeski k. a. Tiuj geometrioj sin bazas sur aksiomoj, kiuj ne estas inter si tute identaj. Kaj tamen per la helpo de tiuj malsamaj geometrioj oni povas konstrui pontojn, domojn, maŝinojn. Tio estas la ĉefaĵo. Simile ekzistas partioj, kiuj celas per diversaj taktikoj forrenversi k detrui la kapitalistan sociordon k starigi socialismon. Mi opinias, ke SAT ne devas decidi, kiu partio aŭ lab. organizo havas la plej taŭgan taktikon, laboras plej efike por atingi la celon — same kiel ni ne volas disputi por ekscii, kiu el la diversaj geometrioj estas plej oportuna. Tiel oni devas kompreni mian komparon en "La Lab. Esp." pri geometrioj k partioj; tiel oni devas klarigi al si mian aludon pri relativeco en ĉiuj fakoj. Parolante pri relativeco mi celis nur instrui toleremon al la SAT-anoj, nenion pli...

En la 5-a ĉap. de "La Lab. Esp." estas parolite pri nova tendenco en la lab. movado. Por ke ne estu miskompreno, mi volas tuj forbalai eblan argumenton. Miaj kontraŭuloj povas diri: Via sennaciismo fakte ne havas radikojn en la lab. movado. SAT devas ja esti akceptema al ĉiuj tendencoj, sed ni ne povas akcepti tendencojn, kiuj fakte ne ekzistas. Tia argumento estus senvalora. La I. W. W. (Industriaj Laboristoj de l' Mondo) en Usono konsistigas tian paralelan tendencon. La titolo de tiu organizo mem montras, ke ĝi havas sennaciecan tendencon. Certe ĝia sennaciismo ne estas tiel klara kiel ĉe tiuj, kiuj aplikas la intern. lingvon ĉiutage, en ĉiuj rilatoj. Sed ke la tendenco ekzistas latente en larĝaj amasoj, estas fakto. La plej revoluciaj elementoj en Usono grupigitaj en I. W. W. estas sennaciemaj. La riproĉoj de niaj kontraŭuloj sekve estas tute senvaloraj. Almenaŭ ĉu ne estas strange, ke tiu mia verketo tiom riproĉata, trovis tamen ĉe la lab. gazetoj esp-istaj tre bonan akcepton? Kiel klarigi tiun fakton, ke jenaj gazetoj favore recenzis la broŝuron? Mi citas nur la titolojn — Nederlanda Lab. Esperantisto, La Socialisto (tiu ĉi gazeto ne vidas ofendon por sia partio en la verketo, ĉar la recenzo estas ĝentila), Antaŭen (de niaj hungaraj K-doj), ISK. En ĉiuj tre favoraj recenzoj. La gazeto de l' IWW en Ĉikago faris ankaŭ tre laŭdan recenzon k eĉ publikigis traduke grandan parton. La. recenzintoj ne rimarkis ion danĝeran, kontraŭan, ofendan al sia partio!... Do la riproĉoj estas nur pretekstoj, por atingi ian celon, kiu fariĝas pli k pli klara. Ni ankaŭ ricevis multajn laŭdajn k aprobajn leterojn pri la broŝuro, eĉ de severe ortodoksa komunisto, sincera homo, K-do Boubou. Li diras, ke tiu verko estas la plej klara propagandilo pri nia movado k nepre bezonata, ke ĝi aperis ĝustatempe ktp. Li ne vidas ion riproĉindan en ĝi. (Lanti citas ankoraŭ la opinion de socialisto, K-do Stay-Bournemouth, ankaŭ instruisto kiel Boubou). Sed oni riproĉas, ke ni ne eldonis "La Lab. Esp." laŭ tute normala maniero: Ni kvazaŭ "ŝtele" eldonis ĝin. Jen riproĉo, kiun ni ekzamenu. Ĝis nun neniam oni prezentis al la tuta gvidantaro la manuskriptojn, kiujn oni eldonas. Kaj plie ne estas vere, ke ni eldonis "La Lab. Esp." kvazaŭ ŝtele. Faktoj nerefuteblaj estas: la manuskripto de l' broŝuro estis aprobata de ĉiuj direkcianoj en Parizo, legata de K-do Platiel, membro de la progr. kom., de K-do de Bruin, tiama membro de la Kontrolkomitato k de K-do Nekrasov, en Göteborg, la sama K-do, kiu plendis hieraŭ kontraŭ la SAT-Direkcio!... Mi emas pensi, ke tiu plendo estas sekvo de kvazaŭa ordono, ke li faris tion kontraŭvole. Ĉu en tiaj kondiĉoj oni prave povas diri, ke la verketo ne estas eldonita laŭ normala maniero? Nun mi ĵus ricevis leteron de K-do Nekrasov k li diras en ĝi jenon"... Vi demandas, kial mi nenion diris al vi en Göt., kiam vi donis al mi por legi vian "Lab. Esperantismon". Nu, mi devas diri al vi, ke laŭ mia opinio ĝi estus tre bona libro, se en ĝi mankus nur kelkaj frazoj... En Göt., kiam mi legis la manuskripton, mi ne atentis la tutan salon de l' afero k mi ne pensis tiam, ke la afero estas tiom grava..." Ĉu ne estas vere miriga, ke K-do Nekrasov ne petis en Göt. ke mi ŝanĝu eĉ komon, k nur post longaj monatoj "vidas la tutan salon de la afero"? Kio okazis intertempe, estas mistero, kiun mi ne povas diveni.

Se tiu broŝuro prezentus oficialan programon de SAT, certe — ni pekus. Sed neniam ni celis trudi ĝin kiel oficialaĵon. Ĉiam ni opiniis, ke deviga programo estus danĝera. Mi plene konscias pri tio.

Nun inter la programemuloj oni kontentiĝos, se oni metos en la programon de SAT prilingvajn tezojn. Nu, se oni volas trudi tiujn tezojn kiel devigajn, ankaŭ ni nepre kontraŭstaros. Sed ĉu ni kontraŭstaris al la eldono de tiuj samaj tezoj formulitaj de K-do Drezen en la "Biblioteko de Sennaciulo"? Jen la tezoj! (Lanti montras la iibron[1]). SAT eldonis tiujn tezojn. Antaŭ la eldono mi neniam legis ilin. Kaj tamen ni ne riproĉis al K-do Drezen pro la eldono de tia verko! Ĉiu komparu, legu, faru al si opinion! Kompreneble ni kontraŭstaros, ke la tezoj estu devigaj, estu programo. Ili ja estas tre diskuteblaj k ne de ĉiu akcept-

---

[1] La vojoj de formiĝo k disvastiĝo de la lingvo internacia.

eblaj. Sekve: la riproĉoj, kiel vi vidas, estas absolute senbazaj. Ili servas por celoj de mi nekonataj.

Al K-do B a t t a mi diru nur jenon: "Lanti ŝanĝis siajn ideojn", plendas tiu K-do. Mi povus meti antaŭ lian nazon la leterojn, kiujn li skribis al mi antaŭ du jaroj, li diris, ke domaĝas al SAT, ke ĝi estas konsiderata kiel pure komunista organizo. Li esperis por la bono de disvastiĝo en Aŭstrio, ke ni forpelu tiun famon. Li havas hodiaŭ alian opinion. Kial? Mi ne scias. Ni esploros eble poste... Oni fine aŭdis K-don D r e z e n. Li havas sufiĉe da aplombo k fortan voĉon, k plie li estas lerta homo; li scias la manieron por penetrigi siajn pensojn en la kapon de la aŭskultantoj. La Direkcio k Lanti faris tri pekojn aŭ k r i m o j n, li diris. Aŭskultu bone: Ni faris k r i m o j n. Politikan krimon ni faris... Eble. La sola krimo estas kredeble, — mi nur konjektas — ke mi ne plu pagis depost 2—3 jaroj miajn kotizojn al la Kom. Partio. Taktika k r i m o! Mi cerbumadis: La krimo kredeble estas, ke mi ĉiam kontraŭstaris al la komunistigo de SAT. Eble tiutempe, kiam mi estis ... membro ĉe la K. P., mi povis pli trafe malhelpi tiun fuŝadon kiu neniel servus la komunismon. Tio certe estis la taktika krimo. Trian krimon ni faris: personan k r i m o n. Sendube estas, ke mi ne havas sufiĉe da admiro por K-do Drezen... Ĉu tio estas mia p e r s o n a k r i m o? Ŝajnas, ke jes, ke estas tio.

Drezen antaŭmetas k o n d i ĉ o j n por daŭrigi la kunlaboradon al SAT. Jen la decida momento. Necesas nun, en tiu ĉi horo, ne morgaŭ, ne posttagmeze, sed n u n, preni decidon pri tio. La kondiĉoj de Drezen estas, ke la Direkcio de SAT devas veni en Germanion. Aliel la sovetiaj K-doj ne plu konsentas kunlabori al SAT. Jen la situacio. Ĉiuj aliaj kongresaj aferoj estas flankaj, akcesoraj. La Kongreso devas decidi, ĉu la Direkcio estu en Paris, Leipzig aŭ Berlin. Plie la urbo estas nenio. Ni volas scii: Kiuj K-doj konsistigos la Direkcion? Se la decidoj de la Kongreso estus aplikotaj de aliaj manoj, ne necesus nun daŭrigi la traktadon pri la raportoj.

Tamen oni proponas konservi Lanti-n en la aparato de l' gvidantoj. Estus malbon-taktike forĵeti t u j tiun Lanti-n, tiun ekspartianon... La Direkcio estu en Leipzig, la presejo, la administrejo en Leipzig. Lanti restu en Paris!, li gvidu "S-ulo"n, kiu estu redaktata en Leipzig!!. La titoloj k ĉio simila estas por mi nenio. Oni ne povas kvazaŭ subaĉeti min per tiaj rimedoj. Mi akceptas titolon de gvidanto nur se ĝi fakte ŝarĝas min per laboro k respondeco; ĉian alian honortitolon mi metas sub la plandon de miaj ŝuoj. Mi tute ne konsentas gvidi iun ajn organon, kiel okazis en la pasinta tempo, el la distanco. La sperto montris, en kia stato estis la gazeto en tiu epoko, kiam Bartelmes redaktis ĝin en Leipzig k mi "gvidis" el Parizo! La kondiĉo starigita k la solvo de l' demando eldirita tio ja estas taktiko, kiu servas por rezervi al si aliajn agojn. Antaŭ kelkaj monatoj mi eĉ ne komprenis la signifon de la propono de K-do Bässler rilate al la Informservo. Nun la afero fariĝas klara: Tio estis la unua paŝo. Mi petas K-don Bässler fari sian rimarkon pri tio k poste ni vidos, vidos... (Aplaŭdado.)

Per voĉdono la parol-tempo estas limigata je 10 minutoj kontraŭ nur kelkaj voĉoj.

K-do B a r t e l m e s : Mi ne volas paroli en tiu ĉi momento pri la teruraj "krimoj", pri kiuj K-do Drezen akuzas la Direkcion de SAT k precipe nian K-don Lanti. K-do L. mem sufiĉe jam rebatis al tiuj akuzoj. Sed mi volas esprimi mian miron pri tio, kion Drezen proponas al la Kongreso kiel praktikan solvon. Mi ne komprenas, ke saĝa homo povas fari tian prop., kiu konsistas el tio: lasi al K-do Lanti la gvidadon, dum la Direkcianoj k la Redakcio estos en Germanio. Ĉu ni ne faris sperton tiurilate? Mi mem estis en 1924/25 redaktoro de "S-ulo" en Leipzig, dum Lanti kiel gvidanto troviĝis en Paris. Fakte tia gvidado ne estis ebla. Kaj la gazeto ne prosperis. Tio estas fakto de neniu refutebla. Nur stultulo povus fari tian proponon hodiaŭ al la Kongreso. Kaj — K-do Drezen ne estas stultulo. Ĉiu scias tion. Se li faras tian prop., sekve estas ia artifiko en la afero. Tio devas esti klara por ĉiuj. Ankaŭ ŝajnas, ke multaj K-doj ne sufiĉe konscias pri la malfaciloj de l' gvidado de tia organizo kia estas SAT. Mi rememorigas vin pri parto el la Raportaro de l' Plenum-Kom., en kiu estas dirite rilate al diskutoj pri div. temoj: "... Tiu spiritostato estas variebla k okazas, ke iutempe oni povas permesi diskutadon pri temo, kiu povus esti nediskutebla alitempe." Jes, vere en tio kuŝas la ĉefa malfacilo por la gvidantoj: konscii, ĉu tiu aŭ alia temo en tiu aŭ alia momento estas diskutebla aŭ ne en SAT. Ĉio dependas de la momentaj cirkonstancoj k spiritaj kondiĉoj. Cetere K-do Lanti rajtigis min konigi al vi konfeson, kiun li faris antaŭ kelkaj monatoj: ke li persone pretas rezigni pridiskuti en "S-ulo" la temon pri nacibatalo (li, la gvidanto de l' gazeto mem, rezignas konigi sian vidpunkton!). Sed — ĉu oni povas peti la samon al la tuta SAT-anaro? Ĉu oni povas malpermesi al ili eldiri sian opinion en "S-ulo"? Jen la ĉefa demando.

Okazas voĉdono pri fermo de la parolant-listo. Tiu prop. estas malakceptita.

K-do B ä s s l e r : Mi deklaras, ke estas fripona ago de Lanti postuli, ke oni konigu la nomojn. Mi ne aŭdis ĝis nun, ke iu kompartiano plendis pro tio, ke Lanti ne apartenas al la kom. partio. Mi asertas, ke ne la membrolibro, sed la agoj decidas. Lanti opinias, ke oni neniel devas kritiki lin. Ĉu ne estas fakto, K-do Lanti, ke mi avertis en la Lyona Kongreso vin k la kongresanojn reelekti program-komisionon? Mi tuj avertis, ĉar mi ne vidis neceson por starigi programon por SAT. Mi konsentas, ke SAT ne estu kazerno. Lanti havis en Göteborg en la poŝo la prespretan manuskripton de "La Lab. Esp.". Li nomis ĝin "kvazaŭa programo". La gvidantaj K-doj eldonis kaŝe libron, kiu estas kvazaŭa programo. Mi asertas, ke la lastjara disputo okazis dank' al la ago de la Direkcio. Oni ne kalumnias k atakas K-don Lanti, ĉar li ne portas en la poŝo membrolibron de partio. Sed revoluciaj klasbatalantoj protestas, ke la Direkcio altrudis al la SAT-anaro kvazaŭan programon. Tie! venis akraj atakoj. La gvidantoj devis antaŭe informi la programkomisionon, ke ekzistas alia projekto. Ĉiu politika programo por SAT estas sensencaĵo... Ni ne bezonas politikan programon.

K-do M u r a v k i n : K-do Lanti atakis min. Do mi devas defendi min ĉi tie. Mi tute sincere faris la deklaron, ke la Program-komisiono estis elektita de 2 kongresoj de SAT. La Progr.-kom. ne povas akcepti riproĉon pro nelaborado. Ni ne insistas pri akcepto de programo. Lanti komencis paroli pri artik. de K-do Fade. Tiu artik. ne estas grava k ne koncernas la problemon. Rilate al la patriotoj mi diru, ke en SAT vere ne povas esti anoj, kiuj dezirus, ke en SAT estu patriotoj. Pri la "patrioto" Sandino: Ne, K-doj, oni povas esti kontraŭpatriota k tamen subteni la politikon de la liberiĝo de l' kolonioj, ĉar tiu politiko direktiĝas kontraŭ grandaj subpremantaj ŝtatoj. Hodiaŭ Usono estas la ŝtato, kiu subpremegas preskaŭ la tutan mondon. Mi ne diris, ke la Direkcio presigis nur favorajn al si artikolojn, sed — ke la diskutado ne estis ĝuste gvidata. La Progr.-kom. ne kulpas; sed estas mallojala ago, se Lanti poste eldonas iun "kvazaŭan programon" k ne atentas la K-dojn elektitajn de la SAT-kongreso. Oni ŝparu lokon en "S-ulo" — mi konsentas kun tio. Sed mi deziris enpresigon de la "programprojekta teksto", por ke kiel eble plej granda nombro da K-doj konatiĝu kun la demando. Mi ne diris rilate al "La Lab. Esp.", ke estas forstrekita la vorto "klasbatalo". Sed mi diris, ke la burĝoj povus konsenti la enhavon de la broŝuro, s e la vorto "klasbatalo" estus forstrekita. Mi ne samigas la vortojn internaciismo k sennaciismo. Mi opinias, ke la unua prezentas transiran periodon al sennaciismo. Ĝuste per la fuŝa diskutado pri tiu verko montriĝas, ke tiu eldono ne estis bona. Kion Lanti diris pri la "prilingvaj tezoj", estas mensogo. Tiuj tezoj ne estas "kvazaŭa programo"[1], kiel estas "La Lab. Esp.". Ni akuzis la Direkcion, ke ĝi mallojale agis k enŝovis ideojn, pri kiuj ne interkonsentas ĉiuj SAT-anoj. Oni nur poste ekvidis la malbonajn paĝojn en "La Lab. Esp.". Tio ne estus okazinta, se oni antaŭe estus elmontrinta ilin.

K-do E r i k s s o n (Stokholmo): Mi protestas kontraŭ la agadmaniero de la Kongreso. Vi perdis hieraŭ la tempon por aŭskulti longajn leterojn. Tiaj leterverkantoj agu laŭstatute, sed ne sendu longajn skribaĵojn, por legi antaŭ la Kongreso. Se ni agas tiel, ĉiu SAT-ano fine verkos hejme leteron k postulos, ke oni laŭtlegu antaŭ la kongresanoj. Mi tute kontraŭas al la parolo de K-do Drezen. Laŭ mia opinio la Direkcio de SAT k Lanti ne faris iujn erarojn, kiel Drezen opinias. Cetere — komence Drezen parolis pri "krimo", poste pri "kulpo", fine nur pri "eraroj". Mi opinias, ke ne estas eraroj faritaj. Ĉiu povas havi sian opinion. Mi ĉiam trovis la artikolojn titolitajn "Inter Ni" tre leginda literaturo. Ni postulas, ke ni mem havu rajton pensi. Kaj ĝuste tiuj artikoloj devigis min pensi memstare, ne pensi laŭ iu modelo aŭ formulo. Mi opinias, ke tio estas grava ebleco por la SAT-anaro havi iun rimedon sin klerigi. Laboristoj estu ne maŝinoj, sed propranime pensantaj homoj. Oni asertis, ke la broŝuro "La Lab. Esp." estas "kvazaŭ-programo". Por mi tio tute ne estis "programo". Ĝi estis "propagandilo", "klerigilo", kiu celas konigi la staton de la lab. esp. movado. Mi deziras, ke la Kongreso kiel eble plej unuanime decidu, ke la ĝisnuna stato en la gvidado de SAT restu ankaŭ en la estonto, almenaŭ — en la plej proksima estonto. Krome mi havas ankoraŭ demandon al la Direkcio de SAT. Mi legis en la lasta n-o de "S-ulo" raporton pri la laboro farita de K-do S o a r e s en Svedio kiel propagandisto k instruisto de esp-o. Mi aŭdis ankaŭ pri konflikto ekestiĝinta inter Gek-doj A d a m s o n k K-do S o a r e s. Kaj Soares estis eksigata el sia ofico ĉe Sveda Lab. Esp. Asocio. Kiel motivon oni diris: ne-SAT-aneca konduto. Ĉu K-doj Adamson aŭ Soares iel raportis aŭ plendis pri tio al la SAT-instancoj?

K-do V i l d e b r a n d (al la tagordo): Ĝuste tiun demandon de K-do Eriksson permesu tuj klarigi al vi: Fakte K-do Soares plendis ĉe la Kontrol-Komitato de SAT. Mi ne raportis al vi pri tio en mia raporto, tial ke ni ĝis nun ankoraŭ ne havis la tempon por fini la esplorojn pri la afero.

K-do P u f f (Frankfurt): En certaj rondoj de nia SAT-anaro oni aŭdas ĉiam la vorton "revoluciema". Mi aŭdis ĝin de la sama rondo, kiel ĉe la 4-a SAT-Kongreso en Bruselo. Iu diris: "Oni

---

[1] Ili tamen estas aprobitaj de la IV-a Kongreso de SEU, okazinta en Moskvo, julio 1928.

devas forigi el SAT ĉiujn social-demokratojn.“ Tiu diro okazis en Bruselo. En tiu tempo oni semis tion, kion hodiaŭ oni devas rikolti. Mi avertis en Bruselo la Kongreson. Mi diris: Oni faru la erarojn; sed oni vidos poste la rezultojn, havos la spertojn. Mi poste ne plu vizitis kongreson, ĉar tie en Bruselo mi estis preskaŭ la sola social-demokrato. Hodiaŭ tiu sama K-do estas revoluci-ema; en Bruselo li estis revizionisto. Kaj al Drezen mi diros: Mi kiel SAT-ano volas esti gvidata de spirite alte staranta homo k ne volas esti regata de iu iama oficiro de carista armeo. Tio estas mia opinio. Oni volas depreni la spiritan kapon de SAT, k poste SAT ne plu ekzistos, sed alia — partia — organizo. Pripensu la voĉdonadon dume, — por ke oni ne agu erare!

K-do Urlich (Bruselo): Mi proponas, ke SAT restu kiel ĝis nun. SAT estas klasbatala movado. Mi konsentas la principojn de SAT, kiuj estas plej revoluciemaj k klasbatalemaj. Nur rilate al la program-afero mi vidas danĝeron por la estonto de SAT. Oni perdis en la 7-a Kongreso en Lyon anarkistojn k poste sekvos la social-demokratoj. Mi ne volas, ke regu malamikeco inter la SAT-anoj kiel inter la partioj. Politikan ideon propagandi povas la SAT-anoj en siaj partioj. Al K-do Muravkin mi diras, ke nek la titolo nek la aranĝo de la libro “La Lab. Esp.“ pravigas supozon pri “programo“. La kontraŭuloj ĝojus pri eventuala nia disiĝo. Kiam SAT estos pli granda, ni povos paroli pri tiaj aferoj, nun SAT restu, kia ĝi estas por la bono de la esp. lab. movado.

K-do Demidjuk (Moskvo): Mi celas diri ĉion al vi, kio premas min kion mi havas en mia animo. Vi scias bone, ke pli ol 200 K-doj volis veni al la Kongreso el Sovetio. Ili restis post la limoj. SAT havas multe pli da praktikaj celoj, ol kio esprimiĝas en tiu ĉi kongreso. Mi devas konfesi, ke estas ĉio farita, por elvoki negativan impreson. Lanti diris, ke K-do Nekrasov agis eble laŭ ordono, skribante tiun leteron al la Direkcio. Certe la tuja penso estas, ke ankaŭ mi en tiu ĉi momento parolas laŭ la fama “ordono el Moskvo“. Kaj fakte mi parolas “je ordono“, sed ne je ordono de Moskvo, sed de tiuj, kiuj delegis min — laŭ ilia komisio mi estas devigata paroli al vi. Mi batalis ĉiam kontraŭ “komunistigo de SAT“ k ankaŭ hodiaŭ mi plue ĉiam kontraŭstaros la emon ĉu komunistigi, ĉu socialistigi aŭ ali-parti-igi SAT. Ekz. la redaktado de K-do Bartelmes en Leipzig estis nebona, estis tro partieca, k mi kontraŭstaris al tio; mi deziris, ke ĉiuj K-doj povu kunlabori en “S-ulo“ k en SAT. Kiam Lanti en la jaro 1922 vizitis nin en Moskvo, li revenante al Okcidento kunprenis de Moskvo la unuajn 7 aliĝojn al SAT. Kaj kion ni vidas hodiaŭ? Kiajn rezultojn ni atingis? Ni havas nun 1700 K-dojn el Sovetio en SAT! Mi ĉiam faris, kion mi povis, por SAT. Sed lastjare preskaŭ 45% da membroj ĉe ni perdiĝis. Tio ne estas la kaŭzo de la plialtigita kotizo. Ankaŭ ne la malbona mon-transpago, sed la eraroj de la Direkcio. Oni diris, ke ni celas skismigi SAT. Se ni celus skismon, ni povus resti sidantaj kun krucitaj manoj sur la brusto, ĉar ĉion farus la procezo sen nia kunago. Ni forpelis nun 750 membrojn. La membraro komencis degeli. Ni batalas por nia deziro resti en SAT, por batali kune kun vi ĉiuj socialistoj, komunistoj k anarkistoj. K-do Lanti citis recenzojn. Jes, sed ili venis de unu flanko. Unu flanko estis ofendata, estas tute egale kiel la alia flanko. La broŝuro kiel la lastjara gvidado de SAT estas klare direktitaj kontraŭ parto de politika programo de politika partio. Se iu komencas per SAT ataki unu el la malsamopiniaj partioj, oni plendas kompreneble. Oni ja ne povas permesi, ke SAT estu uzata kiel aparato por interpartia batalo. Ne tion ni celas. Fakte en “S-ulo“ aperis multaj artikoloj, kiuj estas direktitaj kontraŭ unu el la tendencoj reprezentitaj en SAT. Rilate al la broŝuro “La Lab. Esp.“ mi opinias, ke ĝuste tia broŝuro devus esti nia Programo. Ĝi estas ĝuste tiel verkita, kiel povus aspekti nia programo. Per simplaj frazoj estas klarigita la strukturo de SAT. Pro tio ni devas laŭdi la broŝuron. Sed Lanti aldonis en la broŝuro tion, kio ne rilatas al la Statuto. Tute nebone estas, ke oni trovas en la broŝuro la frazon de Lenin kontraŭ la imperialismo. Ĉu vi legis en “For la Neŭtralismon“ la vortojn pri klasbatalo? Tie estas skribite, ke klasbatalo estas la batalo, per kiu oni celas renversi la kapitalismon. En “S-ulo“ oni nun povis legi, ke klasbatalo estas la batalo de la laboristoj en fabrikoj ktp. por ricevi kelkajn pliajn groŝojn... Tio estas mia impreso. Starigi novan sociordon estas nia celo. Oni laŭtlegis la artikolon “Dubi“: Lanti diris pri la artikoloj, pri ili, kiuj emas ripeti ĉiam la samajn vortojn. Oni riproĉas al la marksanoj, ke ili agas ĉiam rutinece. Tamen estas Karl Marks, kiu diris jenan parolon: “Mi ĉion pridubas.“ Tiaj riproĉoj malhelpas al nia laboro. Tiuokaze ni devus havi specialan diskutorganon, por diskuti k kontraŭbatali. Tia organo ne povas esti “S-ulo“. Ĝi ne estu diskuta organo inter div. tendencoj. Se iuj K-doj estus kulpaj pri tia partiigo, nia “S-ulo“ tamen devas resti sennacieca organo. Nur tion oni enpresu, kion ni vidas per niaj propraj okuloj.

Pri la programo: Lanti diris: Ĝia historio estis fantazia. Nu, bedaŭrinde la aŭtoro forrestas. Bedaŭrinde mi ne povas kontraŭbatali persone tiun politikistaĉon, kiu faris ĉion por okazigi skismon en SAT. Verŝajne estis erarkompreno ĉe Lanti: Laŭ la propono de Drezen la redaktado k gvidado de “S-ulo“ restu en Parizo k nur la Direkcio transiru en landon, kie estas pli forta la movado. Kompreneble estas neeble per distanco gvidi “S-ulo“n. Mi dezirus, ke SAT ebligu al ĉiuj tendencoj agi, montri la veron pri la problemoj: ateismo ktp. Nia ĉefa zorgo estu: eduki. Pri “sennaciismo“ oni riproĉis nur lastjare. K-do Fade ekz. estis unu el la plej fervoraj batalantoj por sennaciismo. Estas io, kio ŝanĝiĝis. Mi ne apartenas al tiuj, kiuj kontraŭbatalas sennaciismon. Mi konfesas, ke la sennaciismo estas nia celo. Nia celo estas sennacieca socio. Al tiu ordo ni iras per la klasbatalo, akrigo de la klasaj fenomenoj, tra la naciaj, koloniaj liberig-movadoj ktp. (Li rakontas nun anekdoton pri kamparano k ĉevalo; pri simpla, neklera kamparano, blankruso, ano de liberigita nacio, kiu estos venigata al sennacieco per la nacia liberiĝo. Li komprenos fine la gravecon de la Lingvo Internacia ktp. Al tio venigos lin la agoj.) Se iu tie ĉi celus skismigi, li celus, ke ni miloj estu ekster SAT. Malgraŭ tio mi estas certa, ke per la klasbatalo, per la laboristaj manoj, ni plej bone povos propagandi sennaciismon al la tutmonda Proletaro! (Aplaŭdo.)

K-do v. d. Heid: Vi aŭdis la proponon de K-do Drezen, ke la Direkcio estu forprenota de Paris. Nu, en tiu okazo oni antaŭe nomu la personojn proponotajn al la Kongreso. Ni ja ne volas doni la oficon al iu domo aŭ objekto, sed al vivantaj personoj. K-do Drezen diras, ke se restas la nuna stato, li ne plu povus resti en SAT. Nu, se li eksiĝas, ankaŭ aliaj eksiĝos. Ni povas observi tiun agadon jam depost jaroj en Germanio. Ĝuste pro tiu agado mi eksiĝis el la kom. partio. Mi eksiĝis el la laborista partio, por resti sincera homo. Forigo de Lanti havus kiel sekvon la disiĝon.

Lanti mem jam kontraŭparolis la div. teoriajn aferojn; li pli bone povis fari tion, ol mi kapablus. Oni nomis lin hieraŭ “krimulo“. Ĉu vi konas K-don Lanti? Mi ne estas por persona kulto. Sed mi estas membro 61. Kaj mi scias, ke K-do Lanti estas homo, kiu malŝatas alkoholon, nikotinon, kiu koncentriĝas sian tutan energion al la progreso de la lab. movado. K-do Demidjuk diris, ke eksiĝis multaj rusaj K-doj el SAT pro liaj eraroj. Tamen ankaŭ la broŝuro de Lanti estas akceptita favore de eminentaj komunistoj. Ankaŭ aliaj akceptis ĝin bone. Nur la teoriuloj faras ribelon kontraŭ Lanti. Tio estas kaŭzo de la eksigo. Oni multe parolas pri klasbatalo. Sed kion diri pri la klasbatalo, tiel kiel ĝi estas perceptata de Komintern? Se SAT subiĝos al la influo de Komintern, se la gvidado foriros de Parizo, fanatike komunistaj SAT-anoj transprenos la gvidadon, tiam SAT-Kongresoj kiel la ĝisnunaj neniam plu povos okazi. Oni vidu la fruktojn de la frakcia laboro en Germanio: La sindikatoj estas kvazaŭ detruitaj, la kultura movado estas disigita, la liberpensula, la sporta movadoj — ĉio pro la frakcia laboro de la komunista tendenco[1]. Oni lasu la gvidadon de SAT en la manoj de tiuj, kiuj estas sendependaj. Jen la faktoj, miaj opinioj, mia konvinko! (Aplaŭdo.)

Sekvas sciigoj de K-doj Deubler, Bässler k Siedentopf pri kunvenoj ktp. Fermo de la kunsido je 12.30 h.

Kvina laborkunsido, 7-a de aŭgusto posttagmeze

Malfermo je la 2.20 h. sub la prezido de K-do v. d. Heid. K-do Bässler donas div. informojn k legas salutojn.

K-do Lanti donas jenan deklaron: Post la diskutoj, kiuj okazis hieraŭ k hodiaŭ matene, ĉiuj havas la konvinkon, ke fakte povas esti miskomprenoj en la atakoj de unuj kontraŭ aliaj. Oni almenaŭ havas tiun impreson. Se ekzistas ia miskompreno, se post pli profunda studado pri kelkaj punktoj oni povas atingi ian unuecon, se oni povas eviti tiajn neripareblajn paŝojn, mi estas konvinkita, ke ambaŭ flankoj, ĉiuj estas pretaj iri unuj al la aliaj. La Direkcio de SAT estis devigata sin defendi, rebati la atakojn, sed ni bone komprenas, ke eble oni povas sincere opinii, ke ni eraris, ke ni faris mispaŝojn. Ni estas simplaj homoj, ni ne estas sanktuloj, nek dioj. Eble ni faris erarojn. Bonaj kamaradoj parolas pri Lanti, kvazaŭ li ne povus peki — tio ĝenas min. Mi pekis, pekas k pekos. Sed se mi pekis, mi ĉiam estas preta frapi la bruston. Kaj se por la unueco de SAT necesas konfesi pekojn, kiujn mi **ne** faris, nu tion mi eĉ konsentas. Tia certe estas la spiritostato de ni ĉiuj en la Direkcio. Mi opinias, se la kontraŭuloj estas en tiu sama spiritostato, oni povas ĉesigi la disputon, formeti la rezervan municion. Kion mi diris mallerte, mi tion ĉiam faris en la praktiko sufiĉe sukcese; mi ĉiam kontraŭstaris k kontraŭstaros al la komunistigo, socialistigo ktp. de SAT. Tiu vidpunkto en la praktiko estas malfacile aplikebla k mi konsentas, ke kelkrilate, detale oni povas erari. Mi opinias, ke tiuj K-doj, kiuj tiom akre atakis min, scias en la fundo de sia koro, ke ni celis la plej bonan. Se tiu mia konfeso pri eblaj pekoj sufiĉos, por ĉesigi la disputon, — neniu estos pli kontenta ol mi...

K-do Drezen: Mi estas iomete konfuzita, ĉar mi intencis paroli laŭeble private. Kaj mi estas devigita paroli kiel reprezentanto de

---

[1] K-do W. Vildebrand, dua protokolinto, rimarkigas, ke, liamemore, tiu lasta frazo ne estas tute ĝusta; devus esti: pro la frakcia laboro de la diversaj tendencoj. Nur K-do v. d. Heid povus diri, kiu el la du frazoj plej bone esprimas lian penson. Tion li faros, se li opinias necese. — E. L.

frakcio ktp. Ŝajnas, — frakcio en tiu senco kiel ĉe aliaj organizoj tamen ĉe ni ne ekzistas. Ni agas laŭ inspiro. Ni tamen reprezentas certan unuecon. Hieraŭ mi ĉi tie prezentis certan opinion de certa organizo, por esprimi al vi tion, kion oni sentis, pensis k opiniis. Mi memoras, ke per tio mi parolis, kiel jam rimarkigis unu K-do, unue pri "krimo", poste pri "eraro" de personeca afero. Kaj la ĉefa afero estis, ke ni timis, ke similaj eraroj povus ripetiĝi. Kaj tiel, kvankam alte estimante K-don Lanti, oni volis transkonduki la Direkcion en alian centron. Hodiaŭ mi tutan tagon aŭskultis la diskutadon. Dolore estas por mi, ke preskaŭ aperas la krizo, la disfalo en la lab. movado. 22 jarojn mi estis pli malbona komunisto ol bona esperantisto. Mi min dediĉis speciale al fako "Lingvo Internacia". Mi pensas, ke tiel ankaŭ al la lab. movado mi faras la plej grandan servon. Tial mi serĉas mezan vojon, por gardi la unuecon. Ni malplej celas komunistigi SAT. Ni devas havi nur garantion, ke neniam estonte okazu similaj eraroj. Ni pensis, ke estus bone krei Direkcion en alia lando. Oni devus ĝin krei en urbo kiel Leipzig. Kiel ĝeneralan sekretarion oni prezentus social-demokraton[1], kiu kapablus okupi tiun postenon. Nu, ni konservu la Direkcion en Paris, sed ni devas havi la garantion, ke K-do Lanti ne refaru tiajn erarojn, ke similaj provoj ne okazu. Kaj eble nia Kontrolkomitato havu la rajton, en okazo se okazus malakceptebla afero, interveni k ĉesigi tiun aferon. Se ni farus tion, mi estus plej ĝoja k mi pensas, ke ni ankoraŭ longe, longe laboru kune. En la koro de la plejmulto la steleto esperanta okupas grandan lokon. La lingva parto estas io pli alta, pli grava, ol ĉiuj aliaj rimedoj. Oni devas kreskigi nian unuiĝon. Ni devas rezigni kelkajn specialajn konsiderojn k opiniojn. Ekskomunistoj k social-demokratoj volis kulpigi la komunistojn pro ilia laboro en SAT. Sed ĉi tiuj faris seriozan laboron. La K-doj erarintaj konfesu, ke ili ne ripetu siajn erarojn.

K-do Lanti: K-do Drezen hodiaŭ ne plu postulas plenumon de la kondiĉo hieraŭ starigita. Li pripensis la aferon, li vidis kelkajn teknikajn malfacilojn. Li deziras iun pli aktivan Kontrolkomitaton. Ni kompreneble povas al tio konsenti. Ankaŭ pri la "eraroj" ni povas interkonsenti.

K-do Drezen pensas, ke la Proponkomisiono trovu la formulon por interkonsento.

K-do Lanti: Ĉar la kondiĉo sine qua non starigita de K-do Drezen estas forprenita, ni ankaŭ volonte montros cedemon. Nun post pripensado oni alvenas al tiu solvo, ke la Direkcio restu en Paris, ke la Propon-komisiono starigu finan tezon por interkonsento. Ŝajnas, ke la konflikto tiel povas esti tute forigita. (Aplaŭdo.)

K-do Demidjuk: Ni devas nun per ĉiuj fortoj subteni la unuecon de SAT. La proponkomisiono tuj solvu. Vivu la unueco de SAT, K-doj! (Aplaŭdoj. — Spontana ekkantado de La Internacio).

K-do v. d. Heid: Vi rimarkas, ke oni solvis en harmonia k kontentiga formo la konflikton. Konfliktmaterialo preskaŭ ne plu ekzistas, k ni povas transiri al la raporto de la Proponkomisiono pri la div. proponoj.

K-do Demidjuk (al la tagordo) proponas ĉesigon pri la proponoj hieraŭ faritaj. Ni nur okupu nin pri la praktikaj problemoj de nia SAT-movado. Post interveno de K-doj Jonas k Muravkin al la tagordo K-do Kaulich (Bruselo) ricevas la parolon kiel sekretario de la propon-komisiono.

K-do Kaulich: Antaŭ ol laŭtlegi la proponojn, la proponkomisiono protestas kontraŭ la averto en n-o 245 de "S-ulo" de la Plenum-Komitato, ke nur proponoj publikigitaj en "S-ulo" estu pridiskutataj. Ankaŭ la nepublikigitaj proponoj estos pridiskutataj. (Li citas la nomojn de la 9 propon-komisionanoj k rimarkigas, ke K-do Eriksson erare kiel 10-a partoprenis.) — Okazas mallonga debato pri neceso tralegi la tutan tekston de l' proponoj, K-do Muravkin parolas por, Deubler kontraŭ. Estas akceptite, legi nur la aranĝitajn (de la komisiono) proponojn. La unua propono estas unuanime aprobita de la Prop. Kom. en jena formo: "La Jarlibro enhavu la nomojn k profesionojn de ĉiuj SAT-anoj. La jarkotizo al SAT estas altigata je ¼. Por tiuj, kiuj ne deziras la aperigon de sia adreso, restas la nuna kotizo." K-doj Deubler k Demidjuk parolas pri la maniero de diskutado pri la prop. Parolu 1 por k 1 kontraŭ ĉiu propono. Akceptita. K-do Deubler komentas ankoraŭ la nunan proponon elmontrante ĝian praktikecon. Ĝi estas akceptita kontraŭ 3 voĉoj.

K-doj Kaulich legas la 9-an proponon, kiu estas parenca al la 1-a. La komisiono aprobis ĝin unuanime en jena formo: "Oni presigu en ĉiu n-o de 'S-ulo' la nomojn k adresojn de Gek-doj, kiuj nove membriĝos ĉe SAT."

[1] Laŭ K-do W. V. devus esti ĉi tie la vorto "favoran" anstataŭ "social-demokraton", kun aldono de la nomo de K-do Wendt. — E. L.

K-do Alzinger (Regensburg) kontraŭparolas, ĉar li trovas malŝparon de loko en "S-ulo" en tio.

K-do Demidjuk klarigas, ke ne ĉiam bezonas esti aperigataj la novaj adresoj, ĉar plej multaj jam estas en la Jarlibro nove preparata; nur la kromaj aperos interspace inter du Jarlibroj de tempo al tempo en "S-ulo".

K-dino H. Dresen (Tallinn) opinias tiun agon neracia, ĉar ne nur membroj legas la gazeton, sed ankaŭ aliaj elementoj.

K-do Muth prop. suplementajn paĝojn al la Jarlibro.

K-do Schweinfurter (Holleischen) aliĝas al la prop. de Demidjuk.

K-do v. d. Heid voĉdonigas, opiniante, ke ni ne bezonos timi la policon, aperigante en "S-ulo" niajn membroadresojn. — La prop. estas akceptita kontraŭ 4 voĉoj.

Prop. 2 pri fondo de ĵurnal-lernejo, malaprobita de la Prop. Kom., estas unuanime malakceptita.

Prop. 3 pri orient-aziaj jaraj SAT-konferencoj estas unuanime aprobita de Prop. Kom. k Kongreso k transdonota al la koncernaj SAT-sektoroj. La samspecan prop. 13 (pri ekstereŭropa SAT-Kongreso) oni decidas unuanime transdoni al la Estraro.

Al prop. 4 (reorganizo de esp. servo de SAT depost 1-a de okt. per presigo ĉiusemajna de raportoj en "S-ulo") estas en la Prop. Kom. akceptita per 7 voĉoj por, 1 kontraŭ, 1 sindeteno, kun jena aldono: "La raportoj ne transiru la limojn de la laŭstatuta neŭtraleco de SAT. — Pri la E. S. respondecas la servanto.

K-do Bässler: Tiu propono likvidiĝas per tio, ke K-do Lanti akuzis la gvidanton de Esp. Servo, ke li volus enŝovi sin en la gvidadon de SAT. Li ne volas influi la SAT-organojn. Li retiriĝas k ne volas fari la laboron, ne volas enŝteliĝi en la aferon.

K-do Deubler: Mi treege bedaŭras, ke K-do Bässler trovis tiujn vortojn. Kvankam mi povas kompreni, ke li ekscitiĝis. Ni aldonis la klarigojn tiel, por ke oni sciu, ke pri la gazetservo ne la redaktoro, sed la koncerna gazetservanto respondecas. La frazo pri neŭtraleco ne signifas, ke la ĝisnuna materialo de l' Servo ne estis bona, ĉar ĝi enhavis materialon parte utiligeblan de socialistaj, parte de komunistaj gazetoj. En "S-ulo" kompreneble li ne ĉiam povus agi tiel. Ĉar tiel li transpaŝus la limojn de l' neŭtraleco. La fakoj mem povus fari la gazetservon.

K-do Lanti: Neniu pli ol mi scias, kiom K-do Bässler faras, faris k faros por SAT. Kaj mi volas deklari antaŭe: Mi komprenas, ke matene li havis kaŭzon por esti ĉagrenata. Estas miskomprenoj, pri kiuj ni ne okupiĝu. Eble la neĝentilaj vortoj al li nun ne plu havas ian signifon. K-do Bässler diris, ke li ne volas ŝovi sian nazon en la Direkcion de SAT. Li estos Plenum-Komitatano. Do li espereble tion faros des pli multe. — Pri la propono mem: tio estas alia afero. La eldono de speciala paĝo por la Servo unuavide ŝajnas al mi doni iom strangan aspekton al la gazeto. Ĉefe pro tiu motivo ni malsimpatiis al la propono mem. Sed se la plimulto opinias, ke nenio malbona estas en la aranĝo, mi ne kontraŭstaros. Sed estas unu malfacilo en la afero. Oni parolas pri 1 aŭ 2 paĝoj de "S-ulo". Se estas nesufiĉe da loko, kiu decidos: Ĉu la materialo de la Informservo estos enmetata aŭ tiu el Paris? Kion forlasi, ĉu nian materialon aŭ la alian?

K-do Demidjuk: Mi plene subtenas Lanti-n. Oni aliigu la tekston: "En ĉiu n-o estu maksimume unu paĝo".

K-do v. d. Heid: Jes, kiu havos la fin-juĝ-rajton pri la materialo? Se tiu div. materialo aperos en "S-ulo", eble ĉiu flanko estos ege ofendata. Ekz. en la lasta 1. aŭgusto en tutmondo okazis manifestacioj kontraŭ la milito. Kvar div.-tendencaj gazetoj en Berlin raportis tute diversmaniere (Li citas la div. nombrojn tre diferencajn unu de la alia). Se tiu materialo aperus en sama n-o, kiu poste estus respondeca? (Ridoj.) La respondecon havas la gazetservanto k ne la redaktoro.

K-do Drezen: Tiu punkto ne estas tiel grava. Por la tuta gazeto respondecas la gvidanto de "S-ulo", sed por tiu speciala paĝo respondecas la gazetservo. Kaj la Kontr. Kom. povos same juĝi pri la gvidanto kiel pri la gazetservo.

K-do Demidjuk: Ŝajne estiĝas konfuzo. Laŭ la prop. kom. respondecas pri tio la gazetservanto.

K-do Lanti: Ni staras antaŭ nova problemo, nova eksperimento. Ni faru la eksperimenton, mi ne kontraŭdiros. Bässler estos mem respondeca, li havos parton da respondeco en SAT. Se en la funkciigo de tiu nova Servo okazos konfliktoj, estu bone komprenate, ke la Pl. Kom. mem rajtos ĉesigi tiun eksperimenton. Kun tiu kondiĉo mi ne kontraŭstaros la proponon.

K-do Muravkin: La Kontr.Kom. de SAT rajtas kontroli tiujn organojn. Do, se estas konflikto estos tasko de la plivastigata Kontr. Kom. kontroli la aferon. Ni ne nun decidu pri la kondiĉo.

K-do Demidjuk proponas baloti 1. principe pri la propono, 2. pri iia prop., ke la materialo ampleksu maksimume 1 paĝon, 3. pri la enmiksiĝo de l' Pl. Kom. Pri la 3-a punkto oni ne bezonas baloti, ĉar la rajtoj de l' Pl. Kom. ekzistas laŭstatute.

K-do Lanti ne plu persistas je sia kondiĉo.

Ambaŭ partoj de la prop. 1. la principa, 2. la limigo de l' materialo je unu paĝo maksimume estas aparte voĉdonigataj k akceptataj unuanime.

Prop. 5 (pri filatelista paĝo): La Pr. Kom. opinias tiun prop. tre infana k ne taŭga por nia Asocio k organo. Unuanime malakceptita de Prop. Kom. k Kongreso.

Prop. 7 (pri elekto de stenografa sistemo): La Prop. Kom. malaprobis per 3 voĉoj kontraŭ 3 k 2 sindetenoj. La Kongreso malakceptas la prop.

Prop. 8 (pri fondo de infansekcio) estas aprobita unuanime de la Prop. Kom. kun la kondiĉo transdoni ĝin al la Direkcio por efektivigo. La Kongreso aliĝas al la decido de l' Prop. Kom.

Prop. 11 (pri komisiono el kontoristoj por kontroli la kontojn de l' Administracio): La Prop. Kom. malaprobis unuanime, ĉar en SAT jam ekzistas Kontr. Kom. La Kongreso malakceptas unuanime.

Prop. 12 (pri enstatutigo pri salajroj de dungitoj ĉe SAT): Malakceptita unuanime de Prop. Kom. k Kongreso.

Prop. 14 (pri libroservo kun filioj k plena katalogo de tuta esp. literaturo): Malakceptita de Prop. Kom. k Kongreso, ĉar finance ne efektivigebla.

Prop. 33 (kiu rilatas la saman temon, eldonon de katalogo) same malakceptita de la Kongr. kontraŭ unu voĉo.

Prop. 15 (starigo de "Kino-teatra paĝo" ĉe "S-ulo") estis malakceptita de la Prop. Kom. per 5:5 voĉoj. Se ni farus tiom da paĝoj, tiam en "S-ulo" restus fine nenio alia ol nur la "paĝoj".

K-do Muravkin proponas akcepti kiel deziresprimon.

K-do Nonnenmann (Stuttg.) deziras, ke foto-fakesprimoj aperu en tiu "paĝo".

K-do Demidjuk: Se estas valora materialo, neniam la redakcio rifuzos enpresi. Kiam mi sendis noton pri filmo, la redakcio enpresis ĝin. Same povus esti pri foto-terminoj k klarigoj pri ili. Mi proponas, ke la Kongreso akceptu la ĝeneralan decidon pri "Paĝoj", kiu forprenas la pluan diskuton pri ili: "La novaj specialaj 'Paĝoj' aperu laŭ la decido de la redakcio nur tiam, se dum 1 jaro montriĝos, ke al 'S-ulo' venas sufiĉe da materialo por 1 paĝo." Oni ofte plenigas tiajn "Paĝojn" per senvalora materialo. Oni aperigu ilin nur en okazo, se dum 1 jaro almenaŭ alfluos sufiĉe da materialo. La Kongreso konsentas kun la diroj de Demidjuk, malakceptante la prop. 15.

Prop. 16 (pri materialo pri seksa demando en niaj organoj): La Prop. Kom. malaprobis k decidis transdoni la aferon al la Direkcio; notas, ke en la manoj de la Literat. Komisiono jam troviĝas manuskripto por libro, kiu temas pri la demando k estu baldaŭ aperigota. — La Kongr. malakceptas la prop. kontraŭ 4 voĉoj.

Prop. 17 estas laŭ konsilo de la Prop. Kom. unuanime malakceptata de la Kongr. Anstataŭe la Prop. Kom. rekomendas akcepton de la Prop. 27 (deviga abono al "S-ulo" de aktivaj membroj), kiun la Kom. unuanime aprobis, kun jena aldono: "K-doj, kiuj estas en mizera stato, laŭ la propono de Perantoj aŭ grupoj estas esceptataj." — La Kongreso akceptas tiun prop. kun la aldono unuanime.

Prop. 18 (pri kreo de Unuigita Esp. Eldonejo por scienc-teknikaj libroj): La Prop. Kom. k Kongreso unuanime malakceptas la prop., dirante, ke ni jam havas Eld. Kooperativon.

Prop. 19 (pri gastigado de mondvojaĝantoj ktp.): La Prop. Kom. kun 5 por, 1 kontraŭ, 2 por ŝanĝo, 2 sindetenoj malaprobas ĝin, rimarkigante, ke en Statuto jam estas simila paragrafo.

K-do Maller (Vieno): En la Statuto ne estas same traktita la afero. Mi ne komprenas la malakcepton.

K-do Vildebrand (Berlin): Ankaŭ la Kontrol-Komitato jam traktis pri tiu afero k rekomendas akcepti proponon tiurilatan. Ĝi estu almenaŭ deziresprimo.

K-do Schweinfurter (Holleischen): La prop. de K-do Stádler rilatas al certa okazintaĵo. (Li citas la fakton.)

K-do Köckeritz (Dresden) kontraŭas enstatutigon. Tio povus endanĝerigi K-dojn, kiuj estas politikaj rifuĝintoj, ĉar ankaŭ aliaj homoj legas nian gazeton. Por mi estas memkomprenebleco, gastigi tiajn rifuĝantajn K-dojn. Tio estas demando de sento k koro. Li subtenas la komisionon.

La propono estas malakceptata de la Kongr. kontraŭ 4 voĉoj.

Prop. 20 (pri normformatoj): Prop. Kom. k Kongreso akceptis ĝin kiel dezir-esprimon.

Prop. 21 (ke memproponoj al la Ĝen. Konsilantaro estu malpermesataj) estas aprobita de la Prop. Kom. per 8 kontraŭ 2 voĉoj. La Kongr. akceptas la prop. kontraŭ 1 voĉo.

Prop. 22 (ke pagataj oficistoj en SAT-instancoj havu konsilan voĉon) estis de la Prop. Kom. aprobata per 7 kontraŭ 3 voĉoj. La kongr. akceptas la prop. kontraŭ 3 voĉoj.

Prop. 23 estis malaprobata en la Prop. Kom. per 4 kontraŭ 2 voĉoj. La Kongreso malakceptis la prop., subtenante la decidon de la Prop. Kom.

K-do Schweinfurter atentigas la prezidantaron, ke en tiu momento estas disdonata en la salono pamfleto kontraŭ K-do Lanti.

K-do Deubler diras, ke en Kassel ni akceptis, ke oni nenion rajtas disdoni en la kongresejo, kio ne estas trarigardita k allasita de la kongresestraro. (Oni transdonas ekzempleron al la prezid.)

Prop. 24 (pri aldono al statuto): La Prop. Kom. malaprobis ĝin per 3 : 3 voĉoj. La Kongreso malakceptis ĝin kontraŭ 1 voĉo.

Prop. 25 estas akceptita kiel deziresprimo, transdonota al la Dir. de SAT, unuanime de Prop. Kom. k Kongreso en jena formo: "Dum ĉiu kongreso okazas speciala kunsido de la ĉeestantaj PK-anoj, ĜK-anoj, perantoj k vicperantoj, kie oni interŝanĝas spertojn k raportas pri la loka laboro."

K-do Wachsmuth plendas, ke oni ne povas kompreni la prop. en la salono. Oni ne povas fari al si bildon.

K-do Lanti rimarkigas, ke oni ne diskutas laŭorde la prop., kiel ili estis presitaj k numeritaj en "S-ulo".

K-do Kaulich resp., ke div. prop. estas interligitaj k tial kune traktitaj.

K-do Lanti konsentas.

Prop. 26 (ke anoj de sciencaj aŭ prof. fakaj esp. organizoj rajtas okupi respondecajn postenojn en SAT ktp.) estas unuanime malakceptita de la Kom. k de la Kongreso.

Prop. 28 (pri samtempa k samurba okazo de SAT-Kongreso kun alia intern. prol. kongreso) estas transdonita al la Direkcio kiel materialo. Unuanime.

Prop. 29 (pri aliĝmarkoj por novaliĝantoj) estas transdonita al la Administracio. Kontraŭ 1 voĉo.

Prop. 31 (pri komisionoj, kiuj zorgu por malliberigitaj Gek-doj): La Prop. Kom. esprimas, ke tio estas taskoj de la koncernaj politikaj partioj. Ĉiu rajtas helpi, se estas lingvaj diferencoj ktp. Unuanime malaprobita de la Kom. konsiderante, ke ni ne povas plenumi taskojn de prol. pol. organizoj. La Kongreso malaprobas unuanime.

Prop. 32 (pri rapida aperigo de l' Kongresprotokolo): La Prop. Kom. k Kongr. decidas unuanime, ke oni presigu la protokolaron en unu n-o de "S-ulo" k zorgu, ke ĝi aperu kiel eble plej rapide.

Prop. 34 (pri starigo de esp. konsultejo)[1] laŭ decido de Prop. Kom. k Kongreso (unuanima) estas transdonota al la Direkcio kiel materialo.

Prop. 35 (pri diskuto pri artikolo "Ĉu revolucio en la esp. movado?" — n-o 248) estas unuanime malakceptita de Prop. Kom. k Kongr.

Prop. 36 (pri aperigo de jara enhav-tablo de "S-ulo") estas akceptita de Prop. Kom. k Kongreso (unuanime).

Prop. 37 (pri SAT-laborinsigno) estas malakceptita unuanime de Prop. Kom. k Kongreso. Same Prop. 38 (pri specialinsigno por blanklandaj SAT-anoj).

Prop. 39 (pri deviga portado de insigno) estas malakceptita unuanime de Prop. Kom. k Kongreso.

Prop. 40 (pri SAT-standardo) estas malakceptita unuanime de Prop. Kom. k Kongr.

Prop. 41 (pri adresoj de ĉiuj lab. esp. grupoj ktp. en la Jarlibro) estas malakceptita de la Prop. Kom. unuanime, ĉar en la pasinta kongreso jam estas akceptita simila propono k bedaŭrinde nun ne efektivigebla, ĉar la Perantoj ne ĉiam respondas. La Kongreso malakceptas same unuanime tiun prop.

Prop. 41-A (aperis en n-o 249, en la rap. de la Literat. Komisiono, pri la samurbeco de la membroj de Lit. Kom.) estas unuanime akceptita de Prop. Kom. k Kongreso.

Prop. 48 (pri organizado de delegitaroj al Sovetio k ke en ĉiu delegitaro estu almenaŭ unu delegito esp-ista; prop. de Krivoj-Rogaj SAT-anoj) estas unuanime akceptita kiel deziresprimo de Prop. Kom. k Kongr. k transdonota al koncernaj organizoj.

Prop. 56[1] (de Tallinnaj SAT-anoj: "Konsiderante, ke en la t. n. blankaj landoj la SAT-anoj ofte estas endanĝerigataj dank' al la nuna senkontrola sistemo de la akcepto de anoj al SAT, la SAT-rondo en Tallinn proponas ŝanĝi la finon de par. 7 de Statuto jene: Malnova teksto: '... povas aniĝi al SAT pere de la loka peranto.' Nova teksto: '... povas aniĝi al SAT nur pere de la loka SAT-rondo.')". Prop. Kom. k Kongreso decidas transdoni ĝin kiel deziresprimon al la Direkcio.

---

[1] Rimarko: tiu propono ne estis publikigita en "S-ulo", kvankam la teksto estis sendita sufiĉe frue antaŭe, sed ĝi neniam atingis la redaktejon. Kopio de la propono estis transdonita de K-ino H. Dresen al la Propon-Komisiono k pro tio povis tamen esti konsiderata.

K-do Muravkin: La Prop. Kom. unuanime akceptis, ke ĝi ne estas kompetenta por pridiskuti la program-demandon. La 23 tiurilataj proponoj al la Kongr. k 4—5 rezolucioj tial ne estis traktitaj.

K-do Deubler klarigas, ke temas pri tri specoj de proponoj: 1. Ĉesigi k malakcepti la programon. 2. Elekti novan komisionon por plia studo. 3. Prokrasti la programdemandon. La voĉdonado rezultigas unuaniman akcepton de la unua propono, per kiu la du aliaj nuliĝas.

K-do Deubler: Mi esprimas mian ĝojon pri la likvidiĝo de tiu afero. (Aplaŭdo.)

K-do Muravkin: Al la proponkomisiono, kiu kuniĝos por likvidi la konflikton ekestintan, ĉeestu ankaŭ K-doj Lanti k Drezen k K-do el la Kontr. Kom. La Kongreso konsentas al tiu prop. (kontraŭ 2 voĉoj).

Post malgrandaj komunikoj de K-do Bässler la kunsido estas fermata ĉ. la 17-a. Tuj poste parolas K-do Koppisch (Kopiŝ), estrarano de Lab. Gimnast- k Sport-Asocio, Leipzig, pri "Sporto en la servo de l' Proletaro" (Lia parolado aperos presite en la "Sporta Paĝo" de "S-ulo"). Vespere okazis multnombraj fakkunsidoj.

REZOLUCIO

La Kongreso

1. konstatinte unu flanke, ke la eldono de "La Laborista Esperantismo" estis farita laŭ maniero, kiu povis kredigi, ke tiu verketo celis fariĝi la oficiala programo de nia Asocio; aŭdinte la konfeson de la Direkcio, ke tio estis "mispaŝo";

konstatinte duaflanke, ke

a) la paragrafo unua de la statuto plene difinas la celojn kaj taskojn de SAT;

b) ke la 8. SAT-Kongreso bone difinis la rolon de SAT, dirinte ke ĝi ne estas politika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo precipe okupata per la praktika utiligado de esperanto;

c) la programkomisiono senlace laborinte por plenumo de sia tasko ne sukcesis dum 3 jaroj prezenti tekston, kiu povus esti akceptata de ĉiuj tendencoj ekzistantaj en la laborista movado klasbatala, konsentas al la diversaj proponoj delonge faritaj kaj publikigitaj en "S-ulo" pri likvido de tiu komisiono; notinte la fakton, ke en Sovetio nia SAT-movado stagnis ĝenerale kaj eĉ malkreskis en kelkaj lokoj, la Kongreso konsideras, ke tia stato sendube rezultas de miskomprenoj okazigitaj de artikoloj aŭ "rimarkoj" pri la programafero. Ĉe tia konstato la Kongreso opinias, ke la ĉefa kulpulo en tiu afero estas la fordetruenda kapitalisma sistemo, kiu nuntempe malebligas normalajn kaj liberajn kontaktojn de la larĝaj amasoj el Sovetio kun la proletaro de la kapitalismaj landoj; tiaj miskomprenoj ankaŭ sendube rezultis el tio, ke ne ĉiam la diskutintoj uzis vortojn laŭ sama aŭ sufiĉe preciza senco. Estonte tia kaŭzo de miskomprenoj estos grandparte forigata de la nun verkata "Plena Vortaro de Esperanto".

2. Konsiderante, ke la Direkcio kaj la aliaj gvidantaj organoj senlace kaj sindoneme laboradis ĉiam por la bono de nia Asocio kaj ke la eblaj iliaj eraroj povis okazi ne pro la malbona-intenco de la Direkcio, la Kongreso esprimas sian fidon al ĉiuj gvidantaj organoj kaj remandatigas ilin daŭrigi la laboron kun speciala atento pri neceso konservi senpartiecon kaj unuecon de SAT.

3. La kongreso trovas konvena la momenton por ree deklari, ke SAT ne toleras la enkondukon de disputpunktoj, kiuj okazas inter la anoj de diversaj organizoj laboristaj. La tasko de SAT estas servadi al ĉiuj el ili kaj ĝuste pro tio ĉiu el ili ne nur povas, sed eĉ devas aliĝi al SAT. Ne mallarĝigante la kadron de nia Asocio, ankoraŭ restante sur la bazo, de sur kiu SAT ekiris depost fondiĝo, la Kongreso vokas al la racio de ĉiuj SAT-anoj, ke ili ekvidu la evidentajn avantaĝojn de nia organizo, kiu estas eksterpartia unuiĝo, kies ĉefa funkcio estas ebligi al komunisto, al socialisto, al sindikatisto kaj al anarkisto interrilatiĝi mondskale kun samtendencanoj kaj tiel utili al siaj respektivaj organizoj. Tial ĉiu SAT-ano gardu la unuecan karakteron de SAT, estime rilatu al alitendencano, por ke la jam elirintoj kaj novalirontoj ne povu restadi for el SAT. Zorgante tiel por justa ekvilibro inter la SAT-anoj, la Kongreso alvokas la laboristajn esperantistojn, kiuj pro iu kaŭzo ankoraŭ restas ekster SAT fariĝi senhezite SAT-anoj.

La Kongreso komisias al la gvidorganoj de SAT kaj al la Kontrolkomitato rigore zorgi la obeon al la statuto kaj al la kongresaj decidoj pri la senpartieco de SAT kaj kontraŭstari ĉiun emon fari SAT unutendenca, sendepende de kiu flanko venos tiu emo. Tiusence la Kongreso komisias al la Plenuma Komitato kaj al la Ĝenerala Konsilantaro de SAT, dum la plej proksima tempo ellabori kaj validigi la regularon pri funkciado de Kontrolkomitato, difinante precize ĝian rajton proponi transporti la reesploron de decido de iu gvidorgano al la pli alta instanco de SAT.

La Kongreso alvokas ĉiujn membrojn de SAT al plua laboro por plifortigo kaj prosperigo de SAT. "For la landlimojn! For la kapitalismon! Vivu la klasbatalo!"

VIVU SAT!

Leipzig, 8. 8. 29.

La Proponkomisiono:

H. MURAVKIN (prezid.) (2921)
V. KAULICH (sekret.) (8464)
W. STERTZENBACH (4567)
A. GUHR (4227)
J. BURGER (601)
P. KÖCKERITZ (77)
K. DEUBLER (30)
E. REK (10 027)
E. LANTI (1)
W. VILDEBRAND (483),
sekret. de Kontrolkomitato

La voĉdonado rezultigas **unuaniman akcepton.** (Aplaŭdo.)

K-do Bässler donas la statistikajn informojn (presitajn komence de l' Protokolaro).

K-do Capoulade petas, ke la Kongreso priparolu la demandon, kie okazigi la venontan SAT-Kongreson.

K-do Kaulich invitas la Kongreson al Bruselo nome de la tieaj SAT-anoj.

K-do Maller (Vieno) parolas por Moskvo.

K-do Bässler: La findecido restas al la Direkcio. Mi mem estas por Moskvo.

Same K-do Kampfrad (Leipzig). K-do Deubler: Ni ne havas konkretan proponon por Moskvo.

K-do v. d. Heid: Ni ne povas findecidi; ni ne faru du partiojn pro tiu afero.

K-do Urlich (Bruselo) parolas por Bruselo.

K-do Drezen: Ni bedaŭrinde ne povas inviti la Kongr. al Moskvo. Ne estas la kaŭzo de la sovetaj esp-istoj; estas multaj malhelpoj k ĝenoj en niaj vicoj, ekzemple niaj social-dem. K-doj eble ne ricevus permeson de siaj partiaj instancoj por ĉeesti kongreson en Moskvo. Al mi ŝajnas bone, ke la Kongr. de SAT okazu en sama lando kiel la universala. Pro la elekto de la urbo oni lasu la decidon al la Pl. Kom.

K-do Deubler rimarkigas, ke li jam antaŭ jaroj faris saman proponon kiel nun Drezen. Sed tiutempe oni ne aŭskultis lin.

K-do Batta deziras, ke oni trovu alian urbon k landon; li estas kontraŭ Bruselo.

K-do Demidjuk: Oni ne voĉdonu speciale pri urbo; oni ebligu almenaŭ ke sovetianoj povu partopreni. Oni povus diri, ke la Kongr. okazu principe en Nordokcidenta Eŭropo.

K-do Sulsky (Londono): Mi ne havas specialan komision de Brita Lab. Esp. Asocio. Sed mi esperas povi atingi, ke la Kongreso estu okazigota en Londono. Post unu monato mi povos informi la Pl. Kom. (La Kongr. forlasas tiun punkton).

K-do Jonas (Vieno) klarigas pri nia sinteno al la Intern. Esp. Muzeo en Vieno k avertas la K-dojn, ne subteni tiun institucion. Same kiel la aŭstriaj K-doj ni ĉiuj bojkotu tiun entreprenon, kiun protektas personoj kiel Sejpel k Ŝober.

K-do Deiters (Kassel) proponas sendi al Sporta Lab. Unuiĝo ekzempleron de ĉiuj niaj eldonaĵoj propagandcele.

K-do Siedentopf (Leipzig) plendas pri la eldonaĵoj de SAT presitaj en Parizo, rilate al la teknika flanko. Li deziresprimas, ke niaj eldonaĵoj ne estu presataj en Francio. Li laŭdas la "Peuvag"-presejon en Leipzig.

K-do Wendt (Leipzig) subtenas la prop. de K-do Deiters pri livero de eld. al la Sportlernejo, ankaŭ la vidpunkton de Siedentopf, ke la eldonaĵoj en Francio estas malbonaspekte faritaj. La prez-diferenco de 10—20 fenigoj po ekzemplero ne devas esti la kaŭzo, por tial iri al malpli moderna presejo.

K-do Lerchner proponas lasi ambaŭ aferojn al la Direkcio. (Akceptita per voĉdono.)

K-do v. d. Heid: Mi sentas la devon ion diri: Oni ofte moke parolis ĉe ni pri la Zamenhofa "Interna Ideo", kiu ludis ĉe la komenco atentindan rolon en la neŭtrala movado. Iel prave oni mokis. Tamen ĝi forte unuigis la unuajn pionirojn de la esp. movado. Tial mi opinias, ke estas bone, se ni, lab. esp-istoj, kunligas kun nia Laborista Esperantismo ian "internan

ideon". Same kiel la Zamenhofa ĝi estas nedifinebla krom en tiu senco, ke ĝi konsistas el sindono al la afero, el honesteco k lojaleco, el vera internacia solidareco, el la firma konvinko, ke ni kunlaboras al granda verko, nepre necesa por la emancipo de l' tutmonda Proletaro. Tia interna ideo ja devas kunligi nin k helpi forŝovi flanken la partiajn diferencojn k malpacojn. Regu en SAT moralaj principoj, regu vera solidareco inter la SAT-anoj, tiel ni evitos konfliktojn k triumfigos nian Aferon (Aplaŭdado.)

K-do D e u b l e r : Kiam okazis la Kongreso en Göteborg lastjare, ni ĉiuj akceptis kun ĝojo "Leipzig" kiel venontan kongresurbon. "Ni venos grandare al Leipzig", ni diris tiam. Kaj kiam mi aŭdis pri iliaj preparaj laboroj, mi ankaŭ ricevis la konvinkon, ke nia restado en Leipzig ne nur estos en la intereso de la movado mem, sed ke oni tie antaŭzorgos, por ke ĉiu unuopa SAT-ano sentu sin hejme. Dankon al la Kongr. Komitato! dankon ankaŭ al la kongresanoj, kiuj venis por la sukceso de ia entrepreno el malproksimaj landoj! Kaj precipe estu bone akceptataj en nia rondo la du sovetlandaj K-doj, kiuj sukcesis ĉeesti nian Kongreson! Tial mi transdonas la lastan parolon al nia K-do D e m i d j u k. (Apl.)

K-do D e m i d j u k : Pasis tiuj varmaj tagoj ekstere, k ankaŭ en la kongresejo estis sufiĉe sufoka la aero. Akre bolis la pasioj. Estis atakoj de unuj kontraŭ la aliaj. Kiom akuta k serioza estis la malsano en nia organizo, fariĝis subite klare videbla. Ŝajnis eksplodi la afero, ŝajnis fariĝi fendo, kiun oni ne sukcesos ripari. Sed necesas konstati, ke inter la kongresanoj regis ia humoro, kiu venigis al aliaj rezultoj. Ĉu ni jam sufiĉe kreskigis la senton de proleta solidareco? Kaj ĝuste tiu sento ja gvidis nin evidente a! la atingitaj solvoj kontentigaj. Tiel ni povos konservi nian organizon kiel kernon de la tutmonda lab. esp. movado, k el tiu mem ricevi la sukojn, por kreskigi la movadon k suprenkonduki al definitiva venko de la ideo. Sur nia komuna batalkampo ni restu kune, frato kun frato, alilandano kun alilandano, ŝultro ĉe ŝultro, unuigite batalakirante la finvenkon! Kaj tiel la kongreso per sia tuta laboro k humoro metis antaŭ ni la taskon: Konservi la Unuecon. Promeson, kiun ni portas en niaj koroj. Ni ĝisfine gardu nian unuecon! La lasta esprimo por ĝi estu la kanto, kiu signifas la Solidarecon! (Ĉiuj kantas kune L a I n t e r n a c i o n.)

D e m i d j u k : Vivu SAT! Vivu la 10-jara ekzistado k laboro de SAT! (Apl.)

(Fino de la Kongreso je 11.30 horo.)

Posttagmeze okazas kunsidoj de partianoj aparte laŭ partioj, aŭtoveturoj, div. vizitoj al zoologia ĝardeno, banejo ktp.

Vespere okazas je la 19.30 horo la I n t e r a m i k a V e s p e r o arANĝita de la Leipziga LEA-grupo en la granda salonego de la Popoldomo, kiu estas plenplena de SAT-anoj k Leipzig-anoj-ne-esp-istoj, kiuj deziras adiaŭi la kongresanojn. Plena sukceso! Lab. sportulinoj prezentas siajn lertajn ekzercojn, la "ĝiu-ĝitsu"-uloj (jap. sindefendarto) elvokas la admiron de l' rigardantoj; kun granda intereso oni sekvas la filmon pri la Sportfesto laborista en Nürnberg k aplaŭdas la f i l m o n p r i l a S A T - K o n g r e s o, tre lerte aranĝitan de la unuiĝo de Laboristaj fotoamatoroj k de nesubtaksebla varbforto por nia afero. La vespero finiĝas per ritma dankscenaro laŭ fabelo de Andersen "La koloraj ŝuoj", kiuj rikoltas unuaniman aplaŭdon.

Multaj kongresanoj ĵaŭdon posttagmeze aŭ vendredon matene jam forlasas la Kongresurbon. Vendrede ankaŭ kolektiĝas ĉe la stacidomo la grupoj, kiuj partoprenas la postkongresajn ekskursojn ... Ne plu vidiĝas la kolora, bone distingebla kongresinsigno en la stratoj de Leipzig ... Disiĝis la multcentoj da SAT-kongresanoj ... Pasis la 9-a ... Vivu la 10-a, la jubilea Kongreso de SAT!

La Laborista Problemo en Usono

(5-a daŭrigo. Vidu n-ojn 250—255)

Ni povus citi ankoraŭ multajn aliajn aranĝojn da pensioj, sed ili estas ĉiuj similaj al tiuj, kiujn mi prezentis en la antaŭa n-o, kaj mi preferos raporti nur pri la fabrikoj, kiujn mi povis mem viziti kaj pri kies aranĝoj mi observis la funkciadon. El mia ekzameno mi povas konkludi la jenon:

1. La financa ŝarĝo de la pensioj estas preskaŭ ĉiam portata de la kompanioj. 2. La komitato, kiu administras la monrezervon, estas ĉiam elektata de la kompanioj. 3. La pensio estas ĝenerale konsentata je la 65-a jaro por la viroj kaj 60-a jaro por la virinoj. 4. La jara sumo varias laŭ la daŭro de servado kun meza proporcio de 25 aŭ 30% de la salajro. 5. La ĉefa punkto: ĉio tio estas tute bonvola kaj la entreprenoj ĉiam rezervas al si la rajton repreni la pension de ĉiu homo, kies ideoj aŭ konduto, pro ia motivo, ne plaĉas al ili; la pensio estas nur donaco, celanta rekompenci la obeemon kaj fidelecon de la bonopinianta laboristo!

6. Mastra entrudiĝo en la hejma vivo de la laboristoj

La firmo "Joseph kaj Teiss" (Jozef k Tajs), kiu ĝis lastaj tempoj famiĝis en tuta Usono, kiel la plej perfekta efektiviĝo de la scienca labororganizo kaj de la direktado super la dungitaro, zorgas pri la tuta vivo de siaj laboristoj. Ĝi provas unue trudi al ili bonan higienon. Du fraŭlinoj estis tre malbonaj laboristinoj kaj plendis pri oftaj kapdoloroj. Hejma enketo permesis malkovri, ke la tuta familio, konsistanta el la patro, la patrino, tri knaboj kaj tiuj ĉi du fraŭlinoj, vivis en sola ĉambro kaj luigis la ceteron de la domo. La gepatroj vivis tiele el la luprezo kaj el la laboro de siaj filinoj. La kompanio minacis maldungi la fraŭlinojn, se la familio ne reprenus la tutan domon kaj ne kutimiĝus dormi kun malfermitaj fenestroj. Ĉi tiu obeis, kaj baldaŭ la du laboristinoj pli bone sanstatis, pligrandigis sian produktokvanton kaj povis ricevi pli altan salajron.

La kompanio nepre postulas same, ke junulino, laboranta en fabriko, konservu por si kelkan parton el la mono, kiun ŝi laborakiras! Se ŝi transdonas ĉion al siaj gepatroj, ŝi ne havas profiton nek emon maksimume produkti. La kompanio petas ankaŭ al parencoj lasi al siaj filinoj kelkan liberon, ĉar la junulino, hejme retenata kontraŭ sia volo, koleriĝas kaj fariĝas malbona laboristino. Male, se ŝi tro promenas, kaj precipe tro ofte iras al dancejo, ŝi vante disperdos sian energion kaj ŝia produktkapablo malpligrandiĝos. La kompanio zorgas ankaŭ lernigi al siaj laboristinoj, kiel ili devas elspezi sian monon: Tiuj ĉi fakte inklinas iafoje dediĉi la plej grandan parton el sia salajro al supermezuraj tualetspezoj kaj seniĝi je nutraĵo; ili maloftiĝas tiel kaj ilia produktkapablo malpligrandiĝas... — tiel skribas sinjorino Gilson, kiu estas la "employment menager" (dung-oficistino) de tiu ĉi firmo. "Hejmaj vizitoj estas ofte necesaj por insiste peti al familio kaj nepre postuli al fraŭlino pli grandan simplecon en ŝia vestado! "Sed la ĉefaj klopodoj konsistas precipe el tio doni al fremdaj virinoj "r e k t a j n u s o n a j n k u t i m o j n". Oni rimarkis, ekzemple, ke multaj laboristinoj, revenante el la fabriko, elspezis multe da energio por prepari la manĝon, ordigi la hejmon kaj zorgi pri siaj gefiloj. Tial la kompanio provas bone kredigi, ke la gefiloj estus ĝustlokaj en la infangardejo. Rilate la manĝojn, la edzino devas ilin prepari trifoje semajne, kaj la edzo dum la tri aliaj tagoj. Dimanĉon oni balaos la loĝejon. La energi-elspezo estas tiel maksimume malpliigata. Aliaj sciindaj ideoj: "Pluraj virinoj, — skribas s-ino Gilson, — volas hejme resti, kiam iu inter la familio estas malsana. La koncepto, por pago dungi kompetentan najbaron aŭ alvoki flegiston, anstataŭ foresti la fabrikon por flegi malsanulon, estas malfacile komprenata de tiuj malkleraj fremdulinoj; necesas por tio tre longa edukado."

La premia salajro ĉe Ford

Tajs eniĝas la vivon de l' laborista familio, kiam ĝuste necesiĝas; ĉe Ford tio estas la rezulto de l' tuta decida regmaniero kaj koncernas sendiference ĉiujn laboristojn. En 1912, efektive, per diktatoraĵo, kiu estigis indignon ĉe liaj konkurantoj, Ford starigis en sia fabriko la okhoran labortempon kaj reorganizis siajn metodojn de salajrpago. La laboristoj estis, laŭ la malfacilo de sia laboro, kunigataj en kvin klasoj. Ĉiu klaso estis siavice subdividata en tri grupojn, laŭ tio, ĉu la viroj estis spertaj, mezbonaj aŭ komencantaj laboristoj. Kaj ĉiu grupo el ĉiu klaso ricevis iun precize fiksitan horsalajron.


Al tiu ĉi fundamenta salajro aldoniĝas laŭdira partopreno en profitoj, kio ne estas vera, ĉar la koncerna sumo havas nenian rilaton kun la profitoj de la entrepreno kaj estis fiksata por ĉiu klaso en 1912; estas, vere, dua salajrelemento, destinita por la diversajn laborpagojn egaligi, ĉar ĝi varias proporcie al la normala salajro.

Tiu ĉi partopreno konsistas je 40% el la laborpago de la nekvalifikitaj laboristoj. Tio faras sumon da kvin dolaroj tage, — minimumo, kiun Ford certigas al ĉiu viro, laboranta ĉe li. Ĉar tiu ĉi sumo estas tre alta, Ford opiniis,

PROBLEMO DE L'ELMIGRADO

Mondvojaĝo hodiaŭ tute ne plu havas en si ion romantikan. Gigantaj ŝipegoj veturas je plejebla sendanĝereco laŭ antaŭe starigita plano de haveno al haveno, traveturante oceanojn. Ĉiuj modernaj eltrovoj estas je la dispono de la moderna vojaĝanto.

Por la pasaĝeroj de I-a kaj II-a klasoj ekzistas ĉia elpensebla komforto kaj lukso. Varmaj kaj malvarmaj trogo- kaj naĝbanoj, gimnastikejoj, ludoj ĉiuspecaj, muziko kaj baloj, kostumpruntado, frizistoj kaj dentistoj, lavado kaj gladado, freŝaj floroj, ĉio estas havebla sur la ŝipo. La riĉaj mondvagantoj tute ne bezonas enui.



Akceptejo k unua rifuĝejo por nov-alvenintaj enmigrintoj (Santa Maria, Brazilio)

Iom alia la afero ja estas por la vojaĝantoj de III-a klaso aŭ de la loĝferdeko. Multo ankaŭ jam pliboniĝis, sed la klasdiferencoj ĝuste ĉi tie, kie riĉuloj kaj malriĉuloj estas devigataj vivi tiel proksime unu apud la alia, aperas eksterordinare grandaj.

La kompatindaj elmigrantoj plej ofte vendis sian lastan havaĵon por povi pagi la transveturadon. Sur la ŝipo ili havas paŭzon por ripozi. Tie ili ekspiras. Plej ofte estas la unuaj kaj solaj "bonaj tagoj" tiuj, kiujn la elmigrantoj ĝuas ĉi tie.

Plej malbona estas la situacio de la elmigrantoj el la Balkanaj landoj kaj el orienta Eŭropo. Ili estas elrabataj de la agentoj. Rusaj vilaĝanoj el Blankrusio aŭ slovenoj el Jugoslavio, kiuj ne havas sufiĉe da tero por la vivo, kiuj estas sufokataj de impostoj, estas allogataj de la agentoj. Ili je sia eta posedaĵo ricevas prunton centdolaran, kiun ili devas repagi post kelkaj jaroj. Per tio ili vojaĝas al Argentino aŭ Brazilio, esperante ricevi tie grandan parton da tero aŭ bone pagatan laboron. Plej ofte ili estas devigataj dungiĝi por la plej malgranda salajro, por konservi sian nuran vivon. La kambion ili ne povas pagi, kaj tiel ili perdas ĉion.

Jen la sorto de la orientaj elmigrantoj, kiuj ĉiutage estas centope enŝipigataj en Hamburgo.

Sed ankaŭ la laboristoj lernintaj iun profesion, plej ofte ne sukcesas pli bone. Certe la kapitalistoj en Sudameriko havas intereson, ke alvenu plej eble multaj laborfortoj. Por tio la salajroj malaltiĝas. La eksterlandaj laboristoj ĝenerale estas devigataj akcepti ĉiun laboron, kiu prezentiĝas. Ili devas esti kontentaj, se ili baldaŭ trovas ion, antaŭ ol estas forkonsumitaj iliaj lastaj moneroj kaj antaŭ ol ili glitas en la plej akran mizeron. Ĝenerale neorganizitaj ili ankaŭ ne intencas turni sin al la laboristorganizoj de la lando. Ili timas esti rigardataj kiel bolŝevikoj aŭ socialistoj.

Ofte ili estas homoj sen klaskonscio. Ili esperas fariĝi en la Nova Mondo plej baldaŭ riĉetaj. Ili ne pripensas, ke ilia sorto dependas de tiu de la tuta laborista klaso, kaj ke ĝi nur povas boniĝi, se la tuta klaso havas pli altan nivelon. Ili kredas, ke ili estas favorotaj de la feliĉo. Neinformitaj pri la stato de salajroj kaj laborcirkonstancoj en la lando, ili laboras je pli malbonaj kondiĉoj ol la tieaj laboristoj. Ĉi tiuj provas instrui ilin; sed se tio ne helpas, ili estas rigardataj kiel neŝatindaj konkurantoj. Ofte ili disvolviĝas je "flavaj elementoj".

La laboristaj organizoj de Sudameriko ripet-foje alvokis la laborist-organizojn de Eŭropo, ke ili pli zorgu pri la elmigrado.

La demando havas ankaŭ alian flankon. Post malsukcesaj revolucioj la batalintoj elmigris por eviti la venĝon de la reakcio. Granda nombro el la partoprenintoj ĉe la burĝa revolucio en 1848 elmigris al Nordameriko, kie multaj el ili fariĝis bonaj civitanoj. Ankaŭ la germana "kontraŭsocialista leĝo" forpelis multajn socialdemokratojn el la lando kaj devigis ilin elmigri. Ĉi tiuj elmigrintoj estis klaskonsciaj, ili restis fidelaj al siaj ideoj kaj daŭrigis la propagandon por sia idealo ankaŭ en la nova hejmlando. Ili aliĝis al la laboristorganizoj de la lando kaj vigle partoprenis la batalojn por plibonigo de la situacio de l' proletaro.

La spiritostato de la plej multaj elmigrantoj hodiaŭaj estas alia. Ne la socia reakcio, sed la ekonomia mizero forpelas ilin el ilia hejmlando. Eŭropo estas "troloĝata". Ŝajnas, ke ĝi ne povas nutri sian loĝantaron. La nombro de la senlaboruloj estas multmiliona. La registaroj ĝojas, malhavi senlaborulojn, kies mizeron ili ne volas mildigi, kaj kies malkontenteco povus iĝi danĝera por ili. Tiel la elmigrado estas favorata de la burĝoj en Eŭropo, same kiel la enmigrado estas favorata de la burĝaro en Ameriko, domaĝe al la laboristoj.

La demando de la laborista elmigrado estas problemo de la internacia laborista movado. Por la solvo de tiu problemo estas necese esplori la produktadeblojn de ĉiu lando kaj adapti ilin al la tutmondaj bezonoj. El statistikoj sendube rezultus, ke la plej multaj landoj povus nutri sian loĝantaron. Sed la produktado devus esti multflanke plibonigata kaj aliorganizata.

Neniu laboristo, teknikisto, neniu komizo devus elmigri aŭ akcepti postenon en iu enmigra lando, ne rilatinte antaŭe al sia faka organizo, kiu estas informita pri stato kaj situacio en la koncerna industrio aŭ fako en la celata lando.

Nur tiel povas esti evitate, ke la enmigrantoj spertas seniluziiĝojn. Akceptate de siaj profesikolegoj kaj cetere de la tuta laboranta loĝantaro kiel amikoj, ili havos multajn faciligojn.

La problemo de la laboristmigrado do estas problemo de organizado. Ĉar bedaŭrinde ne la tuta loĝantaro laboranta en la elmigraj landoj estas organizita, tial la organizitaj laboristoj kaj oficistoj devas serĉi la necesan kontakton kun la neorganizitaj laboristoj en urboj kaj vilaĝoj. Antaŭ ĉio devas esti malebligata la abomeninda trompado fare de la agentoj.

A. Sy.

Laŭ Gazetservo de Intern. Lab. Asocio (Berlin) — resumita.

---

ke povus esti danĝere, tro rapide riĉigi la laboristojn, se oni ne instruus samtempe al ili saĝe elspezi sian monon. Pro tio, li decidis, ke nur ricevos la duan salajron la viroj, kapablaj "utiligi ĝin saĝe kaj en konservativa spirito".

(Daŭrigota.)



La hipokrita rolo de la Ruĝa Kruco

La Ruĝa Kruco okupas sin nun momente pri la traktado al militkaptitoj en la tempo de militaj agoj. Plia pruvo, ke tiu ĉi pac-organizo kalkulas je milito kaj sin preparas por ĝi. La protestoj kontraŭ tiu ĉi sinteno kaj karaktero de Ruĝa Kruco el la tendaro de l' veraj pac-amikoj fariĝas tial pli kaj pli nombraj. Kiam la Ruĝa Kruco antaŭ nelonge publikigis alvokon favore al sia helpagado por la protekto de l' civilaj loĝantaroj kontraŭ la gasmilito, multnombraj svisaj organizoj kontraŭmilitaj protestis kontraŭ tiu ĉi iniciativo. Tiuj ĉi organizoj atendis de la Ruĝa Kruco proteston kontraŭ la milito anstataŭ tia alvoko por monsubvencio al kontraŭgasataka protekto, kiu estas ridinda kaj komedia, ĉar la teknikistoj kaj ekspertoj mem de la Ruĝa Kruco devis konstati kaj deklari al la civila loĝantaro, ke ĝi estas absolute sen rimedoj de defendo kontraŭ la detrua forto de la produktoj, kiujn oni povas sendi al ĝi el la aero.

Gazetservo de Intern. Antim. Oficejo, Hago.

Korektoj. En n-oj 253/254, pĝ. 454, 2-a kolono, lin. 15 de malsupre oni legu: "judoj" (anst. ludoj). — En n-o 252 (artik. pri sendependa Estonujo) oni korektu jenajn erarojn: **1 kg.** da viando kostas **1.25—2.— kr.**, sed ne 0.60—0.85, **1 kg.** da butero **1.70—2.50 kr.**, sed ne 0.85—1.20 kr. La aŭtoro skribis prezon de funto, sed ne de kgr. Aliaj prezoj estas ĝustaj. 1 dolaro = **3.75 kr. est.** (ne 3.50).

TRA ESPERANTIO

INTERNACIA KUNVENO DE SOCIALISTA JUNULARO EN VIENO

(julio 1929)

Esperanto vivis. Dum la malfermo de la Kunveno antaŭ la "Burg" la megafonoj (gigantofonoj) salutis esperantlingve la 50 mil alvenintajn junulojn en la nomo de la malgrandaj nacioj. Flirtis standardo de Aŭstria Lab. Ligo Esp-ista (ALLE) k tiu de Svisa esper. junularo. Oni vidis ĉie la verdsteluloj̃n. En la gvidkajero de l' Kunveno esp. anonco pri Esp. Manifestacio. En la Memorkajero la unua frazo: esperanto-saluto, — bedaŭrinde kun eraroj; sed pli grandaj eraroj troviĝis ankoraŭ en aliaj lingvoj sube presitaj.

Kaj jen la granda oficiala Manifestacio la 12-an de julio en Laborista hejmo Vieno, X-a distrikto: Kelkcent ĉeestantoj, ŝajnas, grandparte ne-vienanoj. Orkestro de la socialistaj mezlernejanoj. Ĥorkantado de la gaslaboristoj (esp-e k germane). Salutoj de K-do d-ro Kanitz en la nomo de la Socialista Junulara Internacio (germane), de K-do Jonas en la nomo de ALLE (esp-e). Lekcio de K-do d-ro Engelhardt pri mondkulturo (esp-e). Kaj poste esp. salutoj de diversnacianoj, i. a. finno, islando, judo, ĉeĥo, polo, svedo, hungaro, sviso, germano, bulgaro, rumano ktp. Fine mallonga saluto en la nomo de 6 mil klasbatalantoj unuigitaj en SAT de ĝia reprezentanto K-do J. Litauer el Varsovio. La belegan manifestacion finis esp-e kantata Internacio. J. L.

FOTOAMATOROJ

Dum la 9-a SAT-kongreso la fotoamatoroj estis tre aktivaj; multaj Gek-doj kunportis sian fotoaparaton, kvazaŭ "ŝtele" fotografis grupojn de kongresanoj. Sed bedaŭrinde la kongreskomitato nur vidis aŭ ricevis tre malmultajn tiajn fotojn. Ĉar certe la fotoj estas valoraj por ĉiuj laboristaj esp-istoj, ni intencas kolekti k eventuale eldoni presitan fotolibron, kiun malkare poste povus akiri ĉiuj interesuloj. Sed por ke la libro estu laŭeble kompleta k krome malkara, nepre ĉiu fotinto devus sendi senprokraste k, se iel eblas, senpage po unu foto de ĉiu speco, kiun li faris. Do helpu al ni tiurilate, ĉar tiel vi multe servas samtempe al tuta nia movado. La fotojn sendu laŭ adreso: Otto Bässler, Gerberstr. 24, **Leipzig C 1** (Germanio).

KONGRESALIĜINTOJ,

kiuj ĝis nun ne jam ricevis la kongresmaterialon, senprokraste postulu ĝin ĉe la Adm. de SAT, al kiu la K. K. ĉion transdonis.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Robert Louzon, Deux grands courants du capitalisme moderne: Impérialisme et Nationalisme. (Du grandaj fluoj de l' moderna kapitalismo: Imperialismo kaj Naciismo). Eld. Librairie du Travail, 17, rue de Sambre-et-Meuse, Paris 10e. Prezo: 1.50 fr. Form.: 14×19 cm. Pĝ. 40. Franclingva.

La aŭtoro pritraktas en tre konciza formo unue la bazojn de l' imperialismo, — rezulto de l' mondskala produktado, k de l' naciismo, ĝia antagonisto. Li priskribas la interbatalon de tiuj du tendencoj, la ĉiam pli k pli malefikan sindefendon de ĉi lasta kontraŭ la ekonomia internaciiĝo, fine la situacion de imperialismo k naciismo en la diversaj regnoj k la pozicion de l' tutmonda proletaro rilate al la du grandaj fluoj de l' moderna kapitalismo.

Em. Robert, KLASIKA LEGOLIBRO. Versions pour la deuxième année d' esperanto. Eld. de l' verkinto, 5, rue Ravignan, Paris (18-e). Form. 11½×18 cm. 32 pĝ. Prezo: afrankite 1.50 fr.

Tiu ĉi negranda libreto enhavas aron da anekdotoj k kelkajn versojn. La plej granda parto estas prenita el la franca literaturo. Neniu peco transiras la spacon de unu paĝo. Ĝi estas destinita por porgresintaj studantoj de la lingvo, t. e. por "duajaruloj". N. B.

Standards. Le travail américain vu par un ouvrier français. Form. 12×18 cm. 425 pĝ. Prezo: 15 fr. fr. Eldonejo: "Les Ecrits" ĉe Bernard Grasset, éditeur, Paris. (Franclingva.)

E. Armand, LES LOUPS DANS LA VILLE. Pièce en 4 actes. 94 pĝ. Form. 13½×16 cm. Prezo: 3.50 fr. fr. Adr.: 22, cité St. Joseph, Orléans, Francio. (Franclingva.)

V. Svistunov, ELEMENTOJ DE ESPERANTO, 4-a eldono. 36/50-a miloj. Eld. CK SEU. Moskvo, 1929. Formato 12×17 cm. 96 pĝ. Prezo: 30 kop.

Kelkfoje jam estas priparolita tiu ĉi bone aranĝita lernilo en "S-ulo" okaze de antaŭaj ĝiaj eldonoj. Ni tial ŝparas al ni novan recenzon pri la bonega instruilo. Certe ankaŭ la 4-a eld. disvendiĝos facile k helpos pligrandigi la armeon da esperantistoj en Sovetio. N. B.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

O proletario, Porto, 13. 7., Ruĝa urbeto en bl. lando (241).

Priesper. notojn k artik. enhavis:

Signalen, Stokh., 25. 7., Commonwealth College, Mena (Usono), 1. 7.

Pri la SAT-Kongreso raportis:

Philadelphia Tagebl., 3. 7.

Peresper. materialon enpresis:

Krasnaja Iskra, Boroviĉi, 28. 6., Travail, Lyon, 27. 7., Juna Bolŝeviko, Kiev, 12. 5., 19. 5., 30. 6., 18. 7., 21. 7.

NIA POŜTO

6184. — El via diskutartikolo ni faris du partojn, kiuj ambaŭ aperos.

3409. — Ni konfirmas ricevon de via laste sendita materialo, kiun ni uzos laŭeble.

13 892. — Viaj artik. konvenas kredeble por "Liberpensula Paĝo" en "S-ulo". Sendu tiujn manuskr. estonte al la koncerna adreso (K. Hubricht, vidu en "S-ulo"). Ne; la kunlaborado estas libervole k sen rekompenco materia.

3208. — Vi malatentis, ke tiaj alvokoj kiel la via devas esti pagataj kiel anonco. Sendu monsumon (4 mk. g.) al nia Adm.

12 028. — Jes, ni intencas publikigi viajn artik. en felietona parto.

1188. — Ni ne plu povas liveri al vi la portug. gazeton deziratan. Bonv. turni vin rekte al Lisboa SAT-ano. Red.

ENHAVO:

	pago
Protokolaro de la 9-a SAT-Kongreso	481—98
La Laborista Problemo en Usono	498—99
Problemo de l' elmigrado	499
La hipokrita rolo de la Ruĝa Kruco	499
Korektoj	499
Tra Esperantio	500

Abontarifo al Sennaciulo: (La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon.)

Argentino, pes. 5 (6); Aŭstrio, ŝil. 10 (12); Belgio, belgo 10 (12); Brazilio, milrejs. 15 (18); Britio, ŝil. 8 (9); Bulgario, lev. 200 (250); Ĉekoslovakio, kr. 50 (60); Danio, kr. 8 (10); Estonio, kr. 7 (8); Finnlando, mk. 70 (80); Francio, fr. 35 (40); Germanio, mk. 8 (9); Hispanio, pes. 10 (12); Hungario, peng. 8 (10); Italio, lir. 40 (45); Japanio, jen. 4 (5); Jugoslavio, din. 100 (120); Latvio, lat. 8 (10); Litovio, lid. 15 (20); Nederlando, guld. 5 (6); Norvegio, kr. 8 (9); Polio, zlot. 12 (15); Portugalio, esk. 35 (40); Rumanio, lej. 300 (350); Sovetio, rubl. 4 (4,50); Svedio, kr. 8 (9); Svisio, fr. 10 (12); Usono, dol. 2 (2,50). — Ponumera prezo estas: 0,20 mk. g. = 0,25 fr. svis.

MONON ONI SENDU: rekte al la Administranto de SAT, **Richard Lerchner, Kolmstr. 1, Leipzig-O-27 (Germanio),** poŝtĉekkonto 6835 aŭ pere de unu el la jenaj poŝtkontoj, ĉiuj je la nomo de R. Lerchner: Bruxelles, 227 848 — s'-Gravenhage, 142 084 — Praha, 501 007 — Stockholm, 4268 — Warszawa, 191 335 — Wien-D, 137 725 — Zagreb, 40 040 — Kobenhavn, 14 938 — Zürich-VIII, 15 929 — La francianoj pagu al Sennacieca Asocio Tutmonda, 23 rue Boyer, Paris-XX, per la poŝtkonto 1234—22. — La sovetianoj al CK de SEU, poŝtkesto n-o 630, Moskvo. En landoj kie ni ne havas poŝtkontojn, oni pagu per **ŝtataj monbiletoj en registrita letero.**

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)